

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 111, februaro 2014

Niaj proverboj

Kiel la suno naskiĝas ĉiutage, tiel same Espero- kiu neniam mortas- renoviĝas en ĉiu mateno aperanta ĉe la horizonto

(Paiva Netto)

Ĉiu tago de via vivo estas paĝo de via biografio, zorgu skribi bone ĝin, ĉar malbona paĝo malpurigas la tutan libron

(Naim Frashëri)

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326, gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli: 00355682587699, sokolinehat@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr; Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, luanjaupi@hotmail.com; Enkela Xhamaj: 00355685135105, xhamajkl@yahoo.com;

La enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Jarraporto

Pagis la kotizon

Ekzemnesio

Alvoko por volontula laboro

Instruado: komento de Zlatko Tišljarić

Instruado sugestoj de prof. Leonov

Novaj redaktoroj

Ni dankas

Ni solidariĝas

Nia propagando

Ekspozicio en Pakistano

Karikatura bildo el la jaro 1913

Artfajraĵoj de gimnastiko

Niaj leteroj

Maria Aparecida- Brazilo

Eldonejo Lorenz- Brazilo

Juan Carlos Montero Medina- Kubo

Germain Pirlot- Francio

Massimo Ripari- Italio

Elma da Nascimento- Brazilo

Evandro- Brazilo

Stanislavo- Pollando

Alicja Lewanderska- Germanio

Edmond Ludwig- Francio

Agnes Geelen- Belgio

Alfredo Portillo- Venezuelo

Fernando Pita- Brazilo

Ronaldo- Brazilo

Vittorio kaj Luigia Madella- Italio

Jocelyn-

Michel Boris Mandirola- Italio

Birgiita- Svedio

Engjell Gusho- Albanio

Informaĵoj

Informinterŝanĝo

Ĵurnalismo en Esperanto

Nova Projekto Erasmus

Zamenhofaj tagoj en Pollando

Ni funebras

Scivolemaĵoj

Anoncoj

Esperanto literatura konkurso

Kastelo Greziljono

Artikoloj

Forpasis Mandela- eseo de Afrore Shaipi

Paivo Netto: La mondo naskiĝis kun muziko kaj Religia demokratio

Fatbardha Demi: Pri la deveno de la terminoj Kristo kaj Kruco

Politiko

Novaĵletero

Beletraĵoj

Poeziaĵoj de Shefqete Gosalci, Priština, Kosovo

Poeziaĵo de Mimoza Ahmeti, Tirana, Albanio

Fragmento de romano de Ismail Kadare "La filino de Agamemnono", Tirana-Parizo, Albanio

Fragmento el la romano de Adem Demaçi "La patrino Shega kaj la kvin junulinoj", Priština, Kosovo

Poeziaĵo de Gerard Leser, Elzaso, Francio

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

La jarraporto 2013

Albana ILEI-sekcio

Nia sekcio agadas ekde la jaro 1993 enkadre de ILEI.

Ĝi aktivis ankaŭ enkadre de la Albana Esperantista Asocio, fondita en la jaro 1991, kaj reagnoskita oficiale de UEA julie 2013.

Dum ĉi tiuj 20 jaroj ni klopodis disvastigi Esperanton en la sino de la junularo, propagandi IL per diversaj formoj kaj rimedoj, eldoni lernolibrojn, traduki en kaj de Esperanto ks.

Komence de la jaro 2013, okazis la renovigo ĉe la juĝejo de Tirana de nia tutlanda esperantista asocio, tiel ankaŭ nia ILEI-sekcio nun povas aktivi pli "oficiale" ĉe la edukaj institucioj. Problemo estas la maljuniĝo de la membraro (mi, la sekciestro estas 68 jara, Gjergji Gusho estas 72 jara, Nehat Sokoli estas 55 jara, Enkela Xhamaj estas 45 jara, Agim Peraj estas 63 jara). Do nia antaŭeca tasko estas la verbado de junaj instruistoj.

Ni sukcesis starigi lernokurson kie aliĝis almenaŭ kvin studentoj (Ili Gerdupi, Ada Tafaj, Anisa Gjini, Florian Ajdini kaj Arda Kadilli). Fine de novembro ili fondis esperantistan grupeton "Agletoj" kaj petis rilatojn al TEJO. Espereble ni starigos novan lernokurson en mezlernejoj.

Dume ni publikigis retan lernokurson kiun eblas partopreni kiu ajn albana junulo en Albanio, Kosovo, Makedonio kaj Suda Serbio (Preševo). Espereble ĝin aligos gelernantoj kaj aliaj.

Ni propagandis Esperanton per TV almenaŭ en du kazoj:

- fruaŭguste kiam Tatiana Loskutova prelegis en la Nacia Biblioteko de Tirana pri Esperanto kion filmis la TV kanalo ABC news dum 25 minutoj.

(http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=8NsfxU6F1dY#at=11)

- novembre kiam la sekciestro estis invitita en la frumatena elsendo de la TV kanalo Top Channel por diskuti pri la "lingvoj de kariero" (<http://top-channel.tv/video.php?id=31430>

<http://top-channel.tv/video.php?id=31430#.UkXc0Bb1yTc.email>)

Ni sukcesis, kunlabore kun la polaj samideanoj traduki en Esperanton kaj publikigi du novaj verkojn:

"La sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliçka kaj "Lundo en sep tagoj" de Luljeta Lleshanaku). Ambaŭ albanaj aŭtoroj gajnis premiojn en la jara librofoiro, la unua gajnis la "Arĝentan Plumon" kaj la dua estis elektita kiel "La plej bona verkisto de la jaro". Ĉikaze la preso kaj televizioj raportis favore al Esperanto. Dume estas jam tradukitaj almenaŭ kvar romanoj kaj tri volumoj de poeziaĵoj.

Ni estas pagintaj regule la jarkotizojn al ILEI, (por 2012, 30 eŭrojn, je reta versio, kion mi mem transpagis el mia konto ĉe FEL). La individua enlanda kotizo estas 500 Lekoj (= 5 USD). Tiel ni petas la bonkomprenemon de ILEI estraro por ke akceptu de ni po 1 USD po persono kaj ne po 5 eŭroj kiel ĝis nun.

Bardhyl Selimi, la sekciestro

La 14-an de decembro 2013

Pagis la kotizon por 2014

La jarkotizon por la nova jaro 2014 estas pagintaj jam la samideanojn:

Gjergji Gusho-500 L, Engjell Gusho- 500 L, Bardhyl Selimi- 500 L, Shaban Hasani- 500 L

La kasisto Sajmir Beqiraj

Ekzamensesio

La 17-an de januaro okazis la unua ekzemensesio por ĉi jaro. Partoprenis ĝin du studentoj. La komisiono taksis ilin respektive Ili Gerdupi sep, Anisa Gjini ok.

La venonta sesio okazos je 17-an de februaro 2014. Jam aliĝis du aliaj studentoj: Ada Tafaj kaj Florian Hajdini

Nehat Sokoli

Alvoko por volontula laboro

Saluton karaj,

Zsófi petis min plusendi al vi tiujn bonegajn eblojn por junuloj. Vi povas rekte kontakti ŝin por demandoj, konsiloj, ktp.

Amike kaj bondezire:
Veronika

Saluton denove!

Mi ŝatus plusendi al vi du alvokojn por volontula laboro por Esperanto, eble iu el vi interesiĝus. Unu en Pollando ekde autuno por 9 monatoj, la alia en Francio por 2 monatoj. La programo en Pollando estas finance tute subtenita tra EVS, en la franca programo la volontulo devas nur vojaĝkostojn pagi, surloke estas loĝado, la manĝado, kaj la elspezoj. Mi partoprenis jam en ambau programoj, do se iu ŝatus scii pri personaj spertoj, mi volonte respondas la demandojn :)

Volontulado en Bjalistoko:

<http://espero.bialystok.pl/eo/article,588,12,1.html>

Kaj en Tuluzo:

http://www.esperanto-midipyrenees.org/esperanto/dossier.php?val=46_decouverte+pratique+esperanto

Amike,

Zsófi

Zsófia Pataki <pataki.zsofia@gmail.com>

Esperanto- instruado

Artikolo de baratano

Mi gratulas, ĉar temas pri vere serioza artikolo. kiu tamen estas mallonga kaj ne postulas tro da tempo por ke povu legi ĝin kiu ajn kiu iom interesighas pri la temo.

Ne por la artikolo, sed por iam posta pli profunda studo de la problemoj kiujn vi tushis, oni sciu ke en la afero de facileco kaj sekve ankaŭ de propedeutikeco influas aro da faktoroj kiuj povas komplete detrui la rezultojn prezentitajn en via artikolo, kiuj efektive rilatas al relative idealaj instrukondicho.

1. Esperanto ne estas same facila en ĉiuj niveloj de lingvokono. Se oni proksimume dividus la lingvonivelojn je a) baza (nepre necesa por ĉiu uzo kaj suficha en baza turisma senco) - A-1

b) flua (flua parolado je nivelo B1, c) bonega literatura kono (kapablo paroli kaj prelegi pri fakaj temoj, uzi la lingvon en ĉiuj situacioj skribe kaj parole (C-2) kaj d) perfekta ; tiam estas klare ke ju pli malalta nivelo des pli granda estas la diferenco inter tempo necesa por atingi tiun nivelon en Esperanto kaj iu nacia lingvo. Precizaj esploroj pri tio ne ekzistas, sed lau miaj praktikaj scioj (mi instruis E-on en prekaŭ 200 kursoj) mi dirus ke la diferenco je baza nivelo por lernantoj kies gapatra estas hindeuropa lingvo estas inter dek- kaj dudekobla kompare kun lernado de la sama nivelo de iu ajn alia hindeuropa nacia lingvo. En dua nivelo de flua kono, la diferenco estas maksimume 5-6-obla, en tria nivelo de bonega kono la diferenco estas nur duobla kaj en la lasta nivelo (perfekta kono) ne ekzistas diferenco, ĉar E- same kiel aliaj lingvoj estas viva lingvo kiu daŭre evoluas kaj simple ne havas finon, do ne eblas lerni ĝin perfekte samkiel ne eblas lerni iun ajn lingvon perfekte.

Do, kiam oni parolas pri la avantaĝo de E rilate facilecon kaj propedeutikan valoron, oni konsideru ke tio validas por la plej baza lingvo-kono. Sed kio estas la plej baza lingvo-kono? En tio la esperantistaro tute ne havas veran konscion kaj lernolibroj por komencantoj ege varias. Iuj (maloftaj) klopodas doni al la lernantoj sciojn limigitajn al kelkcent vortoj kaj la plej necesa gramatiko (ne la tuta) kaj multe pli da ili klopodas en libroj por komencantoj enmeti materialojn kiuj efektice tendencas al la dua lingvonivelo (kun mil au pli da vortoj kaj detala gramatiko). Tiuj lernolibroj malstimulas la lernantojn (aparte la junajn) lerni, ĉar ili tute ne spertas rapidan progreson kaj ne sukcesas rapide lerni - eĉ kontraŭe.

En pedagogio gravas ke la lernantoj estu motivitaj per rapida lernsukceso, kiel vi ja mem konstatis, sed tio estas malofta en E-kursoj. Por atingi la celon (kiel ekz. che EKPAROLI), nome ĝojon pro rapida lernsukceso, nepras instrui amplekson de kono lau la zagrebmetoda rekomendo, uzante nur ĉirkaŭ 500 morfemojn (la plej ofte uzatajn - vidu mian studon: <http://miresperanto.com/biblioteko/tishlar/15.htm>) kio inkluzivas ankaŭ instruon de la ne-kompleta gramatiko koncentriĝante al praktika parolekzercado pli ol al iu teoria instruado.

Pli pri tio en mia blogo en ipernity <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko>

Tie interalie ankau pri la faktoroj de diversaj aghoj de lernantoj, grupgrandecoj kaj chefe antaŭaj spertoj pri lernado kiuj esence antaŭkondichigas la motivojn de lernantoj)

Amike

Zlatko Tišljar

Instruado: Agnosko de la diplomoj

Kore mi dankas por Via letero kaj la senditaj diplomverkoj. Jes mi tre bone konas Viajn studentojn, kiuj obstine studis, finis sukcese, ricevis AIS- diplomojn, sed bedaŭrinde la AIS- diplomoj, malgraŭ ke la studado estas altnivela, ne estas agnoskeblaj en ĉiuj ŝtatoj! Ankau en Bulgario AIS- diplomoj ne estas agnoskeblaj, sed por niaj studentoj mi sukcesis organizi, ke la studado estas samtempe surbaze de la studadprogramo en la ŝtata universitato kaj AIS- studadprogramo kaj rajtas instrui surbaze de la ŝtata studadprogramo nur universitataj profesoroj kun kiuj ni havas subskribitan kontrakton. Tiamaniere la studentoj senprobleme daŭras post la unua aŭ dua jaro aŭ post la tria/kiam ricevas ankau AIS- diplomon /en la ŝtata universitato kaj ricevas la bulgaran ŝtatan diplomon.

Surbaze de la speciala regularo de Ministerio de Edukado en la ŝtataj universitatoj dum la unua jaro la eksterlanda studento studas nur bulgaran lingvon. Post la sukcesa ekzameno pri bulgara lingvo povus daŭrigi la studadon en dua kurso, kiam ĉiuj studadobjektoj estas bulgare instruotaj. La studadkotizo por la eksterlanda studento, loganta en lando, kiu ne estas en EU estas 2800-3000 euroj por la unua jaro, kiam oni studos nur bulgaran lingvon! Surbaze de nia regularo la studadkotizo estas nur 500 euroj jare! Surbaze de interkonsento kun rektoro de universitato kun kiu ni kunlaboras, se la studonto sukcesos ĉe ni eklerni bone bulgaran lingvon povus senprobleme daŭri en tiu ŝtata universitato. Tiamaniere la studento ŝparos minimume 2300 eurojn!

Eble post 1-2 jarojn ni ricevos rajton doni oficialajn bulgarajn diplomojn, sed ni devas unue konstrui propran uniuersitatan konstruaĵon surbaze de la bulgara legaro. Mi acetiŝ teron, jam estas preta la arkitektura projekto, sed mankas mono! Nun surbaze de la bulgara legaro ni ricevis oficialan licencon pri la antaŭbakalaura studado-Kiel Internacia E-Centro por profesia edukado. Surbaze de tiu licenco ni rajtas oficiale senprobleme inviti eksterlandajn studentojn, kiuj komencos ĉe ni la studadon. Dum la unua jaro obstine studos bulgaran lingvon kaj Esperanton, La duan jaron senprobleme povus daŭrigi ĉe ni aŭ post la sukcesa ekzameno pri bulgara lingvo daŭrigi en ŝtata universitato aŭ samtempe ĉe

ni kaj en bulgara Universitato/ tiam la studento ricevos unue AIS-diplomon kaj poste bulgaran diplomon/

Do ,nun mi povus proporni al niaj geamikoj,kiuj havas bakalau^ran AIS- diplomon ,se ili dezirus povus veni en Karlovo por unu jaro studonte bulgaran lingvon kaj poste dau^ri en st^ata universitato.Signe de mia amika rilato al Vi kaj miaj albanaj geamikoj ili uzos 20 %-an rabaton- do la studado kostos por ili nur 400 eurojn kaj tiamanire ,se poste deziras dau^ri en s^ata universitato s^paros por la la studado de Bulgara lingvo minmume 2400 eurojn !

Aldone mi sendas al Vi Informilon pri la studado en IUK kun peto inviti albanajn gejunulojn studi en Karlovo.Por la novaj studentoj, ,kiuj ne havas bakalau^rajn AIS- diplomojn,se dezirus post la unia jaro dau^ri en IUK mi certigos la ricevon de la diplomon siatempe,c^ar mi mem akceptos esti ilia gvidanto de la bakalau^ra diplomverko.Se iuj ne dezirus AIS- diplomojn-povus post LA UNUA JARO DAU^RI EN BULGARA UNIVERSITATO.La studado por la albanoj estos 400 euroj por unu jaro !

Mi estos tre dankema al Vi ,se Vi povus publikigi la informilon en Via Bulteno.

Ankau^ mi sendas al Vi la informilon pri la Festivalo.Mi invitas Vin kaj albanajn geamikojn partopreni.Vi estos mia karega gasto kaj pagos nenion pri Via restado en Karlovo ! Signe de mia amika rilato al niaj albanaj geamikoj ,c^iuj albanoj kiuj deziras partopreni la Fetivalon NE PAGOS ALIG^KOTIZON kaj uzos studentan rabaton tranoktonte en la komuna log^ejo po 5 euroj por unu tranokto !Mi estos tre dankema al Vi ,se Vi povus publikigi ankau^ la informilon pri la festivalo en Via Bulteno.

Kun plej koraj salutoj atendante Vin en Karlovo
Restas amike Via
Bojidar

Novaj redaktoroj

Ekde 2014 la revuo Esperanto havas novan redaktoron Fabricio Valle. Kontribuadojn por sekvaj numeroj de la revuo kaj mesaĝojn por la nova redaktoro bonvolu adresi al: redakcio@revuoesperanto.org Re: Fwd: informieto albana

Same la revuo Juna Amiko ekde decembro havas sian novan redaktoron s-ron Stano Mrček

Rita Permeti

Ni dankas

- -S-ron Edmond Ludwig kiu regule sendas al ni la revuon La Informilo de la Orientfranca Esperantista Asocio. Same li donacis du ekzemplerojn de libro kun poeziaĵoj el la elzasa aŭtoro tradukite en Esperanto far li.
- Ni dankas ILEI-n por la regula sendado de kelkaj ekzempleroj de la revuo Juna Amiko

Sajmir Beqiraj

Ni solidariĝas

Al

Hiroŝima Esperanto Centro

OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp

Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio

De

Dr. Engjell Gusho, endokrinologo, komitatano de UEA por Albanio, pensiulo 70 jara el la urbo Korĉa

Saluton

Solidarece kaj respekte al la iniciativo de la membroj de via klubo, mi juĝas pravan kaj valoran vian kampanjon, sekve mi ne povas indiferenti kaj ne respondi al tio kune kun vi.

Estas jam vaste konate la sekvaĵoj el la domaĝoj kaŭzita al Japanio kaj ne nur al ĝi, pro la nukleaj armiloj kaj energio, je celoj malicaj sed ankaŭ la kontinuaj minacoj faritaj de la diversaj ŝtatoj kaj ekstremistaj cirkloj al la homaro, paco kaj prospero de la diversaj popoloj, sed ankaŭ la diversaj eventualaj difektoj en la nukleaj kompleksoj pro naturaj kialoj aŭ homaj eraroj. Menciindas la kazo de Ĉernobilo en la eksa Sovetunio kaj laste en Fukuŝimo en Japanio. En ĉi tiuj kazoj mi tute subtenas vin kaj kune kun mi ankaŭ ĉiuj patrinoj kaj fratinoj kie ajn ĉe ni en Albanio.

Kiel kuracisto endokrinologo, kiel intelektulo, mi bone scias kaj taksas la valoron de la uzado de la nuklea energio en la diagnostikado kaj kuracado de multaj malsanoj. Mi estimas la sciencajn atingojn en la uzado de ĉi tiu energio je pacaj celoj, serve al la plialtiĝo de la bonfarto kaj malaperigo de la malsato enmonde.

Ĉi tiu solidareca mesaĝo servu al via kampanjo, je mia nomo kaj je la nomo de ĉiuj membroj de la albanaj esperantistoj, por plifortigo de la amikeco inter la albana popolo kaj la granda japana popolo.

Korege kaj amkece,
Engjell Gusho,
kuracisto endokrinologo- diabetologo
Korĉa Albanio



El niaj leteroj

- Tre kara amiko
Mi pardonpetas pro la malfrua reago. Dum la lastaj tagoj ni multe laboris cele al partopreno de Legio de Bona Volo en la Ĉijara Brazila E-Kongreso, kiu okazos ekde la 24-a Januaro en la urbo Florianópolis, en la suda regiono de Brazilo.

Ni tutkore dankas Vin pro sendo de via riĉenhava bulteno, en kiu aperas la artikolo *Homaj Rajtoj kaj Spiritaj Devoj*, verkita de Paiva Netto, kaj pro dankletero de la estraro de LBV al Vi, okaze de la 24a fonddatreveno de la Templo de Bona Volo.

Ni prezentas nian dankon per la jena eldiro de la prezidanto-predikanto de la Religio de Dio, José de Paiva Netto:

“Ĉiu tago estas oportuna tago por renovigo de nia destino. Tamen, estas nepre necese ne kredi pri nesupereblaj malfacilaĵoj kaj neniam malvigliĝi ĉe Bonfarado”.

Kun estimo kaj fratamikaj salutoj

Maria Aparecida

www.bonavolo.com

- Elkoran dankon, kara, pro la c'iam interesa Bulteno.

Frate vin salutas,

Celso

Eldonejo Lorenz

- Al : s-ro inĝ. **Shaban Hasani**

Prez. de **AEA**

Saluton Estimata Amiko el Havano !

Vi en via Asocio devas havi registron de viaj asocioj kaj, povas esti, oni eldonas ĉiujare asocian jarlibron kiel **UEA**, se tio veras, mi petas vin, laŭeble bonvolu donaci ekzempleron de via jarlibro por kontakti gesamideanojn vialandajn. Tiu informilo povas esti neĵusa, neaktualigita, ne gravas, ĝi povus esti de la jaroj: **2013, 2012, 2011, 2010** aŭ **2009**.

Mia adreso poŝta estas:

Juan Carlos Montero Medina

Apdo: 10056 zona postal: 10

CP: 11000 Habana-10 Cuba

Mi esperas ke vi iamaniere helpu min, salutante tutkore el Havano, via Huan Karlos

"Paroli fremdan lingvon estas rompi landlimon. Paroli multajn estas rompi plurajn. Paroli Esperanton estas voli rompi samtempe ĉiujn".

Afonso Romano de Sant'Anna, elstara, fama brazila verkisto kaj poeto, amiko de Esperanto

KEA 35-jara: preta por novaj defioj
Juan Carlos Montero Medina, **KEA**-aktivulo
juancarlos@esperanto.co.cu

- Koran dankon.

Kore,

Pirlot Germain

- Kara,
mi bonorde kaj danke ĉiam ricevas la tre interesan bultenon de via Instituto. Mi ricevas ĝin kiel aldonaĵon en formato pdf. De pluro mi mem ekstraktas, eventuale remuldas kaj distribuas al du gazetaraj agentejoj italaj ligitaj al esperanto. La agentejo de la Itala E-federacio dezirus scii ĉu la bulteno estas rekte atingebla ankau rete, por povi meti la kunligon en siajn artikolojn; se ne, alternative ĉu vi povus sendi rekte ankaŭ al la du supraj adresoj la aldonaĵon en formato pdf, tiel ke aŭ ili mem ekstraktas aŭ ili povas kontroli/adapti miajn ekstraktojn.
mi dankas vin kaj proponas al via instituto kunlaborado. Mi estas preta publikigi novaĵojn kaj pliprofundiĝojn esperantlingve pri albania kulturo kaj vivo, itallingve pri landa esperanto-movado kaj pri lingva diverseco.
Samideane,
Massimo Ripani

Ufficio Stampa - Federazione Esperantista Italiana <stampa@esperanto.it>
stampa@esperanto.it
monia.chimienti@eraonlus.org

- Saluton! Mi volas esprimi mian dankon pro sendo de via bulteno, tre interesa kaj tre instrua por ni, brazilanoj, kiuj ankoraŭ ne havas multajn sciojn pri Albanio. Mi legis kun intereso kaj deziras al vi, Bonegan Kristnaskon kaj Progresan Jaron de 2014!
Sane kaj pace
Elma do Nascimento (Rio de Janeiro, BR)
Elma do Nascimento <florelna@estadao.com.br>
- Dankon pro la Bulteno, kara.
Evandro
Evandro Caboclo <cabocloe@yahoo.com.br>

- Koran dankon kara Bardhyl.

Vian bultenon mi ĉiam legas kun granda plezuro.
Interesas min ĉiam la rakontoj de niaj kolegoj esperantistoj.
Speciale iliaj travivaĵoj en via belega lando.
Se temas pri mia sanstato ĝi estas pli-malpli bona.
Mi pensis eĉ veni al Bialistoko por Zamenhofa-festo kaj renkonti tie Ela kaj Tomek kaj aliajn konatulojn. Sed probable mi ne venos tie pro la aliaj invitoj al Z-festo pli proksime.
Mi scias, ke ankaŭ Tomek ne venos pro la malsano.
Oni informis min, ke li de kelka tempo malsanas je koksoj kaj ostoj.
Mi salutas vin kaj ĉiujn albanajn gekolegojn
Amike - Stanislavo

- Karaj amikoj,
Al vi ĉiuj kaj precipe al AIS-studentoj en Bydgoszcz elkorajn salutojn kaj bondezirojn
okaze de Kristnaska Festo kaj Nova Jaro.
Amike Alicja Lewanderska
- Tre kara amiko

Hodiaŭ, Internacia Tago de Homaj Rajtoj, kun speciala kaj ega danko, mi Vin sciigas, ke mi jam sendis al la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, vian allogan kaj riĉenhavan Bultenon, en kiu aperas lia artikolo *Homaj Rajtoj kaj Spiritaj Devoj*.

Mi ankaŭ dankas Vin pro aperigo de la dankmesaĝo de Legio de Bona Volo pro sendo de viaj salutvortoj omaĝe al la 24-jariĝo de la Templo de Bona Volo.

Ricevu en via koro la jenan penson de la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto:

"La Elito de Lando estas ĝia popolo".

Kun frata amikeco kaj bondezire, el la centra sidejo de Legio de Bona Volo en San-Paŭlo, Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

Tre estimata

Koran dankon pro via ĉiam afabla reago!

Kiel danko, jen al via koro la suba eldiro de la edukanto Paiva Netto:

"Stabileco en la mondo komenciĝas ĉe infana koro. Pro tio, en LBV, de multaj jaroj, ni uzas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano".

Plej bondezire kaj salute,

Maria Aparecida

www.bonavolo.com

- Saluton !

Tagmeze telefonis al mi Tomasz. Jam li havas interesajn novaĵojn pri eldonado de traduko el la jida lingvo.

Mi ĝojas, ke la de vi elektitaj aŭtoroj rikoltas tiomajn sukcesojn ! Mi despli kuraĝe plutradukas.

Per la poŝto mi sendas al vi etan broŝureton eldonitan okaze de la morgaŭ en Mulhouse okazonta Zamenhoffesto kun partoprenantoj el Svisio, Germanio, Elzaso kaj juna gasto, TEJO-ano el Brazilo.

Alia plezuro estas la tre verŝajna prezento de poemo de Carlo (Karlo) BOURLET kun muziko de F. de Ménil okaze de la UK 2015 en Lille.

Krom tio : hodiaŭ, kiel ĉiutage, henriette kaj mi marŝadis dum 1,5 horo en la montaro. La veturilo indikis 14 gradojn sub belega suno. Poste, hejme, ĝi indikis 0 °C en la nebulo !!!!

Agrablis la promenado.

Kristnaske vizitos nin nia filino, kiu sukcesis preni du pliajn tagojn da ferioj, ĉar en Francio

(krom en Elzaso/Mozelo) Kristnasko alportas nur unu ferian tagon, dum ĉe ni ni havas du tiajn !!!

Fartu bone ĉiuj vi ! Agrablan restadon kun viaj gefiloj. Mi esperas, ke via patrino daŭre bonfartas.

Kun plej amikaj salutoj !Edmond LUDWIG

- Kara,
dankon pro la sendo de via bulteno.kelkajn artikolojn mi jam legis
pliafoje mi havas pri ĝi nur unu problemon; abundas interesaj temoj kaj mi trovu
tempon por legi ĉiujn.
kore
agnes

- **Al vi kaj al via familio mi bondeziras**

FELIĈAN NOVJARON !!!

Felix sit annus novus

Gëzuar vitin e ri
Ein gutes neues Jahr
Happy new year

عام سعيد
Shnorhavor nor tari
Urte berri on

Ath bhliain faoi mhaise
Bloavezh mat
Mbúla ya sika elámu na tombelí yǒ
Bon any nou
新年快乐

Sretna nova godina
새해 복 많이 받으세요

Sretna nova godina
Godt nytår

Heri ya mwaka mpya

Feliz año nuevo

Gelukkig Nieuwjaar

שנה טובה

Boldog új évet

Farsælt komandi ár

Felice anno nuovo

あけまして おめでとう ございます

Arahaba tratry ny taona

Godt nyttår

Bona annada

Szczęśliwego nowego roku

Feliz ano novo

Mvhura zompe zongwa

С НОВЫМ ГОДОМ
Šťastný nový rok
Dewenati
Srečno novo leto
Gott nytt år
Yeni yiliniz kutlu olsun
Cung Chúc Tân Niên

Germain Pirlot

- Multan dankon pro via bulteno. Mi legos ĝin.

Alfredo Portillo
Mérida - Venezuelo

>

- Karaj albanaj geamikoj
tradicie okaze de Kristnasko kaj la Nova Jaro homoj sendas bondezirojn. Nome de bjalistoka
esperantistaro, dankante pro viaj kristnaskaj mesaĝoj, ankaŭ mi deziras al vi ĉiuj sanon, ĉar ĉion alian
vi jam havas eĉ ne sciante tion.
Permesu, ke kiel kristnaskan donacon mi aldonos mian maltipan, ege ŝatatan de mi, preĝon esperante,
ke ĝi alplaĉos vin kaj ke vi legante ĝin pensos pri nia forta verda amikeco.

Dio, Vi scias plej bone ke mi maljunas kaj venos la tago kiam mi estos maljuna. Gardu min
de pereiga kutimo de pensado, ke mi devas diri ion je ĉiu temo kaj je ĉiu okazo. Forprenu de
mi volon korektadi ĉies vojon. Igu min serioza, sed ne malĝoja; aganta sed ne sin trudanta.

Mi bedaŭras ne ekuzi grandajn saĝampleksojn kiujn jam mi posedas sed Vi Sinjoro
scias, ke mi dezirus gardi ĝis la fino kelkajn amikojn.

Liberigu mian intelekton de senfina okupado pri detaloj kaj donu al mi flugilojn por ke
mi momente transiru al temo.


Fermu mian buŝon se mi dezirus rakonti pri miaj malfortoj kaj doloroj kvankam ke ili
kreskas kaj mia deziro de ilia nombrado fariĝas dum tempopaso ĉiam pli dolĉa.

Mi ne petas Vin havi favoron ĝuadi per rakontoj pri doloroj de aliaj sed donu al mi,
Sinjoro, paciencon aŭskulti ilin.

Mi ne estas sufiĉe kuraĝa peti Vin, Sinjoro, pri pli bona memoro sed mi petas Vin: donu
al mi pli grandan humilecon kaj malpli da certeco kiam miaj rememoroj ŝajnas kontraŭaj al la
aliaj. Permesu al mi pensi ke de tempo al tempo mi povas erari. Faru min esti agrabla por
homoj kvankam kun kelkaj el ili ne estas facile kunvivi.

Mi ne deziras esti sankta sed sarkazmaj maljunuloj estas unu el la plej atingaj sukcesoj
de satano.

Donacu al mi la kapablon rimarki bonajn flankojn en tute neatenditaj lokoj kaj
neatenditajn valorojn en aliaj homoj. Donu al mi Sinjoro favoron de parolado al ili pri tio.



Gajan Kristnaskon
kaj feliĉan Novjaron
deziras al ĉiuj
Bjalistoka Esperanto-Societo



- Feliĉan Kristnaskon al ĉiuj karavelanoj! Kaj Novjaron plena je sukcesoj kaj realigoj!

Brakume via,
Fernando Pita
Rio de Janeiro, Brazil

- *Mi deziras al vi ĝojan, kontemplan kaj pacan*

Kristnaskon

kaj nurajn sanon, feliĉon kaj

prosperon dum la jaro

2014.

Ke vi sukcesu en la defioj de la nova jaro!

Ronaldo

- Ne tro ambiciu.

Malpli da posedo, malpli da tedo - asertas popola proverbo.

Troa ambicio frenezigas, se ĝi jam ne malfeliĉigis.

Batalu por akiri la necesajojn, disdonante tion, kio al vi abundas, kaj mankas al aliaj.

FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVAJARON!

Eldonejo Lorenz

- Grandegan dankon pro viaj novjaraj bondezoj kiujn ni kore reciprokas.

Gratulojn pro la alta kaj eleganta kristnaskarbo en Tirana! Kaj plachas al mi la varbilo por la albana biero. Certe tiu chi biero estas ankau bongusta, chu ne?

Amikajn salutojn,

Vittorio kaj Luigia Madella

- NOVA JARO,

NOVAJ ESPEROJ.

Por mondo Paca
Por pli da Solidareco
Por nia Lingvo Justa
Ni daŭre batalos.

Jocelyne

- **Michael Boris Mandirola**

Feliĉan novan jaron da paco, sano kaj sukcesa agado!

Michael Boris MANDIROLA

E-mail: michaelboris@gmail.com

Tel: (IT) +393207290648

Skype: michaelboris

- Gézuar Viti e Ri!
Jes, mi deziras al vi kaj al via familio Bonan Novan Jaron!
Pli volonte mi chi tie respondas vian mesaghon en facebook.
Post terura jaro nun estas nova, espereble pli bona. La 14an estos unu jaro post la neatendita morto de Karl-Gustaf.

Vi demandis ankau pri mia filino, chu. Nu, mi ja havas 3 filinojn, unu filon, 3 bofilojn, unu bofilinon kaj 8 genepojn.
Karl-Gustaf havas filinon, bofilon, 2 nepojn kun amikinojn.

Mi laboras mem pri la albana. Mi pensas, ke la du viroj, kiuj partoprenis la kurson kune kun mi, opinias, ke la lingvo estas tro malfacila, sed mi ne certas. Chiuokaze mi ankoraŭ neniam audis pri daurigo de la kurso.

Kiel mi faras? Jes, mi havas la lernolibron, viajn tekstojn, vortlistojn, ktp. Fine mi povas auskulti la 2 dvd-diskojn kiuj akompanis la libron. La instrukcioj estas en la angla, kaj oni terure rapide diras la numerojn de la ekzercojn kaj la partojn, kiujn oni legas en la albana. Sed nuntempe mi facile trovas la chapitrojn de la libro. Estas ege malfacile memori la albanajn vortojn pro ilia malsamileco kun la sveda kaj esperanto au aliaj lingvoj, kiujn mi konas.
Krome mi devas fari propran gramatikon por kunigi gramatikajhojn, ekzemple kiam mi trovas verbon, mi iom post iom devas enmeti la fleksian formon de tiu verbo en mian propran "gramatikon"! Ĉar la albanaj formoj ofte estas tiel strangaj, ekzemple fle, flija, fjeta fjetur; ha, héngra, ngréne etc. Kelkfoje mi laboras pri viaj albanaj-esperantaj vortaroj.
Eble mi skribis, ke mi aĉetis albanan Biblion? Do, mi povas kompari kun la sveda, esperanta kaj aliaj. Sed, iom strange, la albana traduko diferencas de la aliaj (sveda, esperanto, ktp.)

Ankoraŭ ni ne havas vintron, sed la veterraportoj diras, ke je la fino de tiu semajno estos pli malvarma vetero. Nun la tagoj estas tristaj, plovaj kaj malhelaj.

Korajn salutojn, Birgiita

- En la revuo Esperanto oktobro 2013 N-ro1273 f.198-- mi legis :-U E A diplomis 12 elstarajn agantojn.
Diplomo pri Elstara Agado:=Bardhyl Selimi(Albanio)pro lia rolo en la plifortigo de la albana Esperanta-movadoen la Solena Fermo de la 98a UK en Rejkjaviko.
(Me merite te merituar edhe nga ana ime por qe e morra vesh me vonese .)
Amike ENGJELLI.

Anoncoj

Printempa Esperanto Kunveno 2014

aliĝu, venu, ĝuu!
21-22-23 marto 2014
Protestanta Centro en Amougies

Por kiuj? Por Vi!

La renkontiĝo celas ĉiujn: infanojn, junulojn, plenkreskulojn, komencantojn, fluparolantojn...

Programo

Okazos esperanto-kursoj kun pluraj niveloj. Sed ne nur! Ni ankaŭ proponos al vi koncerton, promenadojn, ekskursojn, prelegojn, manlaboradon por infanoj, libroservon... Kiel vi vidas ni ambicias ampleksan kaj mojosan programon.



Jen skiza programo (pli da informoj alvenos).

Vendredon, la 21an de marto

Bonvenigo ekde la 17a horo
Vespermanĝo je la 18a horo
Interkona vespero, filmejo...

Sabaton, la 22an de marto

Dimanĉon, la 23an de marto

Kie?

Adreso : [Centre Protestant d'Amougies](#) - Alklaku la ligilon supre aŭ la bildo.
Ni kunvenos en la Protestanta Centro d'Amougies apud Ronse/Renaix.

Centre Protestant d'Amougies
Verte Voie, 16
7750 Amougies
Belgujo

Kiel atingi tiun belan lokon?

Ni helpos vin facilege atingi nian kongresejon!
La plej proksima stacidomo estas Ronse/Renaix.

Kotizo

Por plentempa partoprenado

Aliĝo ĝis la	15a de februaro	15a de marto	poste kaj surloke
Bebo	senpaga		
ĝis 18 jaroj	75€		
ekde 18 jaroj	99€*	120€*	150€*

(aĝo je la komenco de la kunveno)

* inkluzivante rabaton de 10€ por membroj de iu belga asocio kaj eksterlandanoj

La kotizo **inkluzivas** preskaŭ ĉion: la manĝojn, la tranoktadojn kaj la programon kun ekskursoj kaj koncerto. Krom akvo kaj kafo, la trinkaĵoj estas pagitaj aparte.

La baza tarifo validas por komuna ĉambro. La duŝoj kaj necesejoj estas trans la koridoro. Eblas elekti dultajn ĉambrojn. La aldono estas po 20€ por persono.

Rabato por kontribuantoj kaj helpantoj laŭ interkonsento.

Aliaj kazoj? Kontaktu Valère por interkonsento!

La aliĝo validas nur post nia konfirmo.

Por parta partoprenado

Vendredo - vespermanĝo kaj programo	20€
Sabato - tagmanĝo, vespermanĝo kaj programo	50€
Dimanĉo - tagmanĝo, programo kaj ekskurso	50€
Tranoktado kun matenmanĝo kaj littukoj	25€

Aldono por dulta ĉambro: po 20€ por persono.

Pago ĉe:

Association Pour l'Espéranto

rue des Grogères 81

6001 Marcinelle

Belgujo

IBAN : BE72 000 3258537 16

BIC : BPOTBEB1

Kiuj jam aliĝis

1. **Valère** Doumont el Sambreville
2. **Jean-Pol** Sparenberg el Lobbes

Kiel aliĝi?

Plenigu la suban demandaron aŭ kontaktu Valère:

Doumont Valère

rue de Velaine, 114/4

5060 Sambreville

+32 (0)485 517 552

doumontvalere@yahoo.fr

ALIĜILO

Aŭ Alklaku la bildon por fari rekte vian aliĝon



Programo 2014 de la franca Esperanto-kastelo Greziljono

2014-apr-19/26: FRINGOJ, renkonto inter grupoj de esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

2014-apr-26/maj-04: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1.

Rete: gresillon.org/printempo

2014-maj-08/11: Kantado de korusaro Interkant'

2014-maj-11/17: Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono.

Rete: gresillon.org/s1

2014-jun-29/jul-06: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete: gresillon.org/s2

2014-aŭg-01/09: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso.

Rete: gresillon.org/s3

2014-aŭg-09/17: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto.

Rete: gresillon.org/s4

2014-okt-24/nov-01: AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

Adreso: MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France

Telefono: 02.41.89.10.34

Retpoŝto: kastelo@gresillon.org

Retejo: gresillon.org





**IV-a INTERNACIA FESTIVALO DE E-KANTO, RECITADO, ORATORA KONKURSO
04 - 06.04.2014 KARLOVO BULGARIO**

ORGANIZANTOJ : AIS Bulgario, EDE- Bulgario, Internacia Universitato Karlovo
Regiona komitato de kulturo-Karlovo, Regiona Estraro de Scienc-teknika Asocio

ALTA PROTEKTANTO : D-ro Emil Kabaivanov- Urbestro de Karlovo

KATEGORIOJ por la festivala konkurso :

- I -a grupo- infanoj ĝis 12 jaraĝaj -
- II- a grupo- gelernatoj ĝis 18 jaraĝaj
- III-a grupo gestudentoj kaj gejunuloj ĝis 35 jaraĝaj
- IV-a grupo aĝuloj 36-50 jaraĝaj
- V-a grupo pli aĝaj ol 50 jaraĝaj

En ĉiu grupo aparte estos distribuo de la premioj por individua kaj grupa partopreno/koruso/

TEMOJ por la ORATORA KONKURSO :

ESPERANTO-la plej bona solvo de la problemo pri internacia lingvo

ESPERANTO kaj la EŬROPA UNIO

ESPERANTO kiel rimedo por la interrilato de la homoj

ESPERANTO en la literaturo kaj poezio

LA TRADUKADO el nacia lingvo en Esperanton kaj male

ESPERANTO kiel familia lingvo

ESPERANTO en INTERRETO

ESPERANTO en la hodiaŭa tutgloba mondo

ESPERANTO-la lingvo de la estonta Eŭropo

KIO estas por mi ESPERANTO ?

TRANOKTADO: en komuna loĝejo- po 7 euroj por unu tranokto

en hoteloj 20-50 euroj por unu tranokto

ALIĜKOTIZO 5 euroj por la partoprenontoj festivalan programon /por gelernantoj kaj gestudentoj la aliĝkotizo estas 2 euroj/

10 euroj por gastoj

INTERKONA VESPERO KUN VESPERMANĜO en restoracio/4.4.2014/- 10 euroj

ADIAŬA VESPERO KUN VESPERMANĜO en restoracio/5.4.2014/- 15 euroj

TAGMANĜOJ- po 5 euroj

POSTFESTIVALA FERIADO "KARLOVA PRINTEMPO"/6-14.04.2014/

Ripozado kaj ekskursoj al diversaj proksimaj de Karlovo urboj/Plovdiv Kalofer.Kazanlak Bac^kova monakejo,Trojan k.a/Sen aparta aliĝkotizo .Tranoktado en komuna loĝejo kaj hoteloj / Rimarko

:partoprenontoj la Festivalon kaj la Ferialon kiuj tranoktos en la komuna loĝejo uzos rabaton pagonte 50 eurojn por la tuta tranoktado- 10 tranoktoj/

LIMDATO POR RICEVO DE ALIĜILOJ- 30.03.2013 /La aliĝkotizoj ,kotizoj por la tranoktoj en la komuna loĝejo,vespermanĝoj estas pageblaj al bankokonto aŭ surloke, sed la aliĝiloj devus esti siatempe senditaj por rezervi la tranoktojn/

INVITILETEROJ por bezonotaj bulgaraj vizitoj – kontaktu tuj kun la Organiza komitato

ADRESO POR ALIĜO KAJ INFORMOJ :Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM

Retadreso : E-mail: leonov@rozabg.com /preferinde skribu rete /

Telefonoj : [+359 885056469](tel:+359885056469) /tage kaj nokte/ [+359 335 9-39-33](tel:+35933593933) kaj [+359 335 5-50-50](tel:+35933555050)/nur vespere/

Numero de la bankokonto :

UNICREDIT BULBANK
7 Sv. Nedelia Sq. 1000 Sofia , Bulgaria
SWIFT BIC CODE UNCRBGSF
IBAN BG 12 UNCR 9660 4422 0221 08
Prof. Bojidar Stefanov Leonov
/por la Festivalo/

RIMARKO :La aliĝkotizo,kostoj por la nutrado kaj tranoktado en komuna loĝejo povus esti pageblaj ankaŭ surloke, sed la aliĝiloj devus esti senditaj ĝis 30.03.2014

ALIĜILO

Nomo.....Telefono.....

Adreso.....Naskiĝtago.....

Mi partoprenos la Festivalan programon per kanto JES/NE recitado JES/NE
oratoran konkurson JES/NE

Mi deziras tranokti en komuna loĝejo JES/NE
hotelo JES/NE /la tranoktoj en la hotelo devus esti antaŭpagitaj
sendonte la sumon al la bankokonto/

Mi deziras partopreni la interkonan vesperon kun vespermanĝo 4.4.2014 JES/NE

Mi deziras partopreni la Festivalan balon kun vespermanĝo 5.4.2014 JES/NE

Mi deziras tagmanĝi 4.4 JES / NE 5.4.JES/ NE 6.4. JES /NE 7.4/JES/NE

Mi estas vegetariano JES/NE

Mi deziras partopreni la Ferialon "Karlova printempo " JES/NE

.....2014 Subskribo

**SENDU LA ALIĜILOJN PREFERINDE TUJ AŬ ĜIS 30.03.2014 !
NI ATENDAS VIN EN KARLOVO !**

ESPERANTA LITERATURA KONKURSO

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Esperantan Literaturan Konkurson je la nomo de la eminenta bulgara esperantisto tradukisto "Ivan Krestanov". La konkurso estos por:

1.Traduko de bulgarlingva rakonto de nuntempa verkisto en Esperanton.

2. Eseo pri Ivan Krestanov aŭ pri la rolo de la tradukita Esperanta literaturo en la nuna mondo.

Bonvolu sendi viajn verkojn ĝis la fino de monato novembro 2014 al adreso: modest@abv.bg
La rezultoj estos anoncitaj en monato decembro 2014.

Elkorajn salutojn el Nepalo

Ni elkore deziras al vi, viaj familianoj kaj geamikoj, tutsanon, sukceson, prosperon kaj ĉiajn feliĉojn dum la tuta jaro 2014.

Unue mi estas ege dankema al vi ke vi favore tradukis miajn du frazojn (**1.** Ni elkore bonvenigas vin kaj viajn geamikojn al bela Nepalo. **2.** Esperanto estas vere tutmonda lingvo.) en viaj gepatraj lingvoj. La broŝuro enhavante diverslingvajn tradukojn por disdoni al turistoj vizitantaj belan Nepalon jam estas en presejo.

Due mi volas informi al vi ke mi kompilas la katalogon librforme nomata '**VERDAJ STELOJ SUPER EVERESTO**' pri la esperantistoj kiuj tempo al tempo vizitis Nepalon, grandioze kuraĝigis nepalajn esperantistojn kaj fortigis Nepalajn Esperanto-Movadon. **Bonvolu vidi la jenan**

ligilon: <https://www.dropbox.com/s/v3nyesphabt23vl/VERDAJ%20STELOJ%20SUPER%20EVERESTO.jpeg> **kio estas kovrilo de mia libro.** Do bonvole rete sendi al mi subajn detalojn kaj viajn ne forgesoblajn vojaĝimpresojn se vi iam vizitis Nepalon.

Nomo:

Naskiĝdato, loko kaj lando:

Jaro kiam vi vizitis Nepalon:

Via foto (35mm x 45mm grandeca kaj maksimume bonkvalite skanita):

Viaj memorindaj fotoj pri via vizito.(kvar fotoj):

Via loĝadreso (se vi volas eldoni):

Retadreso, skajp-adreso, fejsbukpaĝo, tt-paĝo kaj blogo:

Kontakt-telefon-numero:

Viaj vojaĝimpresoj (ĉirkaŭ 200 vortoj):

Se vi ankoraŭ ne vizitis Nepalon, ĝuu partopreni en la ege alloga **SPECIALA EKSKURSO 2014 EN NEPALO** aranĝita de Nepala Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA) dum marto ĉijare. Pli detale vi povas legi en nia hejmpaĝo www.esperanto.org.np kaj ligilo: <https://www.dropbox.com/s/iu3cc2fow5ztax/SPECIALA%20EKSKURSO%202014%20>

[EN%20NEPALO.%20PDF.pdf](#) . Bonvolu trans sendi mian ĉieteron ankaŭ al viaj amikoj por kio mi estos dankema al vi.

Bonvole akcepti miajn bondezirojn por vi kaj por viaj familianoj. Atendadnte vian afablan kaj tujan respondon.

Samideane via

Mian Salam SHANY

UEA kodo: mssy-b


Volontula Esperanto-Instruisto & Bibliotekisto

ĉe Nepala Esperanto-Asocio (aliĝinta al UEA)

Poŝtelefono: 00977 [9843460851](tel:009779843460851)

Retadreso: m.s.shany@gmail.com

Personaj Informoj

	Nomo : Mian Salam SHANY
	Naskiĝdato : 16-a de Februaro 1962
	Naskiĝloko : En riverborda urbo nomata Jhelum, Pakistano
	Kontaktadreso : Volontula Esperanto-Instruisto & Bibliotekisto, ĉe Nepala Esperanto-Asocio (NEspA), Kathmanduo, Nepalo.
	Poŝtelefono : 00977 98 43460851
	Retadreso : m.s.shany@gmail.com

Studoj & Profesioj

- Studis leĝon, ekonomion, librotrenadon ĉe la Universitato de Pungab
- Advokato pri Homaj Rajtoj ĉe Pakistana Konsilia Buroo, por Regiono Kaŝmir.
- Ĵurnalistino, raportadas pri la stato de Homaj Rajtoj en Sudaziaj landoj.
- Studis Araban, Japanan, Nepalan, Persan kaj Portugalan

Esperanto kaj mi

- Enkondukiĝis kaj eklernis Esperanton dum 1979 de neniam forgesbla S-ro. Muztar Abbasi, unua esperantisto en Pakistano kaj fondinto de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) aliĝinta al UEA.
- Estrarano de PakEsA por Internaciaj Rilatoj ekde 1980 ĝis 2007
- Prezidantiĝis de PakEsA dum 1990 ĝis 1992
- Vicprezidanto de PakEsA ekde 2007 por Regiono Kaŝmir.
- Redaktis la Popolajn Rakontojn el Pakistano
- Pilgrimis la CO-n de UEA, volontulis ĉe Dana Esperanto-Asocio kaj Portugala Esperanto-Asocio dum 1997
- Volontule Instruas Esperanton ĉe Nepala Esperanto-Asocio kaj aliaj lokoj en Nepalo ekde Majo 2013

VERDAJ STELOJ SUPER EVERESTO

Kompilita De: Mian Salam SHANY

Bonvenon al novaj tradukistoj

Vi legas ĉi tiun paĝon, ĉar vi ĵus konsentis aliĝi al la tradukprojekto LINGUA de Globa Voices (Tutmondaj Voĉoj) kiel volontula tradukisto. Koran dankon!

Ĉi tiu dokumento klarigos nian komunumon kaj celojn. Por teknika klarigo pri tio kiel afiŝi tradukojn, bonvolu atente legi la Tradukistan Gvidilon por Lingua.

Rilataj afiŝoj: Tradukista Gvidilo por Lingua [angle] [esperante]

Enhavo

1. Saluton, novaj tradukistoj!
2. Por komenci
3. Kion tradukistoj faras
 - 3.1 Tradukado el la angla al aliaj lingvoj
 - 3.2 Tradukado el unu lingvo krom la angla al la angla
 - 3.3 Tradukado el unu lingvo al alia (krom la angla)
4. Ensaluti
5. Tradukista Gvidilo por Lingua
6. Dissendolistoj
7. Esti parto de komunumo
8. Kion atendi
9. Kunsidoj de Global Voices

Saluton, novaj tradukistoj!

Estas kelkaj aferoj, kiujn vi devas scii antaŭ ol komenci. Ni ne havas oficejon, do ni aktivas virtuale. Kun pli ol 500 kontribuantoj, povas esti malfacile kompreni, kio okazas inter ni.

La plejparto de nia agado okazas ĉirkaŭ “Global Voices in English”, sed ni ĉiam pli ofte vidas la kreskon de la projekto Lingua. Ni havas pli ol 30 retejojn de GV, kiuj havas sian propran teamon de redaktoroj kaj tradukistoj. Kelkaj el tiuj retejoj ankaŭ komencis produkti originalan enhavon.

Aldone al ili, “Global Voices Advocacy” (Pledo de Tutmondaj Voĉoj) kaj “Rising Voices” (Leviĝantaj Voĉoj) funkcias kiel sendependaj projektoj: la unua por batali por la libereco de enreta opiniesprimado, kaj la dua por disvastigi civitanajn komunikilojn kaj enretigi pli da voĉoj.

Por komenci

Jen bazaj informoj, kiujn vi bezonas por kompreni, kio estas Global Voices.

Nia manifesto [angle] [esperante]

Pri ni [angle] [esperante]

Niaj redaktoroj [angle]

Niaj kontribuantoj [angle]

Kion tradukistoj faras

Via rolo de tradukisto estas havebligi tiujn interesajn konversaciojn, kiuj okazas en la blogsfero kaj civitanaj komunikiloj tutmonde, kaj kiujn raportas Global Voices.

Por konsiloj kaj sugestoj, kiuj helpas akordigi vian tradukon al la normoj de Global Voices pri stilo kaj formato, vidu la Stil-gvidilon de GV [angle].

Ni havas kelkajn apartajn grupojn de tradukistoj:

Tradukado el la angla al aliaj lingvoj

Vi ĉefe tradukos el la angla en vian gepatran lingvon, elektante unu el la afiŝoj ĉiutage haveblaj ĉe la retejo "Global Voices in English", kaj publikigante vian tradukon en unu el la multaj retejoj de Lingua.

***Okaze de Esperanto vi tradukos el la angla en Esperanton kaj publikigos vian tradukon en la retejo "Global Voices en Esperanto".

Tradukado el unu lingvo krom la angla al la angla

Vi ĉefe tradukos afiŝojn el unu el la multaj retejoj de Lingua en la anglan, kaj laboros en proksima kunlaboro kun la regionaj kaj lingvaj redaktoroj por trovi, kiuj afiŝoj estas haveblaj por tradukado. Viaj tradukoj aperos ĉe la retejo "Global Voices in English".

Tradukado el unu lingvo al alia (krom la angla)

Vi povas traduki el unu el la retejoj de Lingua en vian gepatran lingvon, sen la bezono uzi la anglan kiel pontlingvon. Vi koncentriĝos sur la afiŝoj originale skribitaj en unu retejo de Lingua kaj viaj tradukoj estos publikigitaj en alia retejo de Lingua.

***Okaze de Esperanto vi tradukos el unu el la retejoj de Lingua en Esperanton kaj viaj tradukoj estos publikigitaj en la retejo "Global Voices en Esperanto".

Ensaluti

Via redaktoro sendos al vi uzantonomon/pasvorton por Global Voices de via lingvo.

Via unua farenado estas redakti vian profilon, aldoni foton, kaj ŝanĝi vian pasvorton al io rememorebla por vi.

Tradukista Gvidilo por Lingua

Ni uzas la programon WordPress por publikigi kaj afiŝojn kaj tradukojn. Ĝi estas sufiĉe intuicia sistemo kaj vi povos lerni kiel uzi ĝin tre rapide.

Por detala klarigo pri tio, kiel aldoni afiŝojn kaj kiajn aferojn prizorgi, bonvolu legi la Tradukistan Gvidilon por Lingua.

Dissendolistoj

Tuj kiam via unua afiŝo estos publikigita, vi estos aldonita al du dissendlistoj de "Google groups".

La ĉefa grupo estas nomata la retroŝta grupo "GV-Authors". Ĉiuj membroj de Global Voices estas inkluzivitaj en la konversaciojn en la grupo "GV-Authors", kaj ni pridiskutas kaj redaktajn kaj organizajn aferojn tie.

Volontulaj tradukistoj estas membroj de la listo "Lingua-all", same kiel retej-redaktoroj, la teknika teamo, GV Core (direkta teamo) kaj aliaj en la komunumo de GV, kiuj interesiĝas pri Lingua.

Troviĝas ankaŭ la regiona retroŝtgrupo kun aliaj blogistoj el via propra regiono; laŭlingvaj grupoj por la projekto Lingua kaj kelkaj listoj uzataj nur por peti tradukojn.

Kiel videblas el la diagramo, troviĝas sennombraj konversacioj samtempe okazantaj. Kune, ni estas Global Voices.

[GV-Structure.jpg]

Esti parto de komunumo

Kiel ano de la GV-komunumo, vi helpas decidi, kio okazu al la retejo, kio estu nia pligravaĵo, kaj kio estu la estonteco de nia projekto. Sentu vin libera proponi viajn ideojn kaj raporti problemojn. Ni ankaŭ klopodas ligiĝi unu kun la alia per sociaj retejoj. La estraro de Global Voices havas ankaŭ du reprezentantojn elektitajn el la komunumo: unu por volontuloj, kaj la alia por la stabanoj.

Bonvenon al la familio!

Kion atendi

Estante tradukisto de Global Voices, vi povas sperti grandan kontenton, akiri multajn novajn amikojn, kaj eĉ gajni profesiajn ŝancojn, ĉar vi faros impresan vivprotokolon, dum vi helpos penvaloran aferon.

Ĉio en Global Voices estas publikigita sub la permesilo de Krea Komunaĵo, do estu preta vidi viajn plej bonajn tradukojn aperi ankaŭ en aliaj novaĵ-retejoj kaj blogoj.

Kunvenoj de Global Voices

Ĉiun unu jaron kaj duonon, proksimume, Global Voices okazigas Pintkunvenon (ĝis nun en Londono, Delhio, Budapeŝto, kaj Santiago), al kiu ni klopodas alvenigi kiel eble plej multajn kontribuantojn de Global Voices. Pasintece, ni povis inviti kelkajn el niaj plej aktivaj volontuloj vojaĝi al tiuj pintkunvenoj senkoste. Ni ĉiam strebos alvenigi laŭeble multajn homojn.

En aliaj okazoj, aŭtoroj kaj redaktoroj de Global Voices, kiuj loĝas en la sama urbo aŭ sur la sama kontinento sukcesas organizi siajn proprajn, malpli grandajn kunvenojn. Senĝene turnu vin al homoj en via propra regiono. Eble ankaŭ vi estos invitita al blogistaj eventoj aŭ konferencoj, kie vi renkontos aliajn kontribuantojn de Global Voices.

[Categories]:

[GV Guides]

[Lingua]

[GV Esperanto]

Artikoloj

Je la memoro de Mandela



La diversaj epokoj de la homaro estas atestintaj pri la forto de la homa libereco kiel triumfon al la nejusteco kaj sklaveco. Kredo je tio kondukis ja la mondon unu paŝon antaŭen al la evoluiĝo, donis sencon al la homa

vivo kaj evidentigis la principon ke la homo naskiĝas por esti libera kaj, kiel tia, li devas esti respektata kun siaj kompletaj rajtoj.

Ĉi tiu vidpunkto transformiĝis en kolonon kie sin apogas la justeco kaj homa digneco. Ĝi simboligis la serĉadon de la universala paco kaj servis kiel ideon por kontraŭbatali la perforton kaj diskriminacion.

Ĉiu popolo gardas fanatikece, en sia historio, la proprajn personecurojn plej elstarajn, proprajn militantojn kaj heroojn de la libereco. Sed la militantoj ne estas admirataj de ĉiuj! Tiuj, adorataj de sia popolo, eble estas la plej malamaj por la alia popolo. Tial, tiuj plej multe estimataj estas la militantoj kiuj agadis trans la limojn de siaj naciecoj, tiuj kiuj postlasis al la mondo kiel heredaĵon la humanismon kaj la pacon kaj hodiaŭ ili ĝuas la respekton de la tuta homaro.

Tia ja estis ankaŭ Nelson Mandela, la plej bona kaj eterna "ambasadoro" de la Sudafriko.

Naskita en eta vilaĝo sudafrika, Mandela estis sin espriminta iufoje "Mi ne naskiĝis malsatante por iĝi libera. Mi naskiĝis ja libera". La fideleco al tiu konvinko kostis tre kare al li, kiu pagis tre altan prezon por tio. Defendante siajn ideojn pri la liberecoj de la homo, li transformiĝis en severan kontraŭulon de aparteido, rasisma politiko de la blankula malplimulto, diskriminaciinta la kolorajn homojn.

Li sekvis vojon, kiu en la jaro 1964, kondukis lin trans la kradoj de tiu sistemo kaj forprenis de li 27 jarojn de la vivo. Sed li ne rezignaciis! Nur iom antaŭ ol oni kondami lin, Mandela sin esprimus "Dum la vivo, mi estas min dediĉinta al la milito de la afrika popolo. Mi estas militinta kontraŭ la blankulan dominantecon kaj estas militinta kontraŭ la nigrulan dominantecon. Mi estas subteninta la idealon de demokratia kaj libera socio, kie ĉiuj vivu kune harmonie kaj je egalaj eblecoj.

Tio estas la idealo por kiu mi esperas vivi kaj kiun atingi. Sed, se bezonate estas ankaŭ idealo por kiu mi pretas morti". Tia decidemo ne estingiĝis eĉ unu sekundon aŭ minuton dum ĉiuj tiuj 27 jaroj pasigitaj en la karcero. Ĉar li sciis ke li estis la simbolo de la justeco en la juĝproceso de la okupanto, reprezentanto de la la grandaj idealoj de la libereco, justeco kaj demokratieco en socio kiu estis malhonoriginta tiujn virtojn. Li komprenis ke tiam kaj tie, li povus daŭrigi militi, eĉ en la kastelo de la malamiko.

Trans tiu granda sinofero, la plej granda estimo al Mandela, komenciĝas je la jaro 1990, kiam oni liberigis lin disde la prizono. Raraj estas tiuj homoj kiuj havas koron tiom malavaran kaj noblan, por ke ili fermu la okulojn antaŭ la plej grandaj suferadoj travivitaj, por ke estu tiom humanismaj ankaŭ rilate al tiuj kiuj tion eble ne meritas. Kiel homon je grandaj valoroj, Mandela pardonis ĉiujn tiujn lin kondamnintaj kaj forŝtelintaj 27 jarojn de sia vivo. "Irante al la pordo kiu kondukus min al mia libero, mi bone sciis ke se mi ne lasus la koleron kaj malamon mian malantaŭe, mi ankoraŭ estus enprizonulo".

Tiel, Mandela faris tion kion malmultaj ja faras hodiaŭ! Kaj ĝuste tio igas lin unikan. Ĉar li plejbone montris al ĉiuj ke por krei liberan mondon, oni devas pardoni kaj rekonsiliĝi. Kaj tio transformis lin en mondan ikonon de la libereco, pardono kaj rekonsiliĝo. Kaj ĉio ĉi tio igis lin dignan por akiri la pacan Nobelon!

Tamen, kiom li sukcesis realigi sian idealan Afrikon, elirigi ĝin disde la konflikto kaj ĥaoso, pri tio li mem sin esprimus "Mi trairis longan vojon al la libero. Mi eraris dumvoje. Sed mi estas malkovrinte la sekreton ke, surprimpinte pinton, vi komprenas ke estas ankoraŭ aliaj pintoj por surgrimpi. Mi estas ripozinta dum momento, por forŝteli vidaĵojn el la gloro ĉirkaŭanta, por rigardi malantaŭen, en la distancon trapasitan. Sed mi povas ripozati nur momenton, ĉar kun la libero venas ankaŭ la respondecoj, mi ne kuraĝas plilongiĝi, ĉar mia vojo longa ankoraŭ ne finiĝis".

Nelson Mandela, eskerordinara gvidanto gvidinta la malfacilan tranzici-periodon, sukcesante estingi la rasisman konflikton en Sudafriko, etendante la manon al sia kontraŭulo kaj malaperante la malamon en la sino de samnacioj, fariĝis nemezurebla forto de bonkomprenemo kaj rekonsiliĝo. Tiamaniere, li havigis al si ne nur la korojn de milionoj da sudafrikanoj, elektintaj lin kiel la unuan koloran prezidenton de sia lando, sed samtempe, Mandela forrabis ankaŭ la korojn de milionoj da homoj pacamaj, trans Afriko, en la tuta globo!

Kaj je 5-an de decembro, tagon kiam forpasis Nelson Mandela, la personeculo kiu enkarnigis en si la plej altaj homajn virtojn, estis atestite ke la grandaj homoj apartenas al ĉiuj popoloj.. Ĉar li estis jam ĉies propraĵo. Estis inspiro por ĉiuj tiuj demandantaj liberon kaj pacon. Estis la vizaĝo plej bona de la nobla homo, kiu scipovas demandi kaj defendi sian rajtojn, tiom forta kiom povus pardoni kaj etendi la manon de rekonsiliĝo donante lekcion al la tuta mondo ke ankaŭ la plej malfacilaj konfliktoj oni povas solvi per pacaj rimedoj, per bonkomprenemo kaj amo de unu al la alia. "Neniu naskiĝis malamante kelkiun pro la haŭtkoloro, religieco aŭ eruditeco. la homoj lernas malami, kaj se ili lernas malami, ili povas ankaŭ lerni ami, eĉ la amo venas pli nature en la koron de la homo ol la kontraŭo".

Nelson Mandela plialtigis la nivelon de la humanismo kaj dismetis plejbone la veran signifon de demokratio, kaj pro tio la tuta homaro atribuas tion al li. Sudfriko perdis "la nacian patron", sian genian gvidanton, je volo kaj vizio neordinara. Dum la tuta mondo perdis la grandan protektanton de la homrajtoj, la homon-ikonon de la justeco, la voĉon de la egaleco kaj paco. La mondo perdis la lastan heroon de la fino de XX jarcento.

Ĉi tiuj epitetoj por la senmorta figuro de Mandela, subkomprenigas ke la animo, la idealo kaj verko lia vivos eterne! "Estu justeco por ĉiuj. Estu paco por ĉiuj. Estu laboro, pano, akvo kaj salo por ĉiuj. Ĉiu sciu ke por iun ajn la korpo, la menso kaj la animo estas liberaj por plenumi sin".

La tuta vivo kaj verko de Nelson Mandela, kondukas la mesaĝon ke tio iganta pli belan ĉi tiun mondon gigantan estas la diverseco, sed tio kondukanta ĝin antaŭen estas la libero..Pura libero. rompanta tabuojn dum la tempo, defianta realaĵojn, donanta forton al la parolo kaj penso de la homo, revoluciiganta la mondon kaj lasanta la homaron ĝui la vivon.

AFRORE SHAIPI

Gimnazio "Skenderbeu"

PRESHEVĚ- Suda Serbio

Paivo Netto

La mondo naskiĝis kun muziko



- José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

Se oni pensas pri tio, dum kiuj tempoperiodoj muziko grave manifestiĝas laŭ la epokoj, ni povas konkludi, ke ĝi ekzistas de antaŭ la tempoj. Efektive, ĝi estas ilo por tiu granda ĉefverko de la Ĉiela Patro, nome la Universo.

Kiam oni legas la komencajn ĉapitrojn de la Genezo de Moseo, tiam oni sentas la fortan harmonion, kiu naskiĝis el la ekapero de riveroj, de arboj, de bestoj, de la apartiĝo de teroj, de la etendiĝo de maroj kaj de la formiĝo mem de nia eterna Spirito.

Sekve de tio, estas eble trovi diversajn kaj signifoplenajn momentojn, kiam muziko

kongruas kun la historio de multaj civilizacioj kaj pensofluoj, kiuj vivigas la Teron. (...) Bona muziko estas ia nerompebla ligilo, kiu kunigas la kreiton al la Kreanto.

Fronte al tio, oni havas la precizan ideon, ke la pulsado de Vivo, Bono, Solidareco, Respekto kaj Karitateco estas ankaŭ melodioj, sonoj, ritmoj, kiuj harmoniigas niajn pensojn, vortojn kaj agojn per la vibrado de Justeco kaj Amo.

DIO EN ĈIU HOMO

Mi kaptas la okazon por danki por la korespondaĵo, kiun mi ricevis de profesorino Adriane Schirmer, el San Paŭlo, Brazilo, per kiu ŝi komentas mian modestan muzikverkaron: “Mi emas gratuli vin pro viaj melodioj. Ili profunde tuŝas nian Animon kaj vekas en ni plej bonajn sentojn. Ili valoras kiel petego, kiel preĝo al la Ĉiela Patro. Kiam ni ilin sonigas, ni sentas, kiel en momentoj de preĝado, puran koron. Kaj kiam tio okazas, tiam ni vidas Dion en ĉiu homo, en ĉiu planto, en ĉiu sunsubiro... Tiam, kun pura koro kaj surgenuiĝinta Animo, ni fariĝas kapablaj kompreni amon sen postuloj, amon per la Amo de Jesuo”.

• Foto: Vinícius Bueno



• Rubem Alves

MUZIKO KAJ MEDICINO

Dankon, legantino Adriane, interalie pro tio, ke vi sendis al mi la belan tekston, kiu prezentas la verkon “La Kuracisto”, de mia amiko Rubem Alves, intelektulo, teologiisto kaj eĉ eksposedanto de restoracio. Li estas multvalora brazilano.

“Muzikiloj ekzistas ne pro si mem, sed pro la muziko, kiun ili povas produkti. En ĉiu muzikilo ekzistas senfina kvanto da dormantaj melodioj, atendantaj, ke iu veku ilin. Kiam ili vekigigas, kaj oni aŭskultas ilian muzikon, tiam okazas Beleco, kaj kun Beleco, ĝojo. La korpo estas ia delikata muzikinstrumento. Necesas zorgi pri ĝi, por ke produktu muzikon. Por tio, ekzistas amaso da medicinrimedoj. Kaj multaj el tiuj estas efikaj. Sed la korpo, tiu stranga instrumento, ne resaniĝas nur per tio, kion oni faras por ĝi medicinare. Ĝi bezonas ensorbi sian propran muzikon. Muziko estas resanigilo. Se la muziko de la korpo estas malbela, ĝi ekmalĝojas – ĝi eble eĉ ĉesos deziri plu vivadi. Sed se la muziko estas bela, ĝi sentas ĝojon kaj emas vivi. En pasinta tempo, kuracistoj kaj flegistinoj tion sciis. Ili zorgis pri medikamentoj kaj korpaj intervenoj – taŭgaj por la korpo – sed ne forgesis bruligi la misteran flamon de ĝojo. Sed ĉi tiun flamon oni ne bruligas per ĥemiaĵoj. Ĝi ekbrulas magie. Ĝi bezonas voĉon, aŭskultadon, rigardadon, tuŝojn, rideton. Kuracistoj kaj flegistinoj: samtempe teknikistoj kaj magiistoj, al kiuj oni donis la mision ripari muzikilojn kaj veki en ili la emon vivadi...”.

Jen do mi lasas ĉi tie mian omaĝon al bonaj muzikistoj, bonaj kreantoj de muzikiloj, kaj

kompreneble al bonaj kuracistoj kaj flegistinoj.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Komentoj

Jolanda Józsi - Rumanio/ Vere, la muziko estas, restos en nia vivo, kiel kunligilo, forta, sentema, esprima, en paco, frateco donante vivgojon au kuracadon emi la vivadon.. en kredo, amo, espero, paco, kunestante kun Dio ciama. La muziko, poezio, inundo de l' sentoj plibeligas la vivon de la homaro. En ciuj homoj ekzistas ankaŭ la talento igi poeto, muzikisto... en diversaj niveloj.

Trifoi Mihai - Rumanio/ La bela artikolo “La mondo naskiĝis kun muziko” de la fama kaj multflanka aŭtoritatulo José de Paiva Netto igas nin pensi pli profunde pri kelkaj aspektoj de la vivo, kaj precipe pri muzikarto. En la komenco de la menciita artikolo, la aŭtoro aludas al la naskiĝo de la mondo. [...] Kaj vere en la granda Universo ekzistas muziko, muziko de la steloj, muziko de la sunoj kaj planedoj, muziko de la konstelacioj kaj galaksioj, kiuj ĉiuj konsistigas neimageblan kosman simfonion. La teraj esploristoj, kiuj daŭre serĉas la vivon en la Universo ĉe la grandaj surteraj observatorioj, scias tre bone tion. [...] Tiel la Naturo, la kreaĵo de Dio, inspirigis muziktalentajn homojn por krei kaj esprimi alian specon de muziko, la homan muzikon. Kaj la bela muziko estas vera artaĵo, kiu plaĉas al la homoj kaj al Dio mem, ĉar bela muziko estas en harmonia akordo kun la Universo. Bona muziko ne influas nur la plej evoluintajn terajn estaĵojn, la homojn, sed ĝi plaĉas eĉ al la bestoj. [...]

Paiva Netto

Religia Demokratio

Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj tttejoj en Brazilo kaj en la mondo

José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

La 21-a de januaro, Monda Tago de Religio, proponas al ni okazon por pripensi la gravecon de tio, ke ni vivu en la tuta mondo Religion Demokration – liberecon al ĉiu homo, ke li sekvu la vojon, kiun li juĝas plej bona por si, sen la intenco konflikti kun iu ajn alia homo pro kredo aŭ nekredo. Ni travivu Ekumenan Fratecon. Same tiel pensis la karmemora papo Johano Paŭlo la II-a (1920-2005), ĉar li asertis okaze de apostola vojaĝo al Hindujo, en novembro 1999: “Liberecon praktiki religion aŭ transiri al alia religio oni devas konsideri kiel fundamentan rajton de ĉiu homo”.

Do, estas oportuna la signifoplena paŝo farita de la federacia registaro en Brazilo, pere de ministrino Maria do Rosário (Sekretariejo de Homaj Rajtoj), kiam ĝi lanĉis je la 30-a de novembro 2011 kampanjon “Demokratio, Paco, Religio – Respektu”.

Alia iniciato estas la Komisiono pri Religia Diverseco, kreita por faciligi la dialogon inter reprezentantoj de malsamaj religioj kaj inter homoj, kiuj ne havas religion. Per tio, oni starigas diskutadon pri publikaj politikaj agoj, kun atento al la rekonado de malsamecoj, por akcepto de diverseco kaj precipe por superado de netoleremo. Batalado por Kunfrataj Religioj, kiun Alziro Zarur (1914-1979) iniciatis en la jardeko post 1950, estis efektive decida antaŭeniro por atingo de tiu Paco, kiun ĉiuj deziras.

Religia toleremo sub konsidero

Cetere, oni okazigis en Brasília/DF, Brazilo, de la 12-a ĝis la 14-a de marto 2012, la unuan Ordinaran Kunsidon de la Komisiono pri Religia Diverseco de la Sekretariejo pri Homaj Rajtoj de la Respubliko (SDH-PR). La solenan malfermon partoprenis la inda ministrino Maria do Rosário, el la sekretariejo.

Partoprenante la komisionon, la Religio de Dio – kiu havas kiel fundamenton la praktikadon de Ekumenismo de la Koroj – alportis sian kontribuon al la laboro de tiu laŭdinda iniciato de la brazila registaro.

Émerson Damásio, administra direktoro de Religio de Dio, raportis al mi: “Unu el la plej grandaj celoj de la kunsido estis la PNDH-3 (Nacia Plano pri Homaj Rajtoj) kaj Programo de Agoj koncerne Religian Diversecon, kiun partoprenas la strategia Celo VI de PNDH-3, estas, speciale: ‘a. Starigi meĥanismojn, kiuj garantiu la liberan praktikadon de diversaj religioj, kaj certigu protektadon al ilia fizika spaco kaj instigu kontraŭ religia maltoleremo. b. Starigi kampanjojn por disvastigo pri religia diverseco por dissemi kulturon de paco kaj respekto pri malsamaj kredoj. c. Starigi instruadon pri diverseco kaj historio de religioj, inkluzive de la afrikdevenaj, ĉe la publika lerneja reto, kun emfazo je rekono pri kulturaj malsamecoj, instigo al toleremo kaj al konfirmigo pri laikeco de la Ŝtato’”.

Ni deziras, ke tiu klopodo, por superado de iaj ajn malsamecoj, atingu plenan sukceson. Se ekzistas respekto pri malsamaj kredoj kaj kulturoj, tiam bona kaj fruktodona dialogo establiĝas en ĉiuj sektoroj de la socio.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Fatbardha Demi

Pri la deveno de la terminoj "Jezus" kaj "Kruco"

« La kutimo por teni fanatisme siaj distingajn signojn havas klare difinitan signifon...ilia deziro (de la albanoj) por sin identigi estas pli granda ol la morto pro la timo"»

Rose Lane « Majat e Shales » (La montopintoj de Shala)


Ĉiam pli la 25-a de decembro ĉeestas en la albana socio. Kiel tolerema popolo, ĝi historie estas celebranta la notindajn tagojn de ĉiuj religikredo, sendepende ĉu ĝi konis aŭ ne la religian aŭ mitikan signifon de ĉi tiuj datoj kaj ritoj.

Ĉar ĉiu fenomeno havas iun inicon, naskiĝas la demando: "De kie venas la nomumo de Jezus per Kristo kaj en kies popola lingvo kaj religikredo ĝi sukcesas motivigi la ĉefan simbolon de la kristana religio, la Krucon?"

Laŭ la Evangelio je Mateo, oni rakontas ke Maria, lia patrino kiu estis svatita al Jozefo, gravediĝis per la Sankta Animo. Ĉe Jozefo kiu intencis forlasi Maria-n, aperis en la sonĝo Dia anĝelo, dirinte: "Jozefo, filo de Davido, ne timu edzinigi Maria-n, ĉar kio estas konceptita en ŝi estas ja verko de la Sankta Animo. Kaj ŝi naskos knabon kiun vi nomumos Jezus, ĉar li savos sian popolon disde ties pekaĵoj (1).

En la Evangelio oni ne mencias pri tiu, kiu nomumis "Kristo" (Christ) Jezuson el Nazareto. Estas esploristoj kaj kreduloj, eksplicitaj la nomon "Kristo" sekve de la kondamno de Jezuso al morto, plene de korpaj suferoj, sur la kruco. La Kruco laŭ la kristana kredo, esprimas la kruciĝon, Kriston, Parolon kaj duan Figuron de Trinitas. Ĉiuj kreduloj kaj esploristoj de la historio, samopinias ke la "kruco" hodiaŭ reprezentas la simbolon de la kristana kredo.

Tamen, kiel atestas la esploristo Joel B. Green ("The Cambridge Companion to Jesus") "La atesto pri la mortomaniero de Jezuso estas tre malhela, ol tio prezentiĝis. En la literaturo de la Romia antikveco, oni ne donas priskribojn pri la akto de la kruciĝo" (2). Ankaŭ la angla teologo E. W. Bullinger, en la libro "The Companion Bible" (eldonita en la jaro 1922) asertas ke en la katakomboj de Romo, Kristo neniam estas spegulita kondamnita sur kruco. (3)




(a) grafikaĵo kiu alportas la disvastigitan formon de la kondamno (Justus Lipsius, 1595) (b) La kondamno de la romia legionano Acacio (jaro 303 antaŭ Kristo) pro fakto ke li ĉirkaŭbrakis la novan kristanan kredon. Sur la unua plano estas Jezuso. (4)

Kiel sciite, por krei la novajn mitojn, devas pasi tempoperiodo kelkjarcenta disde la historiaj eventoj. Dum tiu tempo, la mito pliriĉiĝas per rakonta materialo, vizia speguliĝo per la arto de la gravurado kaj pentrado, per notindaj ritoj kaj tagoj.

J. Hall en "Dictionary of Subjects & Symbols in Art" estas konfirminta ke "komencante ekde la V jarcento, la kruco ekgravuriĝis sur la sarkofagoj kaj aliaj objektoj. Wallis Budge (en la libro "Amulets and Talismans") aldonas: "Antaŭ la IV jarcento, la Kruco ne estis la ĉefa emblemo kaj simbolo de la kristanoj". (5)

Konklude, la simbolo de la kristana kruco estas enkondukita en pli postaj periodoj, ekde la historia tempo de la morto de Jezuso. La diversaj formoj de la kruco troviĝantaj hodiaŭ en Eŭropo, enpensigas nin, ke ĉi tiuj grafikaj figuroj devas rilatiĝi al la simboloj de la aliaj mitoj (ne rilatantaj al la kruciĝo) de kredo sufiĉe pli frua, ne traktita ĝis hodiaŭ. En la Enciklopedio de la Biblia literaturo (*Cyclopædia of Biblical, Theological, and Ecclesiastical Literature*) oni atestas ke la signo de la kruco konsideriĝis sankta simbolo ĉe multaj popoloj de Antikveco. (6) Laŭ la esploristoj, inter la geometriaj figuroj, la kruco estas la tria ĉefa simbolo alveninta ekde pli fruaj periodoj de la Pratempo kaj rilatas al la centro, cirklo, kvadrato kaj triangulo.



La Latina Kruco (1), (2) la Franceskana Kruco, (3) la Greka Kruco, (4) la ortodoksa Kruco, (5) La Kruco de Sankta Andrea, le premier [apôtre](#) appelé par Jésus dans l'Évangile (Matth. 10,2) el X jarcento, (6) la Bizanca Kruco, (7) la Baska Kruco, (8) la Kelta Kruco.


Dum la homa historio estas rimarkita ke ĉiu nova mito, por efiki al la loĝantaro, portas en si simbolojn de la pasintaj mitoj kaj kredoj. Tiu fakto ekspliceblas en la scienco de psikologio. Ekzemple sufiĉas ke ni rimarku la flagon de EU. La steloj kvinpintaj sugestas al ni la stelon de Davido kaj la numero 12, la nombron de la Dioj en Olimpo. En la simboloj de la multaj flagoj aŭ heraldikoj de la ŝtatoj, troviĝas steloj kvinpintaj, solaj aŭ akompanataj kun la luno, aglo, sankta numero "tri" de la koloroj, paralelaj linioj, kvadrato, cirklo, triangulo, vivoarbo k.c., troveblaj en la

kredo pri la Luno kaj pelazgaj¹ mitoj. El ĉi tiu vidpunkto, ne malĉeestas ankaŭ la kruco prezentita en la diversaj formoj. Petro Zhei² sin esprimas ke "La simboloj transpasas la landojn kaj tempojn, la individuajn situaciojn kaj la hazardajn cirkonstancojn..." (7) Tion atestas ankaŭ la esploristo Joseph L.Henderson " Miti antichi e uomo moderno", kiu konfirmas ke ekzistas simboloj kiuj ne perdis sian gravecon por la homa raso. (8)


Ĉar la kristana kredo surmetis la krucon en la centro de sia mito, mi estas konvinkita ke ĉi tiu simbolo portas en si tre gravan signifon, eble la plej gravan inter la aliaj simboloj de la origina kredo de la homa socio. Mi ankaŭ opinias ke ĉi tiu simboleca pezo de la kruco en la frua praeco, rilatas al la nomumo "Kristo", per kiu oni prononcas hodiaŭ la centran figuron de kristanismo-Jezuson de Nazareto.

La Kruco, inter la plej praaj signoj

Ĉi sube estas prezentitaj (a) la plej praa eŭropa skribo kaj (b-c) krucoj ĉe la iliraj³ kaj tatuaĵo per krucoj sur la mano ĉe la albanoj de Makedonio, sendita de la esploristino Edibe Selimi Osmani (dt.2.07.2013) (9)



En la hodiaŭaj studoj, la kruco (du-tri radia) estas difinita kiel literoj de la alfabetoj de Pratempo. En la suba figuro (a) la kruco tri-radia, apartenas al la alfabeto de la tria miljaro antaŭ Kristo kaj (b) du krucoj duradiaj esprimas la fonetikan nomumon "tau" en la kuneiforma skribo de Mesopotamio. (10)



Tiel opinias ankaŭ Niko Stillo⁴ kiu konfirmas ke "La simbolo de la rompita kruco estas simbolo aŭ litero de la skribo aŭ de la linearaj skriboj tre praaj en Eŭropo" (11)

¹ Pelazgoj- Pratempa popolo loĝiginta Eŭropon

² Albana esploristo

³ Ilirioj, la antaŭenintoj de albanoj

Ĉar la krucon ni renkontas jam en la "arto" de la Neolita homo, kiam ankoraŭ ne inventiĝis la skribo, ni konkludas ke en la unua periodo ĉi tiuj signoj ne estis literoj, sed rilatis al la origina kredo. La esploristo Patro Justin Rrota⁵, en sia verko " Pri la historio de la albana alfabeto" (1936), montras tian ekzemplon: "En la eldonaĵo de Buzuku⁶ ni trovas la ŝlosilon por solvi la duban ombron pri la precipaj signoj de la albana skribo (...). Por esprimi la albanan sonon "y", kiun tiu verkisto uzis ankaŭ por la literon "u" li prenis la zodiakan signon (kornoj de la toro) kiu uzatas en la branĉoj de astronomio por la vizaĝo de Taroĉ (Taurus)." (12)

Hodiaŭ ne povas diri precize pri tio kion volis esprimi la primitiva homo per la krucsigno, pentrinta en la grotoj aŭ gravurintan en la ostoj, ŝtonoj aŭ bakita koto. Sed ni povas aserti ke en tiu frua periodo, oni kredis en supernaturaj fortoj, ne atingeblaj de li kaj unuavice, tiuj troviĝantaj en la ĉielo, kiel la luno, la suno, la steloj, la akvo (la pluvo) kaj la aero, ka. La kredo kaj la fruaj mitoj, apartenas al la "loĝanto" de la Firmamento kaj hodiaŭ tie troviĝas ankaŭ la Dia loĝejo. Mircea Eliade konfirmas ke " La alteco estas io neatingebla por la homo, kaj kiel tia, ĝi apartenas al la fortoj kaj superhoma ekzisteco. La ĉielo "simbolizas" la perfektecon, sanktecon, potencon, neŝanĝiblecon...Simple pro fakto ke ĝi estas "alta", troviĝanta "alte", ĝi egalvaloras al la estiĝo potenca" (13)

La Neolita homo estis "serĉante Dion", sentita de li kiel FORTO kaj senforma. Li rigardis tion ĉe la multaj fenomenoj de la ĉiela kaj surtera naturo, de kie dependis la vivo lia kaj de ties gento. La plej granda timo por li estis malapero de la lumo, kiam la malhelo de nokto senluna aŭ en la grota profundeco, forglutis ĉion ĉirkaŭ li. En la mallumom nenio ekzistis. La milito kontraŭ "mallumon" por savi LUMON (lunan aŭ sunan), troviĝas sur la fundamento de la unuaj mitoj de la homo.

La kruco entenas en si la espriman elementon de la malsupreiro en Teron de la Lumo- radio (rekta linio). La vorto de la albana "rreze" (radio), rimarkigas la esploristino Nermin Vlora⁷ estas vorto renkontata ankaŭ hodiaŭ en ĉiuj indo-eŭropaj lingvoj, (tamen) ne renkontiĝas en la greka, turka, araba kaj nek en la ĉina..." (14). Kiel pruvigas tion Petro Zhei per la moderna fiziko, lingvo kaj mitoj "La lingvo riferiĝas ĉiam al la Centro (Dio)" (15)

La radiko de la nomo "rreze" troviĝas en la nomo de Dio ĉe la praaj egiptoj (La diino Re/Ra- tio falanta surteren laŭ Xh. Katapano⁸) kaj estas esprimita sur la muroj de Piramidoj en la formo de la rektaj linioj finiĝantaj per mano (Dia mano), sed ankaŭ en la pentraĵoj mezepokaj de la kristanismo. Neniu surtera objekto, havis tiun perfektan formon de la rekta linio kiel la radio, kiu ligis la ĉielan Lumon (Dion) kun la Tero. Tiel, samkiel en Pratempe ankaŭ la hodiaŭaj kredoj, ĉiu elemento de la sankteco, esprimiĝas kiel radianta lumfonto.

⁴ Albana esploristo

⁵ Albana esploristo

⁶ Albana klasicisto

⁷ Albana publicistino


⁸ Albandevana esploristo



a)



b)



c)

(a) Monero kun la kapo de Seleukido, reĝo de la antikva Sirio (b) La diino Mitra (c) Mozaikaĵo de Kristo kun la radio ĉirkaŭ la kapo el la 3-a jc en la baziliko de Sankta Pietro, Vatikano (16)

Du krucigitaj radioj (la kruco) estis unu el la plej fruaj simboloj por Dio, kune kun la figuro de luno, kiel esprimaĵo de la ties Kreativa naturo kaj Aglo, la sola viva estaĵo kiu alproksimiĝis pli apude al ĝi.

En la verko "Thot parolis albane" la arbreŝa esploristo Xhuzepe Katapano asertas ke "La Aglo kaj la Stelo simbolizas ekde la plej praaj tempoj, la lumon, la animon, do mem la originon de la vivo kaj de ĉiu kreado, kiuj estas esence je medita rango..(kaj) laŭ Moiseo, la aglo kaj la stelo, estas sinonimoj (17). En la subaj fotoj, ni havas romian moneron el la jaroj 217-215 antaŭ Kristo kun la aglo portanta krucon je formo de la stelo kaj parton de la reliefo dediĉita la la diino de Mithra en la Muzeo de Vatikano el la 3-a jc, kie prezentiĝas la luno kun du krucoj- steloj. (18)



Tiuj tri figuroj (la luno, la kruco- stelo kaj la aglo) reprezentis la Plenpotenculon kaj estas spegultaj kune aŭ separataj, dum la tuta periodo de la Pratempo, Mezepoko sed ankaŭ en la modernaj tempoj, kiam temis pri la diina potenco.



a)



b)

c)



(a) Romia monero el la jaroj 189- 180 ANTAŬ Kristo (La Luno supre kaj la kruco en la formo de la rado) (b) la aglo en la centro de la kruco reprezentas Dion (c) parto de la germana heraldiko el la 19-a jc kie vidiĝas kruco (X) formita el anko kaj glavo, rekta kruco de la glavotenilo kaj la luno. Ĉi tie inkluziviĝas ankaŭ aliaj simboloj. (19)



Tornistro de la virino el Sopot, Librazhd, (ALBANIO), komence de XX jc, "Popolaj Vestoj" Vol.2

Centre de la kruco estas la aglo, kiu kune kun la du lunoj kaj steloj supre, reprezentas la Kreinton. La kvar cirkloj, kun la centro okulfrapa en la formo de la globeto, estas esprimaĵoj de la diina mondo kun Dio en la centro. " La raporto inter Dio kaj Kreinto- sin esprimas Antonietta Zanattasamas al tiu de la cirklo kaj LA centro". (20)


Ĉiuj tri formoj de la kruco konataj ankaŭ hodiaŭ (X, †, T), havis por la Pratempe la saman mitikan valoron, kio atestiĝas ankaŭ en la unuaj alfabetoj. (rimarku la fenikan literon- kruco, tiun grekan arkaikan, la klasikan grekan formon "T", etruskan kaj latinan, je sama fonetika valoro (21)

Fenicio	Ebraico moderno	Greco arkaico	Greco classico	Etrusco	Latino classico	Latino moderno
†	ⲧ	Χ	Τ	Ɑ	T	T

Tio rimarkiĝas ankaŭ en la romiaj moneroj kie la kruco, la stelo kaj la litero "T" estas simboloj de Dio.



a) b)
(a-b) La Ĝemeluloj Dioskuroj kun la kruco ene de la cirklo kaj du steloj sur la kapo, en la romiaj moneroj el la jaroj 211-208 antaŭ Kristo.



c)
La litero "T" malantaŭ la kapo de la ĝemeluloj kaj du steloj sur la kapoj de la ĉevaloj kiel esprimaĵo de la Kreinto. Le_monete_di_Luceria_Classe_IV_-_8. (22)

La Kruco- stelo kaj la ĝemeluloj de Zeŭso

Pri la fakto ke la simbolo de la kruco- stelo estis, du-tri radioj interrompitaj unu al la alia, kun la ideo de Dio, ni havas multajn atestaĵojn en la arkeologiaj materialoj. En multaj moneroj el la romia periodo, sur la kapo de la ĝemeluloj: Kastor kaj Polideuk, konataj per la nomo Dioskuroj, troviĝis

du krucoj- steloj (la fotoj supre). Dioskuroj, laŭ la pelazga rito estis la infanoj de Leda (edzino de Tindro, reĝo de Sparta) kaj Zeŭso, trompinta, prezentiĝanta kiel cikonio. La du ĝemeluloj, havas surkape ĝuste la du ovoduonojn el kiuj ili estas naskitaj (la lanĉapoj) kio estas parto de la vestoj nur de la albana tradicio.

Tio estas alia fakto, atestanta ke la "grekaj" mitoj havas kiel aŭtorojn, la antaŭenintoj de la albanoj- la diinajn Pelazgojn. Sur la subaj fotoj:

:



(maldekstre) skizo de la mito, ellaborita de Leonardo da Vinĉi (1692) Musée Boijmans Van Beuningen de Rotterdam (centre) la ĝemeluloj Dioskuroj sur la kies kapoj staras la luno kaj du steloj, 2-a jc antaŭ Kristo (dekstre) statuo de Dioskuroj, kiel diina simbolo de la militista potenco de la Romia Imperio. (23)

Pli detale pri Dioskuroj kaj la ties patro, Zeŭso pelazga aŭ Oine, Lamaho, Minoso, Nino, Ŝeŝooso ĉe egiptoj, Dioniso ĉe grekoj kaj Noe, en la Malnova Testamento estas elvolvita en la granda verko de Niko Stillo "Etruske- Toske", kio daŭre neglektiĝas fare de la oficiala politikizita Albanologio.

En multaj arkeologiaj objektoj aŭ grafikaĵoj ankaŭ el la novaj tempoj, la kruco-stelo kun la luno, prezentiĝas kunakompanataj kiel esprimiloj de unu la alia, kiel tion ni trovas en la simbolo de la islama kredo, luita el la pelazga kredo. La stelo supre de la luno estis simbolo de la Diino Afrodito kaj de la ŝtato de Epiro. Ĉi tiu simbolo estas spegulita ankaŭ en la lanĉapo de Aleksandro la Granda.

En la romia monero (en la suba foto) el la jaro 112 antaŭ Kristo, la luno kaj la stelo esprimas la ideon "Dio estas kun vi!" tio estas, ke la romia soldato ĝuas la diinan protektadon. Samtiel, en la heraldiko de la gazeto de arbreŝoj⁹, la luno / kruco-stelo, en la centro de la aglo dukapa, esprimas tri simbolojn de Dio kaj atestas lian rilaton al la Arbreŝa Nacio.

⁹ Alia nomo por albanoj



a)



b)



c)

(a) romia monero el la jaro 113-112 aŭ Kristo (b-c) en la centro de la aglo dukapa, troviĝas du sinonimaj figuroj: la luno kaj la stelo. (24)

En la libro dediĉita al la distingita arbrea figuro, Gjergj Xhemisto Pletones (15-a jc), Moreno Neri alportas valoran atestaĵon por nia temo. En letero sendita al la gefiloj, okaze de la morto de ties patro oni skribas: "(Li) transpasis multajn diinigitajn homojn naskitaj de Helado, tiel kiel Faeton (Zeŭso) estis la plej bona inter la ceteraj steloj" (25) Ni ne forgesu, ke Ptolemeo konsideras Epiro-n "prahistoria Hellas" dum Polibi konsideras la loĝantaron de Epiro kaj Makedonio kiel helena en ĉiuj sencoj (26) kaj "(mal)helenismo" ekzistis ĝis la 19- jc, la kredo de la arbrea popolo. La nomumon "stelo" ni ne trovas nur por Zeŭso, sed ankaŭ ĉe la pelazgaj gentoj. La esploristo Trevor Bryce en sia libro "The kingdom of Hittites", (Oxford 1998) referiĝante al la nomoj de la hititaj reĝoj, rimarkas ke "ili posedas sufikson 'ili', maniero per kiu oni identigis ilin kun la stelo...Krom la iliroj kaj hititoj, ne ekzistas alia popolo en Azio aŭ en Eŭropo, kiu uzas la sufikson 'ili' post la nomo de iu reĝo. Inter la Semititaj lingvoj, la sufikso 'ili' montras simple Dion. " La hititoj kaj iliroj posedis la saman kulturon kaj civilizon kaj la saman lingvon. (27). La simbolo de la stelo staras ankaŭ ĉe la nomumo "Iliroj", kiu erare kompreniĝas kiel "I lire" ((albane: libera). En la Ĉama¹⁰ subdialekto la nomo "stelo" prononciĝas "illi" kaj la historia nomumo de nia popolo estas "yllore" (stelecaj) kaj la lando Ylliria (Lando de steleculoj). Tion subtenas la pelazga mitologio kaj pli malfrua nomo "Illyria", kie okazis la anstataŭiĝo de la vokalo "y" per "i" ĉe la unua konsonanto. "Yj" (yj- yjnor-hyjneron- legu: steleca) atestas Nermin Vlora- ĉi vorton mi apenaŭ trovis en alia lingvo, escepte en la albana (...) tamen ĝi estis disvastigita en ĉiuj surskriboj de Pratempe, ekde Egeo ĝis Atlantiko. (28)

Koncerne al tio elvolvite pli supre por la simbolo de la kruco en la arkeologiaj objektoj, tiuj de tradicio, en la lingvaj kaj historiaj studoj, oni atestas ke: La Kruco en la kredo kaj mitologio pelazga, estas simbolizinta la Stelon kaj estas reprezentinta la Kreinton- Dion

La Kruco, la Pratempe scienco kaj la mito

Se ni nin esprimos ke la kredo de la Pelazgoj kaj la temploj estis institucioj reĝecaj sed samtempe sciencaj de la Pratempe, ni tute ne erarus, sed malkovrus la grandan diferencon kiun havis la kredo dum la Pratempe, rilate tion de la hodiaŭaj tagoj.

Ene de ĉi tiu kreda strukturo (mitika kaj scienca) de la Pratempe, kiam ajn, la kruco ĉeestis. Tiun konkludon atestas tutklare la arkeologia materialo.

¹⁰ Ĉamerio vasta regiono apud maro en norda Grekio loĝata kompakte de la albanaj etnuloj (almenaŭ ĝis la junio 1944 kiam Grekio forpelis la islamajn ĉamojn disde siaj propraj teroj aŭ murdis ilin.

Kiel ni evidentigis pli supre, la kruco estas esprimita per la kruciĝo en la centro de du kaj tri rektaj linioj (radioj) sub anguloj diferencaj de 90° kaj dum Pratempe oni pensis ke tio havis diinan magian forton. En la unua foto ĉi sube (a) en la boatoj de la ilira gento de Liburnoj, ni havas krucan zonon esprimanta Diinon (krucon) en la tera mondo (kvadrato), kaj tio signifas: "Dio estas apud vi!" En la dua (b), ĉe la statuo de Isida (1360 antaŭ Kristo), la sinteno de la luna Diino, esprimas la rektan krucon, akompanata de la aglaj flugiloj kaj plena luno surkape inter la toraj kornoj. Tiu prezentaĵo de Isida, fariĝos simbolo de la kruco en la Praa Egiptio. La tria foto (c) prezentas armilon duklinga je tipo pelazgeca, kun krucoj ene de ĝi kaj la klingo je formo de la luno. (29)



(d) Egipta kruco, reprezentanta la lunan diinon Isida, kiel tio aperas pli supre. En la foto (e) La simbolo de la kristana kredo (la figuro en la centro en la formo de la rado) la sama al la egipta kruco (Monogramma di Cristo, sec. IV)

La moderna homo estas kurtiginta je miljaroj la tempan periodon de la Pratempe, ne kapablante malkovri plene la atingojn de la praa scienco, kovrita per la kreda "vualo" de la simboloj, hodiaŭ ni posedas malsufiĉan historian kaj lingvan sciencan pro la faktoj kaj facile manipuleblan.

Sed la studoj el lastaj tempoj, precipe de la albanaj esploristoj, alportis novajn traktaĵojn de la simboloj kaj mitoj pelazgaj. Unu el ili estas ankaŭ la verko "la Albana kaj la Sanskrita" de Petro Zhei, surmetanta la bazojn de nova scienco en la studado de Pratempe, uzante la simbolojn kaj la mitojn de la pelazga kredo, la albanan lingvon, la leĝojn de la moderna fiziko kaj kompara lingvistiko.

Por la dismetiĝo de la simbolo de la kruco, ni baziĝos ĝuste sur ĉi tiu scienco nova, kiun la aŭtoro nomumis "La Filozofio kaj la Logiko de la Lingvo". "Laŭ la mitika penso, konfesas Petro Zhei- la Centro (la intersekca punkto de la rektaj linioj) difiniĝis kiel koincido de la kontraŭoj kiu identiĝas je lasta instanco al Dio...(30) La Centro = Dio = la Amo. Ĉi tiu konkludo trovas unuaniman

konfirmon en ĉiuj Sanktaj Skriboj, laŭ kiuj Dio estas Amo, amo senkondiĉa kaj ĉiakondiĉa. La Centro = La Lumo" (31)

La Kruco reprezentis la diinan protektadon far Dio al siaj filoj, sed ankaŭ la rilaton kun ili. Ĉe Arbreŝoj ekzistis ĉiam la konvinko ke ili estis Diina popolo. Multaj popoloj estas deklarintaj ĉi tiun nomumon por si mem, sed krom la malfruaj mitoj, ili ne sukcesis prui ĉi tiun nomumon per sia lingvo. Kiel sciite, la lingvo estas naskiĝinta antaŭ la mitoj, tial estas ĝi, kiu pruvas la miton kaj tiu privilegio apartenas al la lingvo pelazga- albana. Ĉi tiu fakto atestas ke arbreŝoj, estas tiu POPOLO DIINA, kiu verkis la miton pri Kreado kaj starigis institucian kredon SELLENISMO (lunan kredon).

Mi alportas nur unu el multaj faktoj pruvantaj mian opinion. Laŭ la vortaro de Biblio, la nomo Adam en la hebrea devenas el "âdam" (ruĝulo, ruĝa, farbita per ruĝo) (Edom); estas tio ja nomo donita al Esau post li estis ŝanĝinta sian filon per telero da ruĝa supo (Zan. 25.30) (32). Fakte, la biblia nomo Adam, trovas sian mitikan eksplicon nur en la Albana: A+dam, tio estas "A-la unua + i damë, i ndarë/i krijuar (dividita, disigita/ kreita)" far Dio. Same laŭ la vortaro de Biblio, ni legas ke: "Ĉe la Origino (la unua estaĵo kreita- mia noto) tio nomiĝas mem de Providenco: homo aŭ Adam (Origino 5,2) por evidentigi la teran aspekton de ties estaĵo...por homo en la hebrea estas la vorto «îysh », signifanta "viro" aŭ "masklo" (Eks. 35,29) "edzo", "homa estaĵo" (Num. 23,19)" (33)

En la Albana, la nomo "homo", havas kiel radikon la nomumon de la numero "unu" t.e. Dio, kiu estas unika- "1" kaj ne dividebla. Do, Adamo estis filo de Patro- Unu kaj kiel verko de Dio, nomumiĝis per lia nomo "unu + ri (nova)". Do ne en la hebrea kaj nek en la greka aŭ latina la numero "unu" rilatas al la vorto "njeri (homo)" kaj ne koincidas je lingva aspekto al la mito de la kreiĝo. Sed ne nur la Albana pruvas ke la antaŭenintoj de arbreŝoj kaj hodiaŭaj albanoj, apartenas al tiu diina raso. La kruco ĉe la pelazgaj gentoj estis nedisigebla parto de la vesto kaj ni trovas ĝin ankaŭ en la vestoj tradiciaj de la hodiaŭaj albanoj.



(Du la unuaj) Viro kun fustanelo¹¹ (gravurita ŝtono en Maribor de Slovenio la 5-a jc post Kristo) kaj ilira vesto kun rimenoj je formo de kruco. (dekstre) Du krucoj en la vesto de la diino Shamash en Mesopotamio aŭ Utu ĉe Sumeroj, kiu konatis kiel filo de luna dio Sin. (34)

¹¹ Tipa albana popola vesto

Kiam oni konstatas similecojn de la simboloj aŭ en la mitoj de la praaj popoloj de la Proksima Azio, la esploristoj kutime surmetas "stampon" kvazaŭ ili devenas de Oriento.

Arif Mati¹² post 30 jara studado pri la Pratempe, atestas ke Sumeroj devenis el Balkanio kaj estas proksimaj al Trojanoj, Trakoj aŭ Frigoj, t.e. estas pelazga popolo. "Fama popolo de montaranoj kun rondforma kapo, kiuj piedpremis la teron de la Mezoriento ĉirkaŭ la jaroj 4000 antaŭ Kristo. (35) Albanoj konservas la krucon ankaŭ hodiaŭ en la tradiciaj vestoj.



(a) Pelazga hakilo duklinga kaj la rimenoj interkrucigitaj en la vesto de militisto. (b-c) Horlogĉeneto el 19-a jc, Tepelena. Ornamaĵo de la vira vesto je kruca formo, ripetita ankaŭ en la kvadrato en la centro kie vidiĝas la radianta stelo sespinta de Aleksandro la Granda.



¹² Nuntepa albana esploristo

(d) La vico el krucoj sur la mantelo kaj krucoj en la du interkrucigitaj rimenoj, en la vesto de Sigismondo el Luksenburg, reĝo de la Sankta Imperio (1433-1437) luitaj de la pelazga kredo far kristanismo. (36)

La esploristo Petro Zhei en sia verko "La Albana kaj la Sanskrita" asertas ke "La centro estas lokita en la punkto de la interjekcio de la du brakoj de la kruco...(kaj) ĉar '0' (nulo, nenio) estas la sola solvo de la ekvacio de la Centro = Dio, tio tutsamas kiel diri ke ekzistas nur unu Dio. (37). Do la pelazga kredo aŭ "pagana" kiel tio nomumiĝis de kristanismo, estis monoteista kredo, signifanta ke ONI ADORIS UNU DION. (Ne konfandu tion al la Diinoj de Olimpo, kiuj estis teraj diinigitaj homoj).

Por la ordinara leganto, eble estas malfacile kompreni la sciencan eksplicon de la esploristo Petro Zhei pri la simbolo de la kruco. Sed la arto de Pratempo konfirmas tion per ĝia esprimiva lingvo.

En la subaj fotoj ni vidas ke la ideo de Dio (Centro de la interkruciĝo de du radioj) estis konata al la Pratempa homo kaj la kruco konsideriĝis ĉefa simbolo de la kredo.



(a) La manoj de la egipta mumio surmetitaj kruce kaj kovritaj de la aglo. (b) La Faraono Senusret kun krucigitaj manoj kaj kun la kruco Ankh (c) Infanoj kun krucigitaj manoj, piedo de la trono de Papo en Vatikano, luita el la pelazgaj modeloj.(38)

La simbolo de la kruco kiel esprimaĵo de la Kreinto, en la praa Egiptio, atestas pri la pelazga deveno de Faraonoj, profetoj kaj reĝoj, kreintaj pli malfrue la kredon de judaismo (de israelanoj), antaŭeninto de la kristana kredo. "Ramses la Dua, la Granda de dinastio XIX, plej granda kaj plej brila Reĝo, lia nevo Hossrph (filo de la fratino), pastro de Osirido, laŭ Menetono kaj Strabono, nomita pli malfrue Moseo de hebreoj, kies aferon akceptis pli malfrue Solomono- filo de la bela hititino Betsabea, ĉiuj tri estis Trojanoj" (Gerhard Herm « L' avventura dei Fenici » Garzanti, 1974) (39)

Kaj kiel ni vidis pli supre, Trojanoj estis pelazgoj. Do, la simbolo de la kruco- stelo herediĝis en la kristanan kredon de mem pelazgoj, sed nun kun nova mito- kiel objekto de la kondamno de Kristo.

De kie devenas la nomo de Jezus Kristo?

En la tradicio de arbresoj, unu el la infanoj heredis la nomon de la geavoj, laŭ la ĝenro kiun tiu havis. Ĉi tiu kutimo fontis el la pelazga kredo, laŭ kiu la spirito (sankta animo) de la antaŭuloj "renaskiĝas surtere, en la korpo de siaj gefamilianoj. Certe dum centoj da jarcentoj, ĉi tiu mito estas forgesita, sed estas konservita la rito, kiel devigo de la antaŭuloj por rememori kaj honorigi iliajn antaŭulojn.

Ankaŭ la nomo de Jezus Kristo, sekvas la saman miton de la pelazga kredo. Ĉe "La Evangelio laŭ Mateo", por la naskiĝo de Jezuso, oni skribas ke lia konceptiĝo fariĝis de la Sankta Animo de Dio.

La eksplico de P. Zhei por la nomo de Jezuso per la Albana, subtenas ĉi tiun miton: "La triangulo formita el la blokoj de malŝarĝado kaj la arkitravo, ŝajnis kiel granda centra "okulo", ene de ĝi, estis skizita tetragramo (kvar literoj) kiu en la hebrea lingvo legiĝas

JHVE kiu konsistigas la nomon de la "Neesprimeblulo" t.e. "Ci estas la sola" ĝuste kiel en la Arbreŝa: Je VE(T). (Ci estas mem). Ni rememorigas vin ke en la praa hebrea 'H' prononciĝis 'E' (40)

Dume en la vortaro e la Biblio oni diras ke: Jezuso en la greka Jesus, korespondas al

Jehôshûa en la hebrea kaj signifas *Jehôvâh savas*, Providenco savas". (41)

Kiel sciite, la Albana eksplicas precize la vorton JHVE, t.e. la Filo, kie "enkondukiĝis" la Sankta Animo de la Patro, ricevis ankaŭ lian nomon, kiel ni trovas ĝin en la tradicio de nia popolo. Ĉi tiu mito ne baziĝis en la hebrea.

Por la nomo "Kristo", laŭ la vortaro de Biblio estas tradukaĵo de la greka nomo "Kristos" kaj de la hebrea vorto Mesia (Masîah) signifanta "oleumita" (Gjo1,41). (42)

Ankaŭ en ĉi tiu eksplico la nomo ne dismetiĝas per la hebrea lingvo, greka lingvo, aŭ latina lingvo, Jezuso nomumiĝis ankaŭ Kristo pro la nomo de la Patro, kiu, kiel ni vidis pli supre, reprezentis de la kruco. En la Albana, la radiko "kri" estas la sama, ĉu por la Kreinto ankaŭ por la kruco ('kri-q' en la subdialekto ĉama), kiun ni ne trovas en la aliaj lingvoj. Ĉi tiu komuna radiko atestas la rilaton de Jezuso kun la simbolo de kruco kaj Dio (Kri-sht, Kri-q, Kri- juesi- Kreinto).

El la ĉisupra materialo, kie ne estas inkluzivitaj ankaŭ aliaj faktoj, ni estas pruvintaj ke:

1: La kruco duradia kun la du ĝiaj formoj, (90° aŭ aliaj anguloj) samkiel triradia, estis simbolo de la stelo kaj preter la stelo kaj aglo, ĝi estas espriminta la diinan mondon kaj mem Dion. Ĉiuj formoj de la kruco, estis sinonimoj de unu la alia, kio atestiĝas en la arkeologiaj materialoj. Krucoj du-triradiaj ankaŭ hodiaŭ servas por esprimi grafike la stelon.


2: La nomo Kristo kaj Kruco havas la saman radikon "kri", kiel tion ni trovas en la subdialekto de Ĉamerio, kie oni diras "kri-q" por kruco ('sht' kaj 'q', estas finaĵoj), atestita ankaŭ de la historia lingvistiko de la Albana, kie rimarkiĝas ke la litero "y" estas pli malfrua. Ĉi tiun lingvan rilaton ni ne trovas en iu ajn lingvo de la kristana kredo. La radiko "Kri" apartenas al la subdialekto ĉama ankaŭ por la nomo "Kriet", kiu ĉe la hodiaŭaj albanoj prononciĝas Kryet aŭ Koka kaj konservas ankaŭ en hodiaŭaj tagoj la sencon de la "unu", de la Unua de familio aŭ Dio de la familio, kiu pensas kaj decidas pri ĝi.

Ĉi tio atestiĝas ankaŭ de la uzado de la vorto "Dio" por la ĉiela Plenpotenculo kaj por la ĉeffamiliano, ĉiam en la senco "la sola, la plenpotenculo pro la sorto de..kaj de aparteneco". Kiel konfirmas ankaŭ la esploristo Beonlev: " La vorto, envere apartenas al la lingvo en kiu ĝi ne

troviĝas izolita, kie ĝi konsistigas tutan familion de la terminoj, el kiuj unu flanko eksplicas la alian" (43)

3: La nomo de la kruco rilatas kun la nomo de Jezuso Kristo tra mitologio kaj lingvo pelazgo-albana.

Konkludo: La lingvo pelazga-albana estis la lingvo de la unuaj mitoj de la eŭropa homo kaj de la simboloj de kredo. La kunakompanado de Jezuso en la arto kun la simboloj pelazgaj kiel: aglo, luno kaj suno, radioj, okulo de Dio, kruco, toro ka. atestas la originon pelazgan de la kristanismo.



(a) La aglo dukapa sur la "vera kruco". (Church of the Holy Sepulchre, Jerusalem). (b-c) La aglo kun diina radiado, apud la piedo de Kristo (d) La luno kaj la suno sur la kapo de Jezuso" (44)

La nomo de Jezus Kristo, kiel tiel alvokas lin la tuta kristana Mondo kaj de Kruco, estas el la albana lingvo kaj eksplicitas per la mitoj de la kredo dardano- tesprota- sellenismo (hellenismo). Ĉi tiu kredo, dum miljaroj havis evoluojn kaj ŝanĝiĝojn siajn, pliriĉiĝante per mitoj kaj kreante novajn kredojn heredintaj doktrinojn, ritojn, simbolojn, nomumojn kaj multajn aliajn kozojn, el la UNUA kredo origina. En la Evangelio laŭ Johano, oni skribas: "Neniu vidis la Patron, krom tiu, kiu estas de Dio; li vidis la Patron." (45)- heredante Lian nomon, en la diina lingvo de ARBREŜOJ!"

Fatbardha Demi

3.01.2014

Noto: la litero 'k' en la albana korespondas al la litero 'c' en la latina

La terminoj 'Arber', 'Arbresh', 'Alban' signifas la samon

La aliaj notoj:

- 1-f1 BIBLA – Dhjata e Vjeter dhe Dhjata e Re (botuar nga Shoqata shqiptare e Bibles, 1995) (albanlingva Biblio)
- 2- en.wikipedia.org/.../Instrument_of_Jesus'_crucifixion
- 3- po aty (samloke)
- 4- (a) Justus Lipsius' De cruce 1595 http://en.wikipedia.org/wiki/Crucifixion_of_Jesus (b) <http://it.wikipedia.org/wiki/Sant%27Agazio>
- 5- http://en.wikipedia.org/wiki/Dispute_about_Jesus%27_execution_method
- 6- po aty (samloke)
- 7- [http://fr.wikipedia.org/wiki/Croix_\(symbole\)](http://fr.wikipedia.org/wiki/Croix_(symbole))
- 6- po aty (samloke)
- 7- f57 Petro Zhei “Shqipja dhe Sanskritishtja” (pjesa e dyte), Tirane, Tertiumdatur, 2006
- 8- f91 Carl Jang « L'uomo e i suoi simboli » TEA, Milano, 2011
- 9- Fragment nga nje objekt arkeologjik. (La più antica scrittura alfabetica, Marston, “La Bible a dit vrai”, Plon 1935, f21) www.abebooks.fr/Bible-dit-vrai-MARSTON-Sir-Charles/.../bd
- 10- http://www.funsci.com/fun3_it/scrittura/scrittura.htm
- 11- f184 Niko Stillo “Etruskishte Toskerishte”
- 12- f12 At Justin Rrota « Per Historine e Alfabetit shqyp » Botime Françeskane, Shkoder, 2005
- 13- Mircea Eliade- da *Trattato di Storia delle Religioni* (1948), Einaudi, Torino 1954, pp. 42-45; 111-114; 105-107. <http://www.disf.org/AltriTesti/Eliade.asp>
- 14- f 45 Nermin Vlora Falaski “Prona gjuhesore dhe gjenetike”, 1997
- 15- f17 Petro Zhei, po aty (samloke)
- 16- (a) <http://www.sixbid.com/browse.html?auction=674&page=5> (b) Perendia Mitra (c) http://it.wikipedia.org/wiki/In_hoc_signo_vinces
- 17- f87, 88 Xhuzepe Katapano „Thoti fliste shqip ose Thot-i boreal, Iliro-Shqiptar, i dha Botes Kumtin e pare te Lirise dhe te Drites“ Botimet enciklopedike, 2007
- 18- <http://www.antiqua.org/Monetazione%20IV-III%20Sec%20aC.htm>
(djathtas) Sol Invictus (upper left) and Mithras slaying a bull, 3rd century, Vatican Museum
- 19- (a) Monedhe romake e vitit 189-180 pk. (b) (DA ALLORA INIZIO' IL DECLINO DI VERCELLI www.webalice.it) (c) Ein heraldisches Exlibris aus dem Jahr 1895, entworfen von Ernst Krahl (1858-1926) <http://www.dr-bernhard-peter.de/Heraldik/seite38.htm>
- 20- Antonietta Zanatta <http://www.storia-dell-arte.com/significato-del-cerchio.html>
- 21- <http://www.summagallicana.it/lessico/e/Etruschi.htm>) jiptiane
- 22- (a-b) <http://www.sixbid.com/browse.html?auction=674&page=5> (c) [Le_monete_di_Luceria_Classe_IV_-_8.jpg](http://it.wikipedia.org/Le_monete_di_Luceria_Classe_IV_-_8.jpg) it.wikipedia.org
-

- 23- (majtas) [http://fr.wikipedia.org/wiki/L%C3%A9da_et_le_cygne_\(L%C3%A9onard_de_Vinci\)](http://fr.wikipedia.org/wiki/L%C3%A9da_et_le_cygne_(L%C3%A9onard_de_Vinci))
(qender) A ROMAN MARBLE RELIEF WITH THE DIOSCURI CIRCA 2ND CENTURY A.D.
<http://www.christies.com/lotfinder/ancient-art-antiquities/a-roman-marble-relief-with-the-dioscuri-5546883-details.aspx> (dijathtas) Romano Impero: CULTO DI OPI - OPS
www.romanoimpero.com/.../il-culto-di-opi.html
- 24- (a) Denarius. Rome, 113-112 BC. Helmeted head of Roma left, holding s...
<http://www.sixbid.com/browse.html?auction=674&page=5> (b-c). www.bksh.al
- 25- f251 Moreno Neri "Pletone Trattato delle virtu" Bompiani Testi a Fronte, Milano 2010
- 26- it.wikipedia.org/wiki/Denominazioni_dei_Greci
- 27- f64 Arif Mati "Mikenet=Pellazget" Tirane, Plejad, 2008
- 28- f 43 Nermin Vlora Falaski "Prona gjuhesore dhe gjenetike" 1997
- 29- (a) <http://www.forumishqiptar.com/threads/118026-Gjetjet-arkeologjike-në-Kroaci> (b)
www.romanoimpero.com/.../il-culto-di-opi.html
- (c) http://it.wikipedia.org/wiki/Arma_bianca (d)
[http://www.thekeep.org/~kunoichi/kunoichi/themestream/min.html#.UijwieNOJH0#ixzz2e3\\$jfDo](http://www.thekeep.org/~kunoichi/kunoichi/themestream/min.html#.UijwieNOJH0#ixzz2e3$jfDo)
- (e) (Monogramma di Cristo, sec. IV) www.scalarchives.it
- 30- f24 Petro Zhei po aty (samloke)
- 31- f49,50 Petro Zhei po aty (samloke)
- 32- f306 BIBLA– Dhjata e Vjeter dhe Dhjata e Re (botuar nga Shoqata shqiptare e Bibles, 1995)
- 33- f306 Bibla po aty (samloke)
- 34- [http://www.forumishqiptar.com/threads/123176-Veshjet-llire-dhe-frizuarat-e-tyre-\(dijathtas\)](http://www.forumishqiptar.com/threads/123176-Veshjet-llire-dhe-frizuarat-e-tyre-(dijathtas))
<http://fr.wikipedia.org/wiki/Shamash>
- 35- f.277 Arif Mati "Mikenet=Pellazget" Tirane, Plejad, 2008
- 36- (a) Flickrriver: Photoset 'Etruscan Civilization' by ЯАFIK ☺ BERLINTwo men retrieving a dead comrade.
www.flickrriver.com (b) Albrecht Dürer, *Portrait de Sigismond de Lûembourg, empereur du Saint-Empire*, vers 1510-1513.
http://fr.wikipedia.org/wiki/Aigle_%C3%A0_deŭ_t%C3%A0tes
(c) Qostek, shk19, Tepelene. «Veshje popullore shqiptare », Instituti i Kultures Popullore, vol I, f 101
- 37- f46, 87 Petro Zhei po aty (samloke)
- 38- (a) ilsalottodellestreghe.forumcommunity.net(b) The Original Black Cultures of Eastern Europe and Asia realhistoryww.com (c)
http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/3/3c/Pope_Benedict_XVI_1.jpg
- 39- (Gerhard Herm « L' avventura dei Fenici » Garzanti, 1974), f58 Xhuzepe Katpano, po aty
- 40- f65 Petro Zhei po aty (samloke)
- 41- f320 Bibla po aty (samloke)
- 42- f333, Bibla po aty (samloke)
-

43- f.382 Arif Mati "Mikenet=Pellazget" Tirane, Plejad, 2008

44- (a) Reliquary of the True Cross at the Church of the Holy Sepulchre, Jerusalem.
http://en.wikipedia.org/wiki/True_Cross. (b-c) San Miniato al Monte (Florence) - Apsidal Mosaic
(d) http://fr.wikipedia.org/wiki/Repr%C3%A9sentation_artistique_de_J%C3%A9sus_Christ

45- f107 Ungjilli sipas Gjonit. BIBLA po aty (samloke)

Nia Propagando

Esperanto ekspozicio en Pakistano

Jen estas mi Adeel Mahmood Butt, juna, aktiva kaj vigla Esperantisto kaj Reprezentanto de ILEI en Pakistano ekde 2012.

Je la 26a de februaro, 2012 okazis la unuan Ekspozicion en Nankana Sahibo la tuta historie de Pakistana E-movado.

Kaj ĉijare, du ekspozicioj pri Esperanto Lingvo kaj Kulturo okazos en du gravaj urboj de Pakistano.

La 1^a Ekspozicio okazos en Nankana Sahibo ĉe Govt. M.C. Altlernejo je la 23^a de februaro dimanĉe kaj la 2^a okazos en Islamabado (ĉefurbo) je la 23^a de marto ĉe Internacia Islama Universitato.

En ĉituj ekspozicioj, ni provos montri la rolon de Esperanto lingvo nacie kaj internacie en Edukado, Socialmedio kaj Interkomunikado al partoprenontoj kaj donos broŝurojn en nacia lingvo, ke oni facile komprenu la aferon.

Mi havas unu peton al vi, se eblas sendi nin la esperanto-vortaroon en via lingvo kaj aliaj utilaj materialoj, kiuj povas helpi nin prezenti bone al niaj partoprenontoj.


Mi antaŭdankas pro via legado la mesaĝon. Mi atendas pozitivan respondon de vi.

Amike,
Adeel Mahmood Butt
ILEI-Reprezentanto en Pakistano
Estro de Pakistana Esperanto-Instituto

www.esperantopk.weebly.com
www.fb.com/esperanto.pk

Adreso:
Adeel Mahmood Butt
Pakistana Esperanto-Instituto
Ward No. 11, Near M.C. High School
39100 Nankana Sahib, Pakistano

Karikatura bildkarto el la jaro 1913



La franca barono **Félicien MENU DE MÉNIL** [mönü dö meni] naskiĝis la [16-an de julio 1860](#) en [Boulogne-sur-Mer](#) kaj mortis la [28-an de marto 1930](#) en [Neuilly](#) (apud [Paris](#)) estis konsulo kaj muzikisto.

Li esperantistiĝis en [1901](#), abunde skribis artikolojn en preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj, same kiel propagandajn tekstojn en franca lingvo, kaj fariĝis komitatano de [Societo Franca por la Propagando de Esperanto](#). Krome li estis direktoro de *Franca Esperantisto* kaj *Franca Esperantiste* kaj ĉefredaktoro de [La Revuo](#). Ekde [1919](#) Menu de Ménénil membriis en [Lingva Komitato](#). Li estas precipe konata kiel „la muzikisto de Esperanto“. Li verkis multajn melodiojn kaj kantojn kaj ĉiuj esperantistoj konas lian muzikon de la himno [La Espero](#), kiu kvankam ne la unua iom post iom oficialiĝis.

Krome li verkis:

L'Heritage Klodarec, unuakta prop. komedio, 1906

La mortigistoj de Stradella, rakonto, samjare en la septembra numero de *La Revuo*

Les préjugés contre l'E, 1908

Muzika Terminaro, 1908

**Artfajraĵo de gimnastiko "Esperanto" spektita de 200.000 homoj en Germanio.
Novjaraj pensoj pri Esperantujo kaj ĝia estonteco**

Saluton!

Fine de decembro 2013 kaj dum januaro ĝis hodiaŭ okazis en Germanio turneo de gimnastika prezento "Artfajraĵo de gimnastiko" kun la aldona nomo "Esperanto". La organizantoj priskribas nian lingvon kiel "la rekonita mondlingvo", kiu ligas plej diversajn kulturojn - kaj same ligas gimnastiko: "La mondo parolas unu (korpo)lingvon". Dum la turneo oni eĉ prezentis kanton en Esperanto.

Okazis trideko da prezentoj, estis 200.000 spektantoj - vidis la antaŭajn anoncojn kaj la postajn gazetajn raportojn do pluraj milionoj da homoj en Germanio. Ĝuu unu minuton de la prezento sur

<http://www.tsf-showwelt.de/cms/veranstaltungen/die-offizielle-tui-feuerwerk-der-turnkunst-seite/home/>

por konvinkiĝi, ke jen verŝajne la plej impona flanka prezento de nia lingvo ekde longega tempo.

Elirante de tiu evento mi verkis novjaran saluton 2014. Mi mencias diversajn aliajn amikajn atentigojn pri nia lingvo (BMW/Mini, British-Telecom-kompanio, granda kaj luksa germana hotelo "Esperanto"...) kaj demandas min, kion signifas tiu subteno al nia lingvo. Kaj kion ni faru estonte por ankoraŭ plu disvastigi la mesaĝon pri la ekzisto kaj la ĝua uzado de nia lingvo.

<http://www.esperantoland.org/eo/plu.php?msgid=1174>

Ja estas iom longa teksto - sed venis sufiĉe favoraj komentoj de homoj al mi, kiuj ŝatis la enhavon. Eble konsideru iom legi en ĝi.

Ĉion bonan por 2014, multajn belajn Esperanto-horojn, -tagojn, -jarojn, ĝuu Esperanton (kaj parolu pri tio :-)

Lu

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand

Internaciaj ferioj

<http://www.esperantoland.org>

PRINTEMPE

SOMERE

Novjara Renkontiĝo (NR)

Novjara Internacia Semajno (NIS)

Libroservo

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg, DE-37412
Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo

Tel. 05521-5983 E-poshto: esperanto-zentrum@web.de
27.01.2014

Saluton,

sep-persona Esperanto-delegacio el Herzberg...la Esperanto-urbo partoprenis lastan sabaton la grandegan prezentadon "Esperanto - Feuerwerk der Turnkunst" (Esperanto-Turneo 2014 - Artfajrajho de gimnastikarto) en Braunschweig.

Dum kelkaj semajnoj konstante informis la gazetaro, oni varbis per multaj radiostacioj por la "Esperanto-turneo 2014" kaj ofte oni skribis pri la "agnoskita mondlingvo Esperanto" kaj lingvo de la estonteco. Bv. legi, kio okazis en lasta sabato en la granda "Volkswagen-Halle" dum du trihoraj prezentadoj kun po 10.000 spektantoj.

Ni akiris la novan kompaktdiskon (KD/CD) de Olivia Irmengard Grassner el Hanovro.

Sur ghi estas la "Titelsong", fakte temas pri la Esperanto-himno, sed en moderna kaj alloga komponformo. Ni aĉetis ankaŭ modernajn T-chemizojn en tri div. koloroj kun la teksto "Esperanto-Turneo 2014". Chie pendis grandaj varbafishoj kaj ili disdonis la programkajerojn kun multaj informoj pri la Esperanto-filozofio kaj kun la teksto de la kompleta Esperanto-himno en Esperanto kaj en germana traduko. Pli favorajn vortojn kaj frazojn pri Esperanto eĉ nia E-movado ne povus formuli.

Che la komenco oni informis per laŭtparoliloj, kial la nunjara temo (motoo) estas Esperanto.

Same la prezidantino de la Gimnastika Ligo en Malsupra Saksio (Niedersächsischer Turnerbund) laudis publike la ideon kaj la oficialan lingvon Esperanto.

La juna talenta kantistino Olivia Irmengard Grassner el Hanovro detale klarigis, kial ŝi ŝatas Esperanton, kial ŝi kune kun Fabian Sievers novkomponis la Esperanto-himnon (titola kanto / Titelsong), kial ŝi kantas en la lingvo Esperanto kaj ke Esperanto estas la nova internacia "teamsento", kiu etosigas chiujn partoprenantojn.

Nun ni trovis filmfragmenton kun la kantistino Olivia Grassner (kun vigla knabina koruseto) el Hanovro.

Bv. iom spekti kaj ghoji mem:

<http://vimeo.com/83774499>

Fotoj pri la vizito en Braunschweig (Brunsvigo) kaj skanitaj gazetartikoloj estas videblaj sub:

http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=43510078

Ni ghojas, ke tiu pozitiva kaj moderna "Esperanto-miraklo" estis kreita en nia "GEA-EMAS-regiono Malsupra Saksio".

La firmao TUI kune kun NTB (Niedersächsischer Turnerbund) kreis la unikan Esperanto-Turneon 2014.

Certe milionoj audis kaj legis ec kelkfoje (tre pozitive) pri Esperanto kaj pli ol 200.000 vizitintoj en multaj germanaj urboj mem aŭdis kaj spertis tre pozitive pri Esperanto. Elstara reklamo!

Ofta ripetado efikas. Ghuste pro tio ankau ni, la GEA-Filio en Herzberg...la Esperanto-urbo, ofte informas la gazetaron, radio- kaj televidstaciojn pri la Esperanto-ideo kaj Esperanto-kulturagadoj. Ghojigas nin, ke en la lastaj tagoj kelkaj novaj interesighantoj petis informon pri Esperanto kaj pri niaj lingvokursoj.

Amike salutas

Petro Zilvar kaj Zsofia Korody

--

<http://esperanto-urbo.de> (multlingva)

Esperanto-instruado, biblioteko, muzeo je via servo:
Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg
D-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo
Grubenhagenstr. 6, Tel: [+49/\(0\)5521-5983](tel:+4955215983)

<http://www.herzberg.de>

<http://ic-herzberg.de> (kun fotoalbumo)

Informaĵoj

Informinterŝanĝo

Iniciatoj multiĝis dum la lastaj jaroj por faciligi tutmondan informinterŝanĝon per la lingvo la plej justa kaj neŭtrala.

ASOAN Novaĵoj en Esperanto /ASEAN News in Esperanto

ASOAN estas [Yahoo-grupo](#) kaj ankaŭ [blog](#) fonditaj en 2013 por informinterŝanĝo en Esperanto por landoj, kiuj konsistigas la Asocion de Sud-Orient-Aziaj Nacioj : angle : Association of Southeast Asian Nations, ASEAN — france : Association des nations de l'Asie du Sud-Est, ANASE.

Fondita en Bangkoko, Tajlando, en 1967, fare de kvin landoj ĉefe de Sud-Orienta Azio, ASOAN estas politika, ekonomia kaj kultura organizaĵo, kiu arigas nun 10 ŝtatojn-membrojn kun entute ĉ. 558 milionojn da loĝantoj (Eŭropa Unio = ĉ. 500 milionoj) :

- [Indonezio](#) (1967)

- [Malajzio](#) (1967)
- [Filipinoj](#) (1967)
- [Singapuro](#) (1967)
- [Tajlando](#) (1967)
- [Brunejo](#) (1984)
- [Vjetnamio](#) (1995)
- [Laoso](#) (1997)
- [Birmo](#) (1997)
- [Kamboĝo](#) (1999)

[Global Voices en Esperanto](#)

Global Voices (Tutmondaj Voĉoj) estas la internacia reto de blogistoj kiuj tradukas, raportas kaj defendas blogojn kaj la civitanajn komunikilojn ĉirkaŭ la mondo en 35 lingvoj inkluzive en Esperanto. La unua komuniko #1 aperis unue ĉe **GlobalVoices**: [Internacia Virina Tago 2014 : Alvoko el Hiroŝimo](#)

[Klaku.net - via demokratia amaskomunikilo](#)

Klaku estas Esperantlingva novaĵretejo lanĉita de Joan Català, kataluna poligloto, kiu ebligas tutmondan diskonigon de ege diversaj informoj, inkluzive pri la lingvo de la retejo.

[STUDIO](#)

Studio estas portalo de interreta radio-televido lanĉita en julio 2011 fare de Robert Poort, nederlanddevena stevardo vivanta en Las Vegas, Nevado, Usono.

[LabourStart](#)

LabourStart estas 27-lingva tutmonda reto de sindikata solidareco fondita en 1998 fare de [Eric Lee](#) (Nov-Jorko), aŭtoro de "**The Labour Movement and the Internet: The New Internationalism**" (La laborista movado kaj la nova internaciismo). Li estis inter la unuaj, kiuj aldonis Esperanton sur multlingva retejo.

Informis Germain Pirlot

La ĵurnalismo en Esperanto

La unua pioniro pri ĵurnalismo en Esperanto estis la polo [Alexander Brzostowski](#), kiu lernis la lingvon en 1889, du jarojn post apero de la [Unua Libro](#) (lernolibro fakte kun prezento de la lingvo).

La anglalingvanoj ne estis la lastaj en subteno al la ideo. Granda figuro de la brita ĵurnalismo, [William Stead](#), kiu mortis en la katastrofo de Titanic dum li iris al konferenco en Novjorko, alportis decidigan subtenon al la lingvo per disponigo de lokalo en la sidejo de sia prestiĝa publikaĵo "[Review of Reviews](#)" kaj per aperigo de artikoloj pri Esperanto. Same faris [George McClellan Harvey](#), kiu fariĝis ambasadoro de Usono en Britio, en sia "[North American Review](#)".

La plej elstaraj ĵurnalistoj en la mondo de Esperanto estis certe la sviso [Edmond Privat](#) kaj la kroato [Tibor Sekelj](#), du personoj kies tereno de kompetenteco estis vastega.

La ĵurnalismo en Esperanto komencis organiziĝi nur tre malfrue, en 1946, per la fondo de [Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio](#) (TEĴA) kiu havas 131 membrojn en 41 landoj de la kvin kontinentoj. Legata en 68 landoj, la monata magazino "[Monato](#)" havas 123 korespondantojn kaj kunlaborantojn en 43 landoj.

Ĝin fondis, en 1980, Stefan Maul, kiam li estis direktoro de la politika sekcio de la gazeto "[Augsburger Allgemeine](#)". Li estas ankaŭ la aŭtoro de "**Deklingva manlibro pri politiko**" kaj kunaŭtoro de "**Manlibro pri ĵurnalismo**".

Ĝinio nuntempe viciĝas unualoke en profesia aplikado de Esperanto en ĵurnalismo kun la [Ĉina Interreta Informa Centro](#), la revuo "[El Popola Ĝinio](#)" kaj [Ĉina Radio Internacia](#), kies Esperanto-redakcio, nuntempe dekdu-membra, ekzistas jam de 1964 ([foto](#)). Ĝin sekvas sur la radiofonia tereno [Vatikana Radio](#) kaj [Radio Havano Kubo](#).

La monata gazeto "[Le Monde diplomatique](#)" (Diplomatia Mondo) havas interretan version en la Internacia Lingvo jam de 1999.

La plej freŝdata iniciato ŝuldiĝas al Robert Poort, stevardo en Las Vegas, Nevado, kiu fondis en julio 2011 la portalon de radio-televido [Studio](#).

Journalistino de [Ĉina Radio Internacia](#), Zhang Ping (pseŭdonomo "Ĝoja") turneis en Francio pasintan novembron. Sinteza raporto kun fotoj kaj gazetartikoloj estas interrete legebla :

[\(EO\) — Sinteza raporto pri la turneo de Zhang Ping](#)
[Turneo de Ĝoja \(Zhang Ping\) en Francio, novembro 2013](#)

Por persono ne scipovanta Esperanton, la fakto ke Esperanto estas unu el la lingvoj de la servo de aŭtomata tradukado de Google ([Google Translate](#)) ebligas kompreni la enhavon de artikoloj kaj tekstoj en tiu lingvo.

* Se elŝuto estas neebla, mi povas sendi la dokumenton laŭ simpla peto (2,6 Mb).

Nova projekto Erasmus plus

Karaj!

Ĉu eble iu volus partopreni en la nova eŭropa projekto Erasmus plus? Tio estas ne nur por altlernejoj, sed ankaŭ por aliaj! Mi laboras en baza lernejo! Mi jam unufoje partoprenis Comenius -projekton.

Amike

Teresa Konsek, Rybnik, Pollando

konsek1@poczta.onet.pl

ZAMENHOFAJ TAGOJ EN BYDGOSZCZ kaj TORUN

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) okazigis dum 6-12 de decembro 2013 Zamenhofajn Tagojn en Bydgoszcz kaj Toruń. Dum la tri unuaj tagoj okazis Kurso pri Diplomatio en Muzeo de Diplomatio de Univeritato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz, gvidata de Prof. d-ro hab. Adam Sudoł, Bakalaura-magistra Seminario de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) sub gvido de Prof. d-rino hab. Aleksandra Kowalczyk kaj autora renkontiĝo kun Prof. d-ro hab. Mieczysław Wojtasik, kiu laste eldonis helpe de ISTK kaj Skonpres siajn 125 aforismojn en pola kaj Esperanto lingvoj – "Kolce ĉicia – Pikiloj de vivo" (prezo 3 EUR kun sendokostoj). Sian diplomverkon por AIS sub titolo "Radio de Taghikio en la jaroj de sendependeco" - prezentis Saidmurodi Khojazod – Prezidanto de Esperanto Asocio en Tadhikio. Okazis kunvenoj por kandidatoj vojaghi kun Esperantotur ankaŭ lau la 16 vojaghvariantoj lige kun la 99 Universala Kongreso de Esperanto en Bona Aero – 2014, kiujn akompanis filmoj de mag. Romuald Puciul kaj red. Roman Dobrzyński. Dimanche, la 8.12.2013, sub gvido de Esperanto-chicherono – Ascii. Andrzej Grzebowski okazis vizitado de ZEO-j en Bydgoszcz. Ankaŭ prelegis pri Norvegio Cato Haugen el Esperanto Klubo en Oslo. Lunde multmedian prelegon pri Heroldo de Esperanto kaj vivo de Ada Fighiera-Sikorska prezentis red. Barbara Pietrzak – Estraranino de UEA, kiu renkontighis ankaŭ kun vojaghantoj por

monata vojaĝo al Brazilo kaj al Bona Espero (el Finnlando, Italio, Pollando kaj Svedio). La prelego estis kontribuo al Internacia Tago de Esperanto-Libroj. En Urba Centro de Kulturo (MCK) en Bydgoszcz okazis Zamenhofa Vespero en Bydgoszcz, dedichita al poemoj de Ludviko Zamenhof kaj Julian Tuwim, kiujn prezentis Urszula Tupajka kaj Julita Kurek el Bydgoszcz kaj Teresa Nemere kaj Henryk Gąsiorowski el Toruń – kadre de violona koncerto. La Zamenhofan Vesperon nome de PEA – Filio en Bydgoszcz gvidis Helena Skonieczka – Prezidantino de E-Klubo “Esperanta Amiko” che Pola Asocio de Nevidantoj en Bydgoszcz. Ĉiuj ricevis Kalendaron por 2014 de SKONPRES, la libron de Prof. Mieczysław Wojtasik kun aforismoj kaj Turisman Esperanto-Kalendaron 2014.

Marde okazis ankaŭ multimedia prezentado de nova gvidlibro pri Bydgoszcz “Dobre adresy – Bonaj Adresoj” de red. Konstanty Dombrowicz, esperantisto, eksa Prezidento de Urbo Bydgoszcz. Ĉapitro n-ro 73 (inter 204 ĉapitroj) pagho 110 estas dedichita al Esperanto en Bydgoszcz (kun foto de nia Centro, prezo 12 EUR kun sendokostoj kaj por ambau eldonajhoj – 15 EUR).

Merkrede ni vizitis urbon Toruń – en Etnografia Muzeo chicheronis en Esperanto mag. Maria Pokrzywnicka – estrino de Eduka Fakto de la Muzeo kaj en la urbo kaj Domo de Nikolao Kopernik – chicheronis en Esperanto mag. Teresa Nemere.

La lastan tagon – jhaude, la 12-an de decembro okazis ekzamenoj por lingvoniveloj B1 kaj B2 de Esperanto laŭ kriterioj de Konsilio de Europo. La kvartagajn preparprelegojn por la ekzamenoj gvidis ASci. Regina Grzebowska kaj mag. Mirosława Korniluk. La diplomojn enmanigis Direktoro de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK) – mag. Jerzy Kołomyjec. Dum la Fermo de la Zamenhofaj Tagoj kun la 46-a Studadsesio de ISTK/AKB oni pridiskutis bus-vojaĝon dum 20.06-15.07.2014 al “NORDKAP-2014” kun partopreno en 24 Internacia Esperanto-Kongreso (24 IEK) en Bydgoszcz (20-27.06) kaj en 50 Baltaj Esperanto-Tagoj en Jelgava (Latvio) dum 28.06-05.07.2014 kaj kun plia busvojaĝo tra Estonio – Finnlando – Laponio- kun NORDKAPP – 2014 (Norvegio) ĝhis Oslo. Detaloj sekvos. Fine oni partoprenis la malfermon de Universitata Ponto en Bydgoszcz – longa je 1548 metrojn – situanta apud Ponto de Esperanto en Bydgoszcz. Dum la inauguro okazis internacia piedkurado de kelcent “Sanktaj Nikolaoj”.

Nun Vi povas alighi al la nova semestro dum 25.01-24.04.2014 de ISTK - Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz – la trimonata studado eblas ankaŭ kun 90-taga Shengen-vizo por Europo– la semestro kostas 200 EUR. Eblas ankaŭ alighi por Internaciaj Kursoj de Esperanto, angla kaj franca lingvoj dum 25-31.01.2014 sub gvido de Anne Grentie el Francio, kio kostas 150 EUR kun 7 tranoktoj en Bydgoszcz dum 25-31.01.2014. Oni povas ankaŭ veni por finekzamenoj de ISTK pri turismo kaj kulturo kun partopreno en 39 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kaj la 47-a Studadsesio de ISTK/AKB/AIS dum 12-19 de aprilo 2014, eble ankaŭ kun BUS/SUS de AIS, ĉar jam estas 15 kandidatoj por ekzamenighi che AIS en Bydgoszcz. La 39 E-Tagoj de Bydgoszcz kun la 47-a Studadsesio de ISTK/AKB koston ankaŭ 150 EUR. Se Vi samtempe alighos por Kurso pri Diplomatio kun loĝado en studentaj domoj de Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz – kune 350 EUR. Se Vi kapablas organizi grupojn – ankaŭ de “krokodiloj” – de chiu aliginto Vi ricevos 15% rabaton, do, alighante 7 kandidatojn Vi studos kaj loĝos kun ili senpage (7x 15% = 105%) en Bydgoszcz.

Bonvenon en Pollando!

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo – AKB (Klerigejo de AIS en Bydgoszcz)

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo

Internacia Klubo “Esperantotur”

str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

tel./fakso: (48-52) 346-11-51,

stud@esperanto.bydgoszcz.eu ; andreo@rubikon.net.pl ; info@esperanto.bydgoszcz.eu

Banka konto: Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz

Konto n-ro (IBAN): PL 80 13201117 2034 0100 2000 0001,
SWIFT kodo POCZPLP4 por Internacia Centro
au pagu al nia subkonto che UEA “ickt-j” kaj informu.

Ni funebras

Mi informas chiujn pri la forpaso de profesoro Helmar Frank, unu el la granduloj de nia movado en la dua duono de la pasinta jarcento.

Kondolencajn mesaghojn vi povas lasi en la pagho <http://edukado.net/novajhoj?id=411>

de: [edukado.net <redaktanto@edukado.net>](mailto:redaktanto@edukado.net)

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldonighis nova ero che Novajhoj.
Jen estas kelkaj informoj pri ghi:

Titolo: Forpasis profesoro Helmar Frank

Kategorio: Laste en la movado

Teksto: Kun malghoj ni informas vin ke forpasis profesoro Helmar Frank, iniciatinto, fonda prezidanto kaj multjara motoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Lian vivresumon vi povas legi kaj lasi kondolencajn vortojn en nia Panteono, kien li - pro siaj meritoj - eniris jam en 2010.

Legu pli che la pagho: <http://edukado.net/novajhoj?id=411>

Scivolemajoj

Nova veturilo



**Ĉu vi volas fuĝi de la ĥaosa
trafiko? Se jes, enparkerigu tiun**

Ĉi nomon: TF-X.

Ĝi estas la unua aŭtomobilo, kiu povas esti kondukata tra la tero kaj tra la aero, same kiel la famaj flugveturiloj de la kina klasikaĵo Blade Runner.

Kun fasono simila al tiu de privata aviadileto, TF-X estas ekipita per elektra motoro, kvar radoj kaj du flugiloj, kiuj faldeblas, por ke ĝi povu esti stirata kiel "normala" aŭto.

La nordamerika entrepreno Terrafugia, respondeca pri la inventaĵo, promesis, ke ĝi estos aĉetebla en la venonta jaro! Estas vere: jam en 2015.

La modelo estis projektita por trairedi longajn distancojn, kaj sur la tero, kaj en la aero.

Ĝia flug-aŭtonomeco estas minimume je 500 kilometroj.

Ĝi estas kapabla deterigi kaj surteriĝi tute aŭtonome, sen bezoni la agadon de la stiranto/piloto.

En nur kelkaj sekundoj la malgranda aviadileto transformiĝas en aŭtomobilon, kiu povas esti metita en garaĝon.

	<p>La spaca teleskopo Hublo kaptis bildojn de 58 malproksimaj galaksioj, kiuj neniam estis vidataj antaŭe. Ili estus ekzistintaj en la universo antaŭ 13,2 miliardoj da jaroj, laŭ la sciencistoj de NAKA.</p> <p>Ĉar la lumoj vojaĝas po preskaŭ 10 miliardoj da kilometroj jare, ankoraŭ eblas, danke al la profunda bildokaptebleco de Hublo, observi tiajn forajn punktojn en la universo.</p> <p>Por kapti la bildojn, la spaca teleskopo estis direktita al la regiono de la spaco nomata Abell 2744, kiu estas galaksi-amaso.</p> <p>Laŭ NAKA, temas pri la plej malgrandaj, plej malfortaj kaj plej multenombraj galaksioj neniam antaŭe viditaj en la fora universo. Ili estis kaptitaj post profundaj eksponoj de Hublo, per transviola lumoj.</p>
--	--

PROFESORO-SCIENCISTO KREIS PILOLON POR VEKI LA ABSOLUTAN SONSENTON

	<p>Post esploro, kiu estis publikigita en la scienca periodaĵo <i>Frontiers</i>, la profesoro pri Ĉela kaj Molekula Biologio, Takao Hensch, el la Universitato Harvardo (situanta en Kembriĝo, Masaĉuseco, Usono), asertis, ke</p>
--	---

	<p>li kapablas "instrui" plenkreskulojn disvolvi sian absolutan sonsenton, per pilolo, kiu vekas denove en la cerbo la lernokapablon montratan de la infanoj. La absoluta sonsento – la kapablo identigi ian ajn aŭdatan muziknoton – estas tre malofta kompetenteco, trovata je 1 homo ĉe ĉiu 10-mil-homa grupo.</p> <p>Artistoj ekzemple de Michael Jackson kaj Ella Fitzgerald posedis tiun kapablon, kiu nun estas akirebla de iu ajn homo, eĉ se jam pasis la tempo, en kiu tiu talento kutimas aperi, laŭ diris la sciencisto.</p> <p>La raporto de la esploro detalias, kiel homoj sen ia ajn muzika sperto submetiĝis al la testo, per la uzo de la kontraŭepilepsia pilolo Valproato, kaj havis testita sian kapablon identigi sonojn. La testita grupo prezentis rezulton pri la eksperimento pli bonan ol tiu, kiu estis atendita.</p>
--	--



FIBRORIĈA DIETO HELPAS PREVENTI LA ALERGIAN ASTMON

06-01-2014

	<p>Dieto plena je alte fibrenhavaj fruktoj kaj vegetaĵoj kontribuas por preventi la alergian astmon, dank' al la protekta efiko de la fibrofermentado far la intestaj bakterioj, laŭ konkludis studaĵo realigita de svisaj esploristoj.</p> <p>La esploro, kunordigita de la Universitata Hospitalo de Vaudo (en la urbo Laŭzano, Svisio) kaj publikigita en la revuo Nature Medicine, montras la rilaton inter la plioftiĝo de la kazoj pri alergia astmo dum la lastaj 50 jaroj en la okcidentaj landoj kaj la ĝeneraligita malpligrandiĝo de la konsumo de fruktoj kaj vegetaĵoj.</p> <p>Por alveni al tiu konkludo, la sciencistoj faris eksperimentojn ĉe musoj, ĉar la karakterizoj de iliaj imunsistemoj ne diferencas substance de tiuj de la homaj estuloj, laŭ eksplikis per komunikaĵo la Svisa Nacia Fonduso, kiu financas la studaĵon.</p>
--	---

MARS ONE ANTAŬ-SELEKTIS MIL KANDIDATOJN POR (HOM)LOĜATIGI

MARSON


	<p>La nemonprofita entrepreno Mars One antaŭ-selektis pli ol mil homoj, kiuj kunkonsistigos la grupon de la "unuj loĝantoj" de la ruĝa planedo.</p> <p>La selekto estis farita el inter 200 mil homoj el 140 landoj. Entute 1.058 estis aprobitaj al la dua fazo de la selektado, laŭ informis Mars One.</p> <p>"La defio pri la 200.000 enskribiĝintoj estis tio, elapartigi tiujn, kiujn ni kredas kapablaj</p> <p>- mense kaj fizike - por la misio kiel homaj ambasadoroj en Marso, disde tiuj, kiuj ne vivas la vivon serioze", - sciigis Bas Lansdorp, fondinto kaj prezidanto de Mars One.</p> <p>La venonta paŝo de la organizaĵo estas finselekti, post diversaj etapoj, la 24 teranojn, kiuj vojaĝos, dum 9 monatoj, al Marso, po 6 grupoj por ĉiu homkvaropo. La unua grupo devos esti kondukata en 2024.</p> <p>Memorindas, ke ĝi estos senrevena vojaĝo. La koloniontoj iros por vivi en malgrandaj domoj, kiuj estos senditaj kaj muntitaj antaŭe de robotoj. Por postvivi, ili devos produkti oksigenon kaj kultivi siajn proprajn nutraĵojn.</p>
--	--

FONTO: <http://www.thrive.com.br/mars-one-pre-seleciona-1-000-candidatos-para-colonizar-marte/>

PILOTO RAPORTAS PRI PRESKAŬA KOLIZIO KUN NIFO

	<p>Fluginte super Unuiĝinta Reĝlando, piloto deklaris, ke li observis neidentigitan flugantan objekton, kiu flugis en la direkton al lia kondukata aviadilo.</p> <p>La incidento okazis en la ĉielo de la urbo Berkŝajro kaj koncernis Airbus A320, dum unu ties ordinara flugveturo.</p> <p>La aviadilo estis fluganta 34.000 futojn alte, kiam la piloto observis strangan arĝent-koloran objekton veturantan direkte al li, samalte.</p> <p>“Havante tre malmultan tempon por priagi, la piloto tute certis, ke ili estis en kolizikurso, sen tempo por reakcii”, - laŭ priskribas raporto pri la incidento.</p> <p>“Lia tuja reakcio estus movi la aerveturilon dekstren kaj alarmi la ĉefoficiron, sed estis tempo por nenia ajn alarmo”.</p> <p>Poste la piloto raportis tiun sian travivaĵon al enket-komisiono, priskribante la objekton, kiel havantan formon tian, kia arĝentkolora metala cigaro.</p> <p>La incidento devus esti okazinta okcidente de la Flughaveno Heathrow.</p> <p>Enketistoj, kiuj enketis pri la incidento, asertis, ke ne eblis trovi pruvojn aŭ klarigojn pri la raporto de la piloto.</p> <p>“Ne estis eble lokalizi la objekton, nek identigi la probablan kaŭzon de la observado”, - ili konkludis.</p>
--	--

SCIENCISTOJ ĴUS SURMAPIGIS LA EMOCIOJN DE LA HOMA KORPO



Por surmapigi la sentojn de la homa korpo, grupo de biomedicinaj inĝenieroj el la finna Universitato de Aalto faris esploron ĉe 700 volontuloj el Finnlando, Svedujo kaj Tajvano.

La esplorado estis submetita al pluro da emociigaj videaĵoj, bildoj kaj historioj, por sperti specifajn emociojn.

Ili havis siajn siluetojn vidigitaj per komputilo, kiu kaptis iajn ajn pliintensiĝojn kaj malpliintensiĝojn de

	<p>iliaj sentaj aktivigoj.</p> <p>La rezultoj elmontris, ke la feliĉeco kaj la deprimado estas la emociaj statoj plej kontrastigitaj. La amo pligrandigas la korpan aktivigon, kaj la deprimado malpligrandigas ĝin. La emocioj kun malpli da aktiveco en la kapo estis la malgajeco, la deprimado kaj la senemocio. Alie, la sentoj, kiuj plej aktivis en la brakoj, estis la amo, kolero, feliĉeco kaj orgojlo. La brusto estis la regiono plej aktivigita de preskaŭ ĉiuj ili, escepte de la sensenta kaj deprimata emocioj.</p>
--	---

	<p>JJ povas esti la unua hundineto rajti resti en la ĥirurgiejo de la fama Kuracista Centro de la Universitato Duko, en la urbo Durhamo (Norda Karolino, Usono).</p> <p>Ĝi kapablas senti kiam la infanino KK, 7-jara, baldaŭ spertos mort-riskan krizon.</p> <p>Ĝi estis dresita por flari kaj reakcii ĉe la komencigo de mastocitozo (rara malsano, karakterizita de la nenormala akumulado de mastocitoj en la haŭto, osta medolo kaj internaj organoj, kiaj la tuberoj de la hepato, la lieno kaj la limfaj ganglioj).</p> <p>JJ nuntempe estas la malgranda “monitoro” de la knabino, kaj ambaŭ ili estas nedisigeblaj. Kiam la hundineto perceptas,</p>
--	---

	<p>ke io ne estas en ordo, ĝi saltas sur la liton kaj ekstrenas la vestaĵojn de la knabino.</p> <p>La plimulto el la sciencistoj kredas, ke la hundoj sentas subtilajn ŝanĝiĝetojn en la homaj statoj, laŭ informis D-ro Lawrence Myers, lektoro pri la bestaj sintenoj, el la Universitato de Aŭburno.</p> <p>“Fakte la hundoj tre interesigemas pri siaj homaj posedantoj, kaj ili tre atentemas pri ni”, diris Myers, ĉefe pri la sinteno de la homoj, kiuj kunvivas kun ili.”</p> <p>La hundineto JJ “estas la malgranda gardanĝelo” de Kaelyn Krawczyk, alnomita “KK”, laŭ diris ties patrino dum intervjuo al la TV-reto NBC.</p>
--	---

Politiko

Analiza novaĵletero de la Veromovado de Berkshire kaj la grupo 'Keep Talking', Britio, por novembro-decembro 2013 (2013-12-20)

- * La Popola Voĉo – nova televidkanalo
- * Ĉu la amaskomunikiloj tradiciaj fleksiĝas pro la alternativaj?
- * Ĉu universitatoj estas koruptitaj?

*** La Popola Voĉo – nova televidkanalo**

La granda paroltemo en la brita veromovado dum la pasintaj kelkaj semajnoj estis la starigo de nova rekt-elsenda televidstacio 'The People's Voice' [La Popola Voĉo] (<http://www.thepeoplesvoice.tv>). Tiun organizas David Icke, kiu lanĉis la amaspeton por £100 000 kaj ricevis £300 000 (<http://www.davidicke.com/headlines/85612-important-update-about-our-peoples-voice-campaign/>). Estas tutcerte multe da entuziasmo por tiu ĉi projekto,

ĉar eventuale ĝi povus atingi milionojn. Mi klarigu al iu ajn kiu estas nefamiliaro kun la brita sceno, ke kiam David Icke organizas kunvenojn li ne serĉas malaltekostan ĉambron por tridek aŭ kvardek homoj, kiel mi faras, sed li luas la futbalstadion Wembley.

Mi unue memoras konsciiĝi pri David Icke, kiam unu el miaj mokantoj dismetis, ke mi estas sekvanto de la ideo, ke la brita reĝa familio estas posteuloj de eksterteraj lacertoj. Tio estis grandega paŝo for de analizo de la kontoj de Esperanto-Asocio de Britio, sed ĝi montris, kiom krizmensaj ili devas esti. Mi elserĉis David Icke, sed ne aparte atentis pri li ĝis iom da tempo pli poste, kiam mi hazarde trovis lian retejon kaj eltrovis, ke la plimulto kion li havis por diri ja estas tre sencohavaj aferoj, almenaŭ kiam temis pri aferoj pri kiuj mi scias. Eble la lacertoj helpis al li gajni sian famulan statuson. Tamen nenion tian mi vidis en lia nova televidstacio.

La televidstacio viviĝis la 10an de novembro, kaj listo de regulaj programeroj estas provizita en ilia retejo (<http://www.thepeoplesvoice.tv/programs>). Du el niaj homoj en Keep Talking havas siajn proprajn prezentoseriojn. Ken O'Keefe havas 'Middle East Show' [Mezoriantan Prezenton], kiu estas tuja dissendo (<http://www.thepeoplesvoice.tv/ken-okeefes-middle-east-show>), kaj Mark Windows gvidas sian programon 'Windows on the World' [Fenestroj al la mondo], kiu eliras ankaŭ dimanĉe (<http://www.thepeoplesvoice.tv/windows-on-the-world>). Laŭtaga dissendo-plano (<http://www.thepeoplesvoice.tv/schedule>), kaj arĥivo de pasintaj programeroj spekteblas en YouTube (<http://www.youtube.com/user/TheTPVchannel?feature=watch>), sed necesas ĝis nun, ke tiu estu indeksita, tiel ke pasintaj programeroj povu esti facile troveblaj. Mia kolego Nick Kollerstrom diris al mi, ke li estis intervjuita en la prezento Richie Allen pri la londona bombado de la 7a de julio, 2005, kvankam li ne rajtis paroli pri eventualaj ligoj kun Cionismo "pro Offcom [la reguliga instanco]". Tamen mi trovis viglan diskuton en la Prezento Richie Allen pri Israelo, kun Gilad Atzmon, indiĝena palestinana judo kaj David Rubin, aŝkenaza setlinto (<http://www.davidicke.com/headlines/category/thepeoplesvoice/>). Mi vidas, ke eĉ iama Konservativ-partia ministro Edwina Curry partoprenis en la Prezento Allen Richie (<https://www.facebook.com/thepeoplesvoicetv/posts/270631413084307>).

* Ĉu la amaskomunikiloj tradiciaj fleksiĝas pro la alternativaj?

Mi deziras nur, ke tiaj aferoj povu esti diskutitaj pli malkaŝe en la tradiciaj amaskomunikiloj en Britio. For estas la tagoj kiam BBC povis dissendi tiajn aferojn, kiel la dokumento-filmojn en 1992 en la serio Time Watch [Tempo-Gardo] en kiu ili malkaŝis la Sekretajn Armeojn de NATO, kiuj kreadis teroristajn eventojn, kiel la bombadon de la fervoja stacidomo de Bolonjo, kulpigante politikajn ekstremistojn (<http://911blogger.com/node/3639>). Sed estas signoj, ke tiaj tempoj eble revenas, verŝajne pro premo de la alternativaj amaskomunikiloj, ĉefe interretaj, kaj alternativaj televidstacioj, kiaj la malpermesata irana kanalo Press TV, la rusa RT (per Freeview, kanalo 85), kaj nun The People's Voice [La Popola Voĉo], el kiuj ĉiuj povas esti spektataj per la Interreto. La 21an de novembro la serio Panorama, de BBC, dissendis eron pri 'La brita sekreta teror-forto' ['Britain's Secret Terror Force'], malkaŝante, ke la Brita Armeo havis sekretan sekcion, nomata 'Military Reaction Force' [Milita Reag-Forto] dum la Maltrankviloj de Norda Irlando. Membroj de MRF foje eliris en aŭtomobiloj en katolikajn regionojn kaj pafis homojn hazarde surstrate. Fine en 1972 la sekcio estis malfondita, kaj la tiutempa ĉefministro, Edward Heath, asertis, ke kio ajn sekvos MRF, ĝi devos esti laŭleĝa.

En mia aprila novaĵletero mi raportis pri nova filmo de israele naskita Ilan Ziv, nomata 'Exile

– A Myth Unearthed' [Ekzilo – mito elfosita], kiu prezentis pruvojn, ke la juda ekzilo de 70 pK ne okazis. Tiu filmo devintus jam esti dissendita de BBC, sed estis retirita lastmomente. Fine tiu filmo reaperis en la programplano de BBC sub nova titolo, 'Searching for Exile: Truth or Myth?' [Ŝercante la Ekzilon: Ĉuv ero aŭ Mito?], kvankam ĝi estis reredaktita, kun kelkaj partoj elprenitaj. Mi spektis ĝin per BBC4 la 3an de novembro. Tion sekvis team-diskuto. Konsiderante la forton de la por-israela lobio en Britio, mi surpriziĝis, ke tiu filmo povus esti elmetita per BBC, ĉar ĝi subfosas la koncepton de la reveno de la judoj al sia hejmlando en 1948, kaj do la koncepton de juda ŝtato en Israelo, kiel priskribas ĝin la Israela Deklaro de Sendependeco de 1948 (https://en.wikisource.org/wiki/Israeli_Declaration_of_Independence).

* Ĉu universitatoj estas koruptitaj?

Mi vidas, ke juda historiisto Profesoro Simon Schama verkis du-voluman libron pri La Rakonto de la Judoj, el kiuj la unua estis eldonita la 12an de septembro. Elĉerpaĵo de la libro kaj intervjuo kun Simon Schama estos publikigitaj en la novjara suplemento de Jewish Chronicle (<http://www.thejc.com/news/uk-news/110763/making-a-history-uk-jews-bbc-was-so-daunting-reveals-simon-schama>). Mi spektis lian lastatempan televidan programserion pri la temo en televidkanalo de BBC, kaj inter la unua programero en la serio kaj la dua li tutsimple pretersaltis mil jarojn da historio, kun neniu klariga vorto. Tiu estis la periodo en kiu laŭdire okazis la Ekzilo. Se estus unu afero kiun mi deziris scii pri la historio de la judoj, ĝi estus ĝuste tiu. Li deklaris sin Cionisto, sed ellasis la fundamentan historian klarigon surbaze de kiu baziĝas la hodiaŭa Cionismo. Kiel utilas akademiulo kiu simple pretersaltas tiajn demandojn? Mian atenton trafis anonco fare de University College London [Universitata Kolegio de la Universitato de Londono], ke ilia profesoro pri la hebrea kaj judaj studoj, Sacha Stern, aperis en la debato de BBC4 sekve de la surekranigo de Ekzilo (<http://www.ucl.ac.uk/ah/ah-news-publication/searchingforexile>). Li skribis en novaĵletero, "La filmo, kiun oni surekranigis antaŭ la debato, argumentas – tion kio estis ĉiam konata – ke ne estis ekzilo de judoj el Palestino post la detruo de Jerusalemo en 70 pK". Momenton – se ĉiam tiu fakto estis de iuj konata, kial ĝi estis tiom tabua temo, kaj kial akademiuloj kaj la amaskomunikiloj ne alportis tiun scion al la publiko? Li konkludis: "Tiu televidprezento estis bona publikeco por la universitata sekcio, sed ankaŭ demonstris la gravecon de historia esploro, eĉ reirante tiom en la pasintecon kiel 70 pK, por kompreni la kompleksajn situaciojn en kiuj ni hodiaŭ trovas nin" (<http://www.ucl.ac.uk/hebrew-jewish/newsandevents/1314-Hannukah-Newsletter>). Mi estus supozinta, ke la afero de la Ekzilo estas pli fundamenta rilate al la ekzisto de la juda ŝtato ol la demando pri kiom da judoj mortis en la Holokaŭsto, kaj ĉu ili mortis en labor-internejoj aŭ eksterm-internejoj. Do mi scivolos, ĉu profesoro Stern, en la interesoj de akademia honesteco, nun pretos debati tiun aferon kun Nick Kollerstrom, kiun la universitato maldungis en 2008 kiel Honoran Esplor-Fratulon (<http://globalfire.tv/nj/08en/persecution/drkollerstrom.htm>).

Mi havas kreskantajn dubojn pri la senpartieco de akademia esplorado en eĉ niaj plej respektindaj institucioj. En mia oktobra novaĵletero mi raportis pri 'konspiratoria' propaganda fako ĉe la universitato de Kembriĝo, starigita sub masko de akademia esploro. Mi raportis ankaŭ en antaŭa novaĵletero pri aliaj ĉe la Universitato de Londono kiuj propagandis torditajn difinojn de 'konspir-teorio' por ke ili senkredindigu tiujn kiuj strebas fari tion kion akedemiuloj devus esti pagataj por fari. Cetere, la Prezidanto de Esperanto-Asocio de Britio, kiu turnis sin kontraŭ min en 2006 post kiam li estis, kiel nun evidentiĝas, falsa amiko dum kvardek jaroj, edukiĝis ĉe Kembriĝo kaj profesoriĝis pri Fonetiko kaj Lingviko ĉe University College London. Nova dokumenta filmo estas publikigita pri '9-11 kaj la Akademia Komunumo' [9/11

in the Academic Community']. Reklamfilmeto spekteblas en la retejo por la filmo, de kie oni povas ĝin aĉeti (<http://911inacademia.com/2013/08/05/911-in-the-academic-community-preview-press-release/>). Estas priskribo en la retejo Dissident Voice [Disidenta Voĉo] (<http://dissidentvoice.org/2013/11/911-and-academia/>). Mi scivolas, ĉu nun eblus persvadi al BBC 4 dissendi ĝin. Eble ĝi unue eliros per The People's Voice.

Salutas Ian
Keep Talking
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth
<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

Keep Talking administras retan diskutgrupon anglalingvan, '911keep Talking' kaj ĉiumonatajn kunvenojn en Londono. Retleteru al mi por pluaj informoj.

Beletraĵoj

Poeziaĵoj

Shefqete GOSALCI

Sentimento

Ŝirita kaj ĉifonita luno
Rigardas min rekte el la ĉielo
Ĉar jam estas elĉerpita mia pacienco
Mi ekiros kaj baldaŭ estos mia alveno

Spite la longan vojon
La montojn kaj kampojn intere
Mia sopiro forfaligas eĉ la kastelon
Ne mortos mi sen vin vidante senpere

Vi ja estas por mi arda fadeno
Knedita el la sopiraj radioj
Pro tio neniam estas ĉe mi nokto
Sed nur ja senfinaj matenoj

Al vi mi iras kaj revenas ĉiamfoje
Nenio eskapas disde viaj sensoj
Ĉiun abismon mi forfaligas vianome
Kaj mi envolvas tutan ĉi mondon per pontoj

Diras mi "mi amas vin", kaj ridetas
Kaj vi ion susuris al mi
Ĉi tiu ponto inter ni etendiĝas
Estas ja amo super amo ĝi

Nesto sur ondo

La matenan kafon mi eltrinkis ankaŭ hodiaŭ
Sed ne volas malleviĝi fronte de mi la tago
Trafis min envane kelkaj idiotoj tagon antaŭ hieraŭ
Tiuj kiuj eĉ la sunon turnas al batalĉevalo

Kaj mi petis al la kolombo alveni ĉe min
Sed ĝi forflugis al senadresita ĉielo
Ĉar hieraŭ el paradizo oni forpelis ĝin
Kaj fanditan pulvon enĵetis al la buŝo

Nun ĝi komprenis ke mi mondon eniris
Kiu la mia neniam fariĝis
Ĉi tie kie la absurdo per larmoj nutriĝis
Kaj la feliĉaj momentoj en abismo flatis

Kion mi faru kun vi mia amo
Sur ondo mi starigis neston
Kaj forfuĝis el ĉi tiu karneca prizono la animo
La nuba ĉielo super la staturon

Nu parolu do kion mi faru mia amo
Ĉar tiu tempo ĉiujn amojn miajn mortigas
Kvankam kostis al mi suferajan monton tio
Mi neniam supren la manojn levas

Medalo

Portas mi sur la kolo
La malplenigitan medalon
Deziras mi esti tero
Kaj mi ĝermigi ĉion

Inter la sopiro kaj fajro
La rivero liton faru
Por ke refreŝigu la baladbrusta bravulo
Kiu nur al mi kaj Libero apartenu

La tero plendas al avino
Pro grandaj naskoj kaj mortoj
Per sango koloriĝas la violeto
Por ke albane odoru la sezonoj

La amo la envion forpelas
Kion forprenas ĝi ne plu redonas
Sur la brustoj ni ja dancas
Mi la koran ritualon aŭdas

Sub la medalo
La tero eklarmiĝas
Kaj la ŝtono tremlipe balanciĝas

Premiero

Per fulmoj kaj batoj ni parolas
La sama melodio kaj violono
Kaj same tio refrenas
En la sama konko

La sama perlo
Kaj la sorto
Kaŭras la silento
En la de miliono da piedoj placo

La kulpa diablo sin mortigas
Per la vinbotelo
Ŝima vino el la pasinta jarcento enverŝiĝas
La nokto ŝmiras la vizaĝon per urtiko

Per nostalgio gardante
Kaj per la aŭroro atestante
Nude la kristalajn glasojn ni rompas
Premieron ni al la nokto spektaklas.

Himno

...jen la momento alvenis
Tri tagoj ni amindumis
En la reĝlando de la anĝeloj
En karnavalo je floroj kaj fotoj

Ne kvititaj
Malantaŭ longa hararo kaŝitaj
Sopiro mia ĵus novedziniĝis
Miajn dormon kaj doloron vi perdigis

La silenton ĝermis la rigardo
Per la harligo kaj tilia aromo
Sur la ŝtona ŝimo
Sub la griza ĉielo

Nenian vorton dirante ni amindumis
La lampiroj longe kun la steloj dancadis
La ankro detenis min enapril
Kun vi surbruste
Kun diina deziro
Ĉe la ama himno

La aĝo de gravediĝo

Al mia patrino Gjyle naskinta 11 infanojn kaj al la aliaj kiel vi

La aĝulan paŝon
La faltplenan frunton
Enlarmiĝintan koron
Ni elĉepiĝas apudon

La vortoj unu la alian englutas
Kaj en la reton enfalas
Mi sentiĝas montaran ŝtoneton
De ĉiuj sezonoj vian idon

Abeloj kun plenigita mielujo
Kun vi apude- Patrino
Sentiĝas mi sur paperfolio krajono
Jen aboco, jen abako

De la vivo-lernejo
Odoru pan-kaj cidonia aromo
Apud la kesto je jarcenta koloro
Ni trempis la sopiron- tindro
Per la bruska lingvo
Kaj la ŝvelvejnaj manoj indikas pri la koloroj
De dekunu floroj portantajn en la manoj
En la intergenuo, brusto, sino

De kie ĉerpas vi benata la forton?
La triangulo ja malsekigis vian vivon
La lulilo, la knedujo, la puto
Vian penon ja konas nur la sitelo kaj glaciiginta ŝnuro

La aliaj silentu
Diino sur la trono de la ĝojo
La koron vi dividis en la nomoj
En la voĉoj kaj naskiĝtagoj
Dum la blankaj amindumaj horoj

Estas vi ja mem la amo
Kaj kie do estas la vivo?

La spegulo

La nova jarcento malhela
Gardas sur la kastelo
La arbidon el la jaro 1878
Kreitaĵojn kaŝe grasiĝintajn
Sub la dua radiko de la formulo 1244

Formanĝas ili la cerboparton
Restinta en Prizren kaj Prishtina
Tirana pliriĉigas la menuon
- de mallaŭdoj al si mem
Mitrovica ŝirita melodio
Ĉamerio tiu larmero
Sicilio falinta lulilpiedo

La diabloj eligis disde la mamoj la bebojn
Rompis ili la Arbroran spegulon
Kvazaŭ ŝirita koloro de la ĉielarko
Ŝkupi kun Migjena tuso
- mordas ĝiskarne la ungojn

Kaj Zara ludas per malnova gitaro
Skribas poeziojn por si mem
- kaj pri la truita boato

Tivari skuas la mantelon
- pro la nebuloj ŝimita
Printempo tranĉita Junion
Kaj Vieno grizhara operacias
- malnovan mapon

Poste kaŝe sin vidas sur la spegulo
Post la plasta vizaĝa operacio
Mankas la trafiklumo por la pacienco

Balkanio korpremas sian anĝelon
La svelita mensogaĵo lulas
- la osthaŭtan negacion
Atentu- ne subskribu la sorton
Per maniloj

La vundomordo

Mi petis Kosovo multfoje
Por ke mi kisu vian ardigitan vangon
Por ke mi viŝu almenaŭ larmeron

Mi songis vin kun ornamaĵoj
Novedzinon en Ĉamerio
Demandis mi viajn manojn, la maldekstran vi donis
Ĉar la dekstran kaj la fingron vi scias kie ja estas

Kaj la ĉielarkajn okulojn en la songoj vi vidas
Mi volis kisi vin Patrio, sed vi ne lasis
Sed tempon ne tiam, nek hodiaŭ vi havis
Surmeti la kapon en vian bruston mi deziris
Ne, respondis vi- ardiĝas

Kiun parton de via NE mi ne komprenas
En la silenta areno nur mi
Kaj vi Kosovo
Ne interkisitaj plurestas

Inter ni la flago kaj vundon
Mi volas kisi vian brilan frunton
Ĉe la luno mi embuskas
Naski por vi knabon mi volas
Sed same vi respondas

La jarojn vi dekorigis per atendo
Kaj versvico kun vi
Mi ne konsentas Kosovo, ne plu estas la jaro 81

Mi Solomonon ne obeos
Rozafo, ruĝiĝinta fendlipo mi fariĝos
Mia mordigita amo kaj vundo
Mia lulilo, plenbuŝo kaj fingroringo trempita en suno

Pasu Kosovo sur min
Malsekigu la lipojn sur akvumitan muron mian

Sensopiro

La memoro delikate la pipon ekbruligas
La ankron en la ĉefurbo de la forgeso ellasas...
La fumon en la nobelturo eligas

Okulbindita subskribas al la sezonoj la jaro
La novajn pasportojn kun temperatura stampo kaj akvolimdato
La printempon kondamnas pro la malfruiĝo al morto

Kaj al la somero nur la ungojn ĝi eltranĉas
Por ke ne malhelpu la sunon
Poste al si la naskiĝtagon nul bonaŭguras

Kun bazilio enmane
Nudpiede marŝas tra la aŭgustaj noktoj kun lampiro
Kvazaŭ en la unua rendevuo la knabino

La jarcenton orgojligas pro muteco
Kaj manfrapas al la vizaĝo pro malpureco
Kaj la dormopilolojn pro tagkajera perdo
Fordonas la pendseruron de malnova kesto
Kun cidonio ene

Forprenas en la intergenuo kaj la hararon karesas
Per mamoj, kukurbaj semoj kaj olivolio manĝigas
Per sopiraj vindotukoj envolvas

Kaj alparolas vorton sur la orelo
Kostandin vi subiĝu al Dio kaj memoro
Ankaŭ Zana-n kunprenu
Ekde komenco la sensopirigon startu

Mi alskribas al la animo de la animo per animoj

Kasixta kristalo mia animo
En la oceano de la ĉagreno
Ŝirita membro de la Patrio
Per la tondiloj de la okupacio

Ŝirita kristalo mia animo
Per la martelo de la allogo
Faldis la jarojn de la pacienco
Kvazaŭ monerojn en la ŝparkaso

Ŝirita kristalo mia animo
Falintaj el la manoj de la skulptisto
La animoj en lampirojn turniĝintajn
Ankaŭ la meteoron lumigintajn

Alskribos ankaŭ Dio
Sur la tagkajero de la homaro
Kiel militis animo dum la vivo
Por serĉi la vojon de la ĝojo

Soldato de la tago mia animo
Ĉirkaŭita per mallumoj
Se vi bezonos por prilumado
Mi donacas ĝin- forprenu, forprenu.

Larmaj kisoj

Ankoraŭ ne koninte jam
Mi deziris vin
Mi amis vin

Mi revis vin kvazaŭ en la fabulo
Mi pentris dum la rosecaj matenoj
Per animaj koloroj

Kaj renkontiĝinte
La larmoj interkisiĝis
NOVEMBROJ KAJ NOVEMBROJ

Jarcenton la ĉielo ploradis
Sub ĝi la tero tondris
Kaj la kronado okazis
Unu Novembro en Vlora

La ĉielo kaj la tero kroniĝis
Per suna ringo
Per pinto de stelo la luno la invitilon-ordonon alportis
Vi povas kuniĝi
Post kiam vi la vivon fordonu

Kaj la morto vivo okazis
Granda kvazaŭ monto
La stelaro Diinojn elektis
En la trono de la lumigado

La sango la ĉielon enflamigis
La frostiĝintan novembrofinon la suno varmigis

Ĝi la lulilojn plenigis
La aglon sur la flago ŝirmigis
Por la ceteruloj la tomboj lokon ne plu havis

La vivo en la manoj- kiel donacon restis
Ni kelkfoje dumtage mortiĝis

Nin oni akuzu, insultu, humiligu
Denove en Novembroj
La lulilon ni envane lulu
Per haltigita horo

Mimoza Ahmeti

Koncepto por kultura transplantanto, foririnta. ne petante permeson

Kiu estis J.V?

Nek mi sciis

Ĝis tiun matenon, kiam sonoris la telefono

Estas mi, diris li, hodiaŭ je la 11⁰⁰

Ĉe la Ligo de la Verkistoj.

Havis li la vizaĝon de la natura miro

Kaj liaj okuloj estis du portoklapoj, malantaŭ kiuj

Muntiĝis je distanco la inteligenteco;

Lia silkeca staturo envolvita

Per kostumo

En kies jakpoŝo ĝojis

Mantuka triangulo.

Mi tremetis, kvazaŭ antaŭ akordita violonĉelo

Kiun mi ne scipovis tuŝi.

Li certe tion rimarkis kaj:

Ĉu vi scias kial mi demandis vin?

Jes, mi diris, sciante nenion,

Vi estis sentinta ke mi volis koni noblan homon,

Iun kia vi, tio estas mem vin,

Kion mi estis postponinta ĉiam pluen

Ĉar tio ne estis okazanta.

Vi estas stranga, rediris li,

Poste, kvazaŭ malsupreniris iu malheleco apude

Revenis ĉe li la memoro:

Mi venis de Milano je 1944. Kelkajn tagojn

Feriajn en mia lando.

Kiu povus pensi

Ke la anglousonanoj forlasus nin tiel...

Estis pli kredebla pensi ke la Tero

Turniĝus kontraŭdirekten.

Oni enfermigis min, 12 jarojn,

Antaŭ min, ili eltombigis mian patron

Kaj demetis disde la kadavro la orajn dentojn,

Poste forĵetis la ostaron,

En la ĉelo mi dormis surbruste,

Ĉar surdorse

La humideco igas vin tuberkulozan.

Kion sciis pri mi J.V.?

Sciigu min, diris li,

Ĉu vi amoris kun E.R.?

Tio estis ruzeca demando,

Mi ne povas diri stulteca,

Kion J.V. lanĉis kiel ĵetkubon

Meze de nia interparolo.

Mi ne komprenas vin, susuris mi

Nenio, li ridetis, kiel vi volas.

Ni interkisiĝis senspute. Tiom, respondis mi al J.V.

Senspute. Ho, ho, ho

Malpeze ridis li

Kvazaŭ ie en alia korpo

Lian koron

Oni pinĉadis per kudriloj

Strange, vi estas stranga-
Mi do sentis ke li tute ne miriĝis
Ĝis la manmovo kiu postponis la limeson

Kaj vidis ke li miris kial
Li tute ne miris.

Sciigu min, diris li,
Ĉu vi amorus kun mi?
(Estis la tria fojo ke ni renkontiĝis,
Ĉifoje en la hejmo)

Mi ne povas, ne kapablas.
Diru, ĉu mi ne plaĉas al vi.
Kontraŭe diris mi, sed mi ne emas.
Kiel vi volas.

Kaj komencis li rakonti pri Princo
De Anglujo:
Ĉu vi scias kiel tiu Princo
Amoris kun sia amantino?
Sur du litoj kontraŭ unu la alian, nudaj
Ili nur intevidiĝis.
Ĉu vin plaĉus tia amoro?

Tiu scivolemo igas min aliri-
Diris mi kaj leviĝis.
Nu, bone. Kiel vi volas.

Strange,
Mi sentis ke J.V. ne ĝuis min,

Sopiris pri virinoj kaj jen
Tute ne atentis pri mia rifuzo,

Ni disiĝis kiel amikoj,
Renkontiĝis sopire.
laspeco de emocio kiu min premis iel
Dum lin nur forĵetis en forgescon de la evoluoj
Kie mia aŭskultado
Ne tro gravis por li..

Kio estis la vivo por J.V.?

Kiam li elprizoniĝis
Posedis perfektan staturon,
Jen la foto,
Danke al kontinua trejnado de volo por la libero.

Mi estis en plaĝo kun la edzino
Kaj kun du familiaj amikoj.
Mi naĝadis, iris foren, ili rigardis min,
Kiom fore iras J.V. diris
Kaj denove, duan fojon, mi enmariĝis,

Ludis ili per kartoj sub la tendo,
Iris mi tro fore, kiom mi kapablis,
Revenis. Surborde forta korbato, mi vidis
ke mi mortus.

Mi sterniĝis. Kia krepusko...
Ne povus trovi mi pli belan tagon por foriri
Disde ĉi tiu mondo, mi pensis.

Mi volis morti
Je tutspirite. Estis tago
Mirinda por morti,
Komprenu min, ĉu trafis vin iamfoje?

Sed de la tendo alvenis unu el miaj amikoj.
Ricevu ĉi tiun grajnon, J. V.
Mi rifuzis per mangesto,
Vi devas ricevi ĝin, alie vian
Familion kaj nin oni internigos
Ĉar vi rifuzis la kuracon
Kaj tio estas fremda operajo.

Mi ricevis.
Mi ĝojas, diris, nun ni estas
Kune kaj vi havas haŭton
Pli molan ol la silko.
Ho, kiom bone vi estas, diris li pri mi
Kaj mi pensis ke tion li diris pri sia haŭto.

Kie vivis J.V?

Li vivis en la vilao, nun en la tuta,
Iam nur en la surtera etaĝo
Ĉar deklasulo li estis.
Havis ankaŭ alian vilaon
Kie loĝintis
Membro de Politburoo
Kaj alian en Parizo
Same aliiĝintan
Kaj multajn senfinaj proprietaĵojn, okupitajn

Kiujn li neniam prenis

Ĉar, kiel li diris:

Ne intencas mi stari post la pordoj.

Lastajn jarojn li pasigis en Parizo,

Mi telefonis iutage, sed lia edzino:

Ĉu vi volas J.V?

Jes, mi volas J.V.

Kiu vi estas?

Mi estas M.A. kiel ĉiam.

Ĉu vi ne scias ke J.V estas jam edzigita?

Ankaŭ mi estas edzinigita

Tio estas, vin plaĉas J.V.

Certe ke plaĉas min J.V.

Ĉu tiel?

Jes, tie.

Bram.

J.V. estas sklerozita kadukulo

Estas dirinta min E.R.

Nu, J.V. tiel agas por

Ĉio, dirintis min O.V.

Servutulo kaj lakeo de la reĝimo,

Estas dirinta min A.P.

Mi sciis ke ne estis tiel,

Sed bastarda geno

Inter la geniaj genoj

Ridis ĉe ĉiuj miaj amikoj.

J.V. estis homa feino

Kaj ne posedis tiun genon

Kiu eble definitive dividas la noblecon
Disde la vulgularo.

Estis la lasta tia specio
Ankaŭ por ni en Francio
Diris K.A, provokema verkisto
El Parizo,
Tiutempe samseksemulo, kies vizaĝo
Estis viva abstraktaĵo de la intelekto:
Estis ni ambaŭ en la veturilo, kun J.V.
Kaj mi haltis, ĉar li frapigis
La piedojn, ploris kaj diradis:
Mi longe vivis, ho kiom neeltenebla
Tiom longe vivi.

Mi volis kvietigi lin, sed estis malebla.
J.V. estis rara eleganteco.

Li suferis pro senbrida mememo
Diris I.K., lia mastro,
Kvazaŭ li koleris ke estis vivanta,
Vi devas ĝojiĝi, diris mi,
En via lando la homoj ĝojas
Tiom longe vivi;

Sed kia vivo tio estas
Sen junaĝo, sen mono kaj sen virinoj,
Kia Parizo tio estas- atakis min.
Tia estas ja vivo nun
Ankaŭ por la junuloj de Parizo,

Vi konas Parizon de antaŭmilito,
Sed tiu de la konsumismo
Estas aliel. Ne demandu
Kozojn kiuj ne plu estas-
Ekplis I.K per la venĝemo
De tiu kiu perdis la majstron.

.
Estis la lasta telefonlvoko
Dum la elekta tempo:
Mi eksciis ke vi eniras
En la politikon- ludetis lia voĉo,
Faras vi, faras tion,
Ĉion vi povas fari.

Envere. Ĉu ankaŭ tion vi faris?
Ŝajnis min ke li diris
Kaj mi kiu volis aldiri
Ke tio estis simple kaprico
Tragika mia, por vidi
De la gorgo de nigra puto
Kaj ke...
Sed ne elmanĝita piro
Blokigis mian ezofagon
Kaj muteco
Disvastiĝis en mia estaĵo

Malmulte da tagoj antaŭe
Spektis mi sur la ekrano ke li mortis.
Mi seniluziiĝis, estis la unua penso,
Ne atendis plu,
Iu naŭzulo kiu ne plu emas manĝi

Pli malfrue mi konceptos ke li estas mortinta
Kaj malŝaltis la ekranon malvarmsange.

Tute ne gravas ke mortis J.V.
estas jam mi, dirsi O.V.
Kiu nun eĉ la telefonon ne levas.

Mi promenis sola tra la trotuaro, kun robo
Ruĝa idola,
Vestis ĝin unufoje por J.V.

Ventoblovis. Ventoblovis neeksplicebla vakuo
En la tuta ĉefurbo.
Vetera vakuo miksitita kun
Politika vakuo, kvazaŭ mortinta eroso

Kion vi faris al mi J.V.- mi neatendite kriis-
Kiel vi mortis sen mia permeso?

La robopintojn altiris
La vakuo kaj la harojn senespera soleco
Kaj mi tute sentis min
Vidvinon.
Inter la vidvina universo.

Estis ie nia foto
En la manoj de iu raportisto,
Foto farita
Ĉefante de Notre Dame de Parizo.
Mi nuda, miaj sandaloj

lom pli fore.

Tiel ni estis egalaltaj.

Ho, kiom bonaj vi estas,

Estis redirinta li pri mia gesto,

Dum mi kvazaŭaŭdis:

Ho kiom bona vi estas ho mia estaĵo, J.V., vi estas envere nobla.

Estis en tiu aŭdado io proksima

Al mia ĉeesto kio bezonatus

Por enfali en forgeseca evoluigo

Kaj nenio alia plu.

(Enesperantigis: Bardhyl Selimi)

Prozo albana

Ismail Kadare

La filino de la Agamemnono

Ĉapitro naŭa

Subite la orkestro silentiĝis, tra laŭtigiloj tondris aplaŭdoj kaj ĉiuj kapoj turniĝis al la ĉefa tribunulo. Eniris partiaj superuloj. De mia loko mi vidis nur kelkajn. Sed ne la Gvidanton, nek la patron de Suzana, kiu probable staaŝis apude. El la sektoro C-1 oni vidis klare nur kvar kapojn. Ĉu efektive ili estis tiel grandaj aŭ nur ŝajnis al mi tiaj, ĉar mi rememoris la nomon „sencerbaj gigantoj”, kiun oni donis al ili nia kolego el la muzika redakcio. Li estis kondamnita al punlaboro en minejo, ĉar li demandis, kial post kvardek jaroj de la konstruado de socialismo la plimulton da membroj en la Politika Buroo oni elektas inter homoj sen instruiteco. Li diris tion dum festeno. Iuj certigis, ke li parolis ankoraŭ pli senbride. Li asertis, ke la registaro de la deknaŭjarcenta Prizrena Ligo estis pli bone instruita ol la hodiaŭa, sed dum la kunsido, kiam oni maldungis lin, neniu aludis tion. Same kiel miajn vortojn oni rekonis tro aŭdacaj por ilin ripeti laŭte. Ili estis malbenitaj. Kaj precize same kiel al mi, oni riproĉis al li kelkajn profesiajn erarojn, favorajn opiniojn pri okcidenta muziko kaj ŝercojn pri laboro produkta.

La plej granda sukceso de la Partio estas nia nova homo... Jen la epokfara sukceso... Ni loĝas en la plej feliĉa lando sur la Tero... sen eksterlandaj ŝuldoj, sen impostoj... La unusola socialisma lando!

Fragmentoj el la inaŭgura parolado flugis - kiel ĉiam - preter miaj oreloj. Mi konis tion parkere, ĉi tiuj paroladoj estis tedegaj, banalaj, naŭzaj. Aŭdiĝis malnovaj sloganoj kaj antaŭ miaj okuloj - kiel en teatro-ombro - preterglitis la vizaĝoj de la konataj personoj, kiuj estis kondamnitaj ĝuste pro tio. Sufiĉas ĉirkaŭrigardi por vidi sloganojn, simbolojn aŭ portretojn, kiuj pereigis homojn. La konstitucio, kiu malpermesas preni kreditojn eksterlande, abundo (tio signifas: manko) de viando, la degenerinta Sartre, formo de la okuloj de Mao Zedong.

Tamen nia kolego el la muzika redakcio havis pli multe da feliĉo ol juna knabo el la teknika fako, kiu diris ion pri la privilegioj de la gvidantaro kaj iliaj infanoj, vilaoj, eksterlandaj vojaĝoj. Kompreneble, li ne estis publike akuzita, sed oni riproĉis alion: liajn opiniojn pri libera amo (sufiĉa kaŭzo por esti maldungita) kaj interparolo kun alilanda turista, kiu pereigis lin. Kaj kvazaŭ ne estus sufiĉe, oni diradis, ke dum la polica esploro li ne nur konfesis tion, kion li diris pri la „kortego”, sed plu akuzis. Li parolis pri sendado de oro kaj diamantoj al eksterlandaj bankoj, kiel en la tempo de reĝo Zog, pri sekretaj murdoj kaj pri aliaj maljustaĵoj. Li ŝparis neniun, eĉ la Gvidanton, kaj precipe ties edzinon, kiun li nomis la spirita ĉefkulpintino, vera Lady Makbet, nur ke provinca, Jiang Qing* de Albanio kaj tiel plu, kaj simile.

Li estis kondamnita al dekkvin jaroj de malliberigo, sed li ne pasigis tie eĉ unu kvaronon de tiu ĉi tempo... Kiel oni diris, en la kromo-minejoj troviĝas profundaj ŝaktoj, en kiujn kvazaŭ hazarde ordinaraj malliberuloj faligas la politikajn. Kaj lia falo kun la kapo malsupren, kiam dum kelkaj sekundoj densiĝis la homa sorto, finis ĉion.

La privilegioj de la superuloj, kaj precipe de iliaj infanoj estis ĉiama temo en miaj kvereloj kun la onklo. Sed pri tio, li ne furioziĝis kiel pri alio. Ŝajne io ankaŭ ne plaĉis al li, kvankam li ne volis konfesi la veron. Miaj disputoj pri tio finiĝis, kiam mi ekkonis Suzanan. Ŝi mirigis min. Ĉu tio, kion oni diradis pri la infanoj de la superuloj, estis mensogo, aŭ ŝi malsamas kiel aliaj? Rapide mi komprenis, ke Suzana vere ne estis sama.

Kial oni elektis vin por oferi, mi ekpensis. Kaj en tiu momento, subite, kiel granda ondo frapegis min jena penso: kaj se ĉi tiu ofero estas nur trompo? Kaj se Suzana nur ŝajnigas antaŭ la mondo simplan, modestan knabinon, kaj tie, en iliaj kvartaloj, vilaoj kaj baritaj plaĝoj, ŝi vivas malĉaste, kun dancoj, brando kaj seksumado?

Mi eksentis pikon de ĵaluzo, kiel tranĉon de razilo. Ĉu mi ne legis ie, ke la ofero de la filino Ifigenia povus esti ŝajnigita? Kaj sur la altaron lastmomente oni metis cervinon anstataŭ ŝi. Do, la klasika prezentaĵo, kiu devus trompi popolamason. Kutima solvo por ĉiu reganto. En ĉemaraj vilaoj, dum la tuta vintro, mia Suzana dancas freneze, kuŝas nuda sur la kanapoj, ĝemas de volupto... Ne, pli bone ŝi mortu, pereu.

Iun posttagmezon mi surbendigis per magnetofono ŝiajn suspirojn kaj ĝemetojn kaj malfrue nokte, kiam ĉiuj dormis, mi enfermis min en la kuirejo por aŭskulti la registraĵon. Strange estis aŭskulti ĝemon aparte de la kuniĝo kun ŝi kaj vidaĵo. La voĉo estis ordinara, raŭka, plena je spiroj kaj spaco. Stratbruo - ies fajfado, malproksima hupado - donis al ĝi kosman vastegecon, kiel por meteoritoj rande de la ĉielo en somera nokto.

Kelkfoje mi revolvis la bendon en la kasedo kaj la sento pri la kosma perdo ankoraŭ kreskis anstataŭ malfortiĝi. Ŝajnis al mi, ke mi estas malproksime, disigita de ŝi. Foje mi havis la impreson,

* Jiang Qing (江青, 1914-1991) - la kvara edzino de Mao Zedong (毛澤東, 1893-1976), aktorino. Kiel ĉefa membro de la tielnomata „Bando de la Kvar” (四人幫) ŝi havis grandan influon sur la kulturalan revolucion (1966-1976).

ke oni enterigis Suzanan, kaj super la tombo mi aŭskultas ŝian plendon, alifoje, ke mi estas entombigita kaj kuŝante en la ĉerko, mi aŭdas ŝiajn suspirojn tra bruo de la ekstera mondo.

Iun tagon mi laŭtigis maksimume ŝian voĉon, kvazaŭ mi volus ŝtopi la tutan mondon per ŝia pena spiro, kaj mi imagis tiam, ke krom la nigra pubo, mi ankoraŭ ne vidis la vulvon, kiu estis vera fonto de mia frenezo.

Dum la sekva renkontiĝo, atenteme kiel pri ĉio, kio estas ligita kun amorado, ŝi kuŝiĝis tiel, ke sub la puboharoj mi ekvidis palrozajn lipojn. Kelkajn sekundojn mi rigardis kun miro, kaj miaj okuloj devis esprimi surpriziĝon de ĉasanto, kiu tuj poste, kiam li aŭdis blekon, subite malkovris, ke post densaĵo kasiĝas ne bestego, sed nur senhelpa besteto.

Kun la vulvo de mia eks-fianĉino. Ŝi havis vidindan, mi dirus, barokan mekanismon por amorado. Sed ankaŭ ĝi ne estis komence tia, sed nur poste, kun tempopaso ĝi ŝanĝiĝis post multfoja uzado... Torentoj da spermo fluis tra ĝi... Ne nur la mia. Antaŭe ŝi renkontiĝis kun du aliaj viroj kaj eble tiu sekreto pligrandigis ĉion antaŭ miaj okuloj. Tamen Suzana ne havis sperton. Eble ankaŭ ŝia vulvo kaŝos poste la komplikan sekreton. Eble poste, sed tiam mi ne vizitados ĝin.

(Enesperantigis Tomasz Chmielik)

Adem Demaçi

La patrino Shega kaj la kvin junulinoj

Fragmento

La ĉapitro 2

Elirinte, Heli ne estis difininta certan lokon por iri, sed volis nur vagadi tra la stratoj por vidi kiel aspektis Prishtina post la komenciĝo de la bombardado fare de NATO-o. Unue li ĉirkaŭiris la teatron "Dodona", turniĝis al la Kvartalo de Pirinazi, preteriris la domon de Ismail Dumoshi, supreniris la mallongan strateton ĝis la larĝa vojo asfaltita kaj sin ŝovigis al la maldekstra trotuaro, je direkto al la gimnazio. Dum la tuta irado, ĝis la granda vojo, Heli apenaŭ vidis kelkiun homon. Tamen, malsuprenirinte ĉe la panbakejo, li vidis je dorso malaltastaturan kaj grizharan viron, kun verdeta jako, kiu alpaŝis malrapide kun la manoj en la poŝoj. Dum momenteto, jen veturilo je malfermita supraĵo, el kiu viro je tondita hararo "a la prus" malrapidigis la veturadon kaj ekjelpis en la serba al la preterpasanto kun verdeta jako:

- Ankoraŭ vi vivas?
- Viva, viva ankoraŭ pli forta!- aŭdiĝis la respondo de la malaltstatura viro kun la verdeta jako.
- Nur ankoraŭ hodiaŭ, ankoraŭ hodiaŭ...- kriegis la viro el la veturilo kun malfermita supraĵo.
- Ne lasu tion por morgaŭ, sed finfaru jam hodiaŭ!- rediris la viro, ne elpoŝiginte siajn manojn.

La blankhara viro sur la malfermita veturilo, svingis sian manplenon, premis la makzelojn kaj daŭrigis pluen per bruego. La malaltstatura viro kun verdeta jako apenaŭ maltrankviliĝis, sed daŭrigis per la sama alpaŝado. Dume, ĉe Heli, la malaltstatura viro pligrandiĝis antaŭ siaj okuloj ĝis la pintoj de la elektraj fostoj! Heli plirapidigis siajn paŝojn. Ĉe la ŝtuparo kie ligiĝis la unua dombloko kun la larĝa

vojo, li atingis lin. Li oblikvokulumis lin. La viro kun la verdeta jako estis ĝuste Azem Zeqiri. Sin klinante kaj klopodante rideti, li etendis sian manon kaj aldiris:

- Fraĉjo Azem, mi salutas Vin je la plej alta respekto!

Azem Zeqiri, ne haltante, etendis ankaŭ li la manon al Heli kaj, ridetante, aldiris:

- Ĉu vi estas Heli?! Nu, kial vi eliris, mia filĉjo?
- Kaj Vi, kial eliris?- rediris Heli per sia demando.

Azem Zeqiri, subite haltis, rigardis al Heli rekte al la okuloj kaj aldiris:

- Nur ke oni mortigu min.
- Same ankaŭ mi.- diris Heli, rigardante al Azem rekte al la okuloj.

Azem okulmezuris la junulon, kaplevis supren, poste mallevis la rigardon al la okuloj de Heli kaj diris:

- Nu, feliĉigu vin la mamu de la patrino Shega!

Post kiam oni faris kelkajn paŝojn, ne haltante, Azem per tute malvarma voĉo rediris al la preteriranta Heli:

- Ĉu vi vidas tiun tankon malsupre, antaŭ la Teknikista Lernejo?
- Jes.
- Ĉu rusa tanko T-81...
- Ĉu ĉi tiuj timas, aŭ volas timigi nin?
- Ambaŭ kozo. Sed sciu ke ili ne intencas retiriĝi el nia Dardanio sen kaŭzi grandan sanguman tumulton...
- Ili faru ĉion kion volas, sed kion pensas Vi, fraĉjo Azem, kiom longe daŭros ĉi tiu tumulto?
- Fakte, tiel kiel estas planinta NATO-o por la bombardado el dek kilometroj je alteco, je nul viktimoj kaj sen interveno de la surteraj fortoj, tio povas longe daŭri.
- Nu, tio ne plu gravas, sed, laŭ mi, ĝi ne longos pli ol jaron...-diris Heli je klare laŭta voĉo.
- Ne, tiomlonge ne, sed tuto dependas de la kvalito de la bombardado...

Atinginte la lokon kontraŭ la vendejeto "Ylker", tri policistoj, tute junaj, haltigis kaj sieĝis Azem-on lasante Heli-n ekster la cirklo.

- Ej, sinjoro,- diris tiu pli blanka ol la ceteraj, ĉu vi ne aŭdis ke la milito komenciĝis kaj nun ne estas ja tempo por promenado...
- Envere, la milito komenciĝis, sed la vivo kontinuas kaj kontinuos.- diris Azem tute malvarmsange.
- Ĉu, tio signifas ke vi tute ne priatentas la fakton ke NATO-o ekatakis Serbion!- diris la plej nigra inter la tri junaj policistoj.
- NATO-o estas mokante vin, sinjoro!- diris Azem ridete.
- Aŭskultu, aŭskultu kion diras ĉi tiu maljunulaĉo! Ĉu vi konscias, stultulo?!
- Ĉi tiu stultulo estas dirante ke ne ekzistas milito sen infanterio! Iru kaj demandu mem vian patron kaj ekvidos kion li diros...
- Foriru de tie ĉi, vi estas envere frenezulo!- diris la kaŝtankolora inter ili kaj malfermis la sieĝon, liberigante Azem-on por ke ĉi lasta pludaŭrigu sian vojon. Kun li aliĝis Heli kiu la tutan tempon staris ĉeflanke, aŭskultante la dialogon inter Azem kaj la tri junaj policistoj.

- Kaj vi, kie estis- diris Azem al Heli, iel mirigite- kie vi estis?
- Tie, ekster la cirklo, ĉar ili tute ne rimarkis min...
- Ĉu tute!...
- Jes ja , tute- diris Heli, irante preter lin.
- Strange!- diris Azem kaj, post du-tri paŝoj, aldonis:
- Kiel vidite, ĉi tiuj estas tute perdinte sian menson...

Sed okazis ankoraŭ alio. Preterpasante la turniĝon kontraŭ la granda tanko preter la muro de la Teknikista Lernejo, maldekstre, ili vidis kelkajn armitajn ĝisdente policistojn. Azem aŭdis, kvazaŭ nebule, unu el ili dirante al si:

- Kamaradoj, ĉu ne estis Azem Zeqiri tiu viro, aŭ mi eraras?
- Nu, ni haltigu lin.- diris unu el ili kaj ekkriis:- Ej, sinjoro, ĉu vi estas Azem Zeqiri?
- Jes, ja, mi estas.
- Venu iomete ĉe nin, venu!- diris la policisto kun la “toki-voko”¹³ enmane. Azem disigis kaj aliris la policistojn.

Du el ili, vestite per kontraŭplombo, aliris Azem-on. La altstatura kun “toki-voku” enmane, aldiris:

- Kiel vi nomiĝas?

Azem respondis.

- Vian identigilon?!- laŭtvoĉis la altstaturulo.

Azem elpoŝigis la identigilon kaj etendis ĝin al la policisto.

Li forprenis ĝin disde la mano de Azem kaj malfermis. Ĝus leginte la nomon, li parolaĉis al Azem:

- Kial vi ne restas enhejme, sed eliras kaj vagadas tra la stratoj?
- Mi estas liberulo kaj en mia urbo mi povas eliri ĉiam, kiam mi volas!
- Ĉu, vi estas liberulo kaj en via urbo? Vi ŝajniĝas tre saĝa, ĉu ne? La aliaj foriras, dum vi eliras kaj kvazaŭpromenas...
- Mi ne intencas foriri!- respondis severe Azem.
- Vi foriros, foriros kaj vin ne haltigos eĉ Dio!...diris la policisto kaj aktivigis la radion.
- Hola, ĉi tie estas Azem Zeqiri. Ĉu mi arestu lin?

Post mallonga interval, aŭdiĝis la respondo:

- Ne estas bezonate!

La policisto etendis la identigilon al Azem, dirante kurte:

- Foriru!

Azem faris du-tri paŝojn, dum aliĝis lin Heli.

- Ĉu denove vi?!?
- Oni min tute ne rimarkas.- diris Heli, bedaŭrinde.
- Kial do, ĉu vi deziras ke oni rimarku vin?!...

¹³ Militista manradio

Heli diris nenion kaj tiel silente ili daŭrigis la vojon ĝis la Horloĝturo, ĉeangule de la ekstera korto de la Gimnazio. Tie, Azem haltis kaj, etendante la manon al Heli, aldiris lin:

- Nun, mi serpentumos ĉe ĉi tiu strateto, preter la Elementa Lernejo kaj iros iomete al mia fratino ĉar ŝi eble zorgas pri mi...
- Bone,- diris Heli,- mi iros vojsupren kaj min direktos al la Bazar. Hodiaŭ vi aspektis ĉe mi pli bela ol iam ajn...
- Ĉu?- diris Azem brovkuntirante.

Sed Heli, dume, per kelkaj paŝoj, troviĝis trans la strato kaj estis malaperante post la moskeo de sultano Mehmet..

(Enesperantigis Bardhyl Selimi)

Gerard Leser

Poeziaĵo

Kiam la hirundoj

Iam kiam la hirundoj
en la ĉielo
reton teksos
por kapti la sunradiojn

Iam kiam la noktuetoj
vespere ne plu filozofiumos
kaj ne plu pririgardos la malhelon

Iam kiam la violoj
akfloros aŭtune
kaj la folioj printempe
de la arboj falas

Iam kiam la jonkviloj
siajn flavajn ĉemizetojn
per nigraj makuletoj
prisemos
kaj la rokegoj pro laco oscedos

Iam kiam la tagoj
grizajn harojn
kaj longajn dentojn ekhavas

Iam kiam la prujno
la stelojn
pro malvarmo

tusigos

nur tiam

nia amo estingiĝos.

Esti Elzasiano

Esti Elzasiano

signifas

kredi ke

libereco ne vorto sensignifa

estas

Esti Elzasiano

signifas

kredi

ke alia

vivo

eblas

Esti Elzasiano

signifas

la manojn

malfermi

por novajn

vojojn

de homo

al homo

trovi

Esti Elzasiano

signifas

trejni

esperon

por

vivi

(Enesperantigis Edmond Ludwig)